

V-19034/1981  
Esperanto

中國報通


1 1981

# POPOLA ĈINIO



# Arta festivalo de ĉinaj nacimalplimulto

La nomita festivalo okazis en Beijing, en la lasta oktobro. En ĝi prezentiĝis pli ol 400 programeroj saturitaj de nacia koloro. La aktoroj de diversaj naciecoj lernis unu de alia, interŝanĝis spertojn kaj fortigis inter si amikecon kaj solidarecon.



Mongola danco

Ĝui prezentadon de siaj kolegoj





# INDEKSO DE EPCĈ 1981

	Nr. pĝ.		Nr. pĝ.
<b>ESPERANTO</b>			
Neforgesebla renkontiĝo de japanaj kaj ĉinaj esperantistoj . . . . .	1.13	Kial mi amas Esperanton . . . . .	5.10
Antaŭparolo al la Kvara Eldono de la Plena Gramatiko de Esperanto . . . . .	1.16	Profesie labori por Esperanto . . . . .	5.11
Iniciato de Jugoslavia Esperanto-Ligo . . . . .	1.16	Fremdlandaj esperantistoj kaj la ĉina Esperanto-movado . . . . .	6.11
Esperanto kaj la ĉina literaturo . . . . .	1.18	Pri profesoro Lu Jianbo . . . . .	6.14
Triharuleto salutas esperantistojn . . . . .	1.20	Rememoro pri mia patro K. Ĉ. Sun . . . . .	7.23
Oficiala komuniko de la Akademio de Esperanto . . . . .	2.20	Usonaj geamikoj en Ĉinio . . . . .	8.16
La unua mecenato de Esperanto — Aleksandr Zilbernik . . . . .	2.21	Mi kaj Esperanto . . . . .	9.27
Esperanto-movado en Changshu-gubernio . . . . .	2.22	Etimologiaj duoblaĵoj en Esperanto . . . . .	10.18
Inaŭgura kunveno de la Pekina Esperanto-Asocio . . . . .	4.30	La ĉina komuna lingvo kaj Esperanto . . . . .	11.20
La amika sendito de la Universala Esperanto-Asocio . . . . .	5.13	Liu Shifu kaj Esperanto . . . . .	12.25
Zamenhof ne estis monavida . . . . .	7.21	Pupistoj interesiĝas pri Esperanto . . . . .	12.28
Gratulon al la 66-a Universala Kongreso . . . . .	8.14	<b>SUR NIA LIBROBRETO</b>	
Memorinda vojaĝo . . . . .	8.15 ✓	Bela rakonto . . . . .	2.27
Kion mi vidis en Ĉinio . . . . .	8.20	Guto post guto . . . . .	4.16
Vivu la amikeco kaj kunlaboro . . . . .	8.22 ✓	Amiketo por komencantoj . . . . .	5.18
Zheng Zhenduo kaj la Esperanto-Asocio de Jinan-universitato de Shanghai . . . . .	10.20	“La historiaj radikoj de nealianciĝo” . . . . .	7.32
Esperanto estu la universala lingvo de la sento . . . . .	11.17	“Vera pliriĉigo de la Esperanta traduka literaturo” . . . . .	9.17
Scienca eldona centro de UEA . . . . .	11.23	El ĉina poezio . . . . .	10.21
<b>NIA KULTIVEJO</b>		Nove ricevitaj libroj . . . . .	10.22
Nealiancitaj — ŝanco por Esperanto, Esperanto — ŝanco por nealiancitaj . . . . .	1.14	“La Faraono” en bildoj . . . . .	11.38
Mi kaj “Petro” . . . . .	2.19 ✓	<b>POLITIKO</b>	
Lingvo, ĉiutaga vivo kaj Esperanto . . . . .	3.12	Antaŭ la popolan tribunalon . . . . .	2.13
El miaj rememoroj . . . . .	3.14	Juĝdecido de la popolo . . . . .	4.12
Pri la Internacia Esperanto-Muzeo . . . . .	3.16	Song Qingling — eminenta virino de Ĉinio . . . . .	8.2
Teoria fundamento de Esperantismo . . . . .	4.26	Nova takso pri la historia pozicio de Mao Zedong . . . . .	10.2
Manko de komuna lingvo — kapdoloro de la Eŭropa Komunumo . . . . .	4.28	<b>INDUSTRIO KAJ TRAFIKO</b>	
Korespondado amikigas . . . . .	4.29	Ĉinaj tolŝuoj . . . . .	1.27
		Malgrandaj hidroelektrejoj — grava fonto de energio por kamparo . . . . .	2.9
		Granda konstruaĵo por jungi Changjiang-riveron . . . . .	4.2
		Tangshan hodiaŭ . . . . .	7.12
		Plastaj produktaĵoj de Ĉinio . . . . .	9.21

	Nr. pĝ.
Konstruantoj de la hidroelektraro Gezhoubu . . . . .	10.16
Trafiko en Beijing . . . . .	12.11

### AGRIKULTURO

Maduo — paŝtejo sur la altebenaĵo . . . . .	1.7
Yunnan — trezorejo de vegetaĵoj . . . . .	1.32
Novaj vilaĝoj sur la dezerto . . . . .	3.9
Ĉasado en la Malgranda Xing'an-montaro . . . . .	3.35
Novaj ŝanĝiĝoj de la ĉina kamparo	
Ĝojo de la kamparanoj de Shandong . . . . .	4.6
Impreso pri la tibeta kamparo . . . . .	4.7
Novaj aferoj en mia hejmloko . . . . .	4.8
Konstruado kaj mastrumado de metanbaseno . . . . .	4.37
Botanika ĝardeno en dezerto . . . . .	5.22
Ĝojo de la kamparanoj de Lankao . . . . .	6.2
Reformo de ruĝa grundo en suda Ĉinio . . . . .	6.4
Sukceso de Ĉinio en kulturo de hibrida rizo . . . . .	9.19
Vojaĝo en grenejo sude de Changjiang-rivero . . . . .	10.10
Surmara fiŝista vilaĝo . . . . .	11.9
Altprodukta kotono Lumian n-ro 1 . . . . .	12.30

### EKONOMIO KAJ KOMERCO

La vojo de ĉina moderniga konstruado . . . . .	2.2
1000 dolaroj en la 2000-a jaro . . . . .	2.7
Tianjin — havenurbo de eksterlanda komerco . . . . .	3.30
Vizito al foiroj de Beijing . . . . .	4.9
Ekonomiaj atingoj de Ĉinio en la pasintaj 30 jaroj . . . . .	8.7
La nuna stato de la ĉina ekonomio kaj novaj politikoj por ĝia disvolviĝo . . . . .	10.6

### KULTURO, EDUKO KAJ SCIENCO

Mirinda knabo — viva komputero . . . . .	2.34
La Kvina Mezlernejo de Beijing . . . . .	2.38
Gazeto por geknaboj . . . . .	6.19
Taras Ŝevĉenko . . . . .	6.34
Forpasis granda ĉina literaturisto Mao Dun . . . . .	7.2
Memore al kamarado Mao Dun . . . . .	7.4
Mistero de "sovaĝuloj" . . . . .	7.19
Thomas Alva Edison . . . . .	7.33

	Nr. pĝ.
La sepdeka printempo . . . . .	8.35
Bela Bartok . . . . .	8.43
La pozicio de Lusin en la monda literaturo . . . . .	9.2
Aŭtobiografio . . . . .	9.10
«Ĉina Granda Enciklopedio» en redaktado . . . . .	10.33

### LITERATURO KAJ ARTO

Granda arta festivalo de nacimultoj . . . . .	1.39
Tian Xiaofei — nova floreto en la ĉina poezio . . . . .	1.42
Bonvenigon al la bela morgaŭo . . . . .	1.43
Simpozio pri la ĉina literaturo en Parizo . . . . .	1.44
Valentino . . . . .	1.46
Baĉka, mia Baĉka . . . . .	2.27
Konkobiltoj . . . . .	2.36
Intervjuo al verkistino Chen Rong . . . . .	2.40
En Mezaĝo (Novelo) . . . . .	2.42
"Najtingalo" kaj ŝiaj gestudentoj . . . . .	3.23
En manĝejo de mallargaj vermiceloj (Novelo) . . . . .	3.25
Ne demandu, pro kio estas tio . . . . .	4.42
Yan Ying en Chu-regno (Ĉina antikva spritaĵo) . . . . .	4.43
Ombro-teatraĵo . . . . .	5.28
En nia vilaĝo (Novelo) . . . . .	5.30
Spritaĵoj . . . . .	5.36
Karaj infanoj (Kanto) . . . . .	6.22
Pentraĵoj de gejunuloj . . . . .	6.24
Ruĝa trapo (Popola rakonto) . . . . .	6.30
Ĉinaj fabloj . . . . .	6.33
Testamento (Poemo) . . . . .	6.35
Himno al la popolo (Eseo) . . . . .	7.7
Bivisto Liu Dehai . . . . .	7.29
Majkanto (Poemo) . . . . .	7.36
Memore (Poemo) . . . . .	7.36
Somera tago (Poemo) . . . . .	8.27
Somervespero (Poemo) . . . . .	8.27
Ĉe la rokmuro Chibi . . . . .	8.41,9.32
Vendado de kraboj (Novelo) . . . . .	8.45
Sinjoro Fuĝino . . . . .	9.13
Brila imit-arto . . . . .	9.30
Humuraĵoj . . . . .	9.32,9.51



Chen Jinnong kaj lia violono premiita per ora medalo . . . . .	10.34
Iama okazintaĵo (Poemo) . . . . .	10.36
Incidento de kamparana familio . . . . .	11.27
Ĝuste en tiu ĉi angulo (Novelo) . . . . .	11.29
Ĉinaj proverboj . . . . .	11.35
“Romeo kaj Julieta” surscenigita en Lhasa . . . . .	12.8
Grandaj amikoj de la infanoj . . . . .	12.33
Blanka muro (Novelo) . . . . .	12.35

### MEDICINO, HIGIENO KAJ SPORTO

La unua mano farita per operacio . . . . .	1.34
La media protektado en Ĉinio . . . . .	3.2
Beijing penas defendi sin kontraŭ polucio de la medio . . . . .	3.6
La ĉina ŝako . . . . .	3.38
Pri ĉina ŝakludo . . . . .	3.41
Naskiĝo de novaj civitanoj . . . . .	4.17
Magia bisturio en la mano de profesoro Dong Shufen . . . . .	6.8
Spira gimnastiko kaj ĝia saniga efiko . . . . .	6.38
Ĉinaj getablotenisistoj en la ĉampioneca konkurso en Novi Sad . . . . .	7.8
Vojo al sukceso . . . . .	8.38
Ili gajnis spektantojn . . . . .	9.38

### POPOLA VIVO

Vojaĝo en mia miela tempo . . . . .	2.28
La Ĉina Virina Federacio kaj ĝiaj taskoj . . . . .	3.20
Por ke pli da gejunuloj fariĝu feliĉaj paroj . . . . .	4.14
Por kio homo vivas . . . . .	5.2
Multesperigaj junuloj de Shanghai . . . . .	5.5
Pri kio pensas la junaj laboristoj de Ĉinio? . . . . .	5.8
Mia vivo en la templo Zhebong . . . . .	6.41
Por savi knabinon . . . . .	7.17
Ĉinaj handikapuloj . . . . .	8.28
Vivo de ĉinaj blinduloj . . . . .	8.30
Amputita junulo kaj lia amatino . . . . .	8.33
Postlabora vivo plena de vikleco . . . . .	9.35
Ni estas filoj de “Torĉo” . . . . .	10.28
Por spirita civilizacio . . . . .	11.2
“Servo al vi” . . . . .	11.4
Vizaĝe al eksterordinara inundo . . . . .	11.13

La amo de “cigno” . . . . .	11.7
La familio de Qamba . . . . .	12.6
La nuna vivstato de la ĉinaj salajruloj . . . . .	12.17

### HISTORIO, NACIECOJ KAJ HISTORIAJ OBJEKTOJ

#### EL ĈINA MODERNA HISTORIO

Aŭtun-rikolta Ribelo kaj Guangzhou-a Ribelo . . . . .	1.52
La fondiĝo de la kuomintanga Nanjing-a registaro . . . . .	3.47
Evento de la 18-a de Septembro 1931 kaj Longa Marŝo de la Ruĝa Armeo . . . . .	5.47
Xi-an-a Evento . . . . .	7.24
Kontraŭjapana Rezistmilito (1) (2) . . . . .	9.33,10.44
La Ĉina Popola Liberiga Milito . . . . .	11.41, 12.42

#### EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

Torĉa Festo de sani-oj . . . . .	1.49
Ekskurso de tibetanoj al antaŭurba pitoreskejo . . . . .	3.46
La moro de golaŭ-oj . . . . .	5.50
La festivalo de ĝingpo-oj . . . . .	7.44
Jamej-oj sur Lanyu-insuleto . . . . .	9.46
Notoj pri Aŭtuna Festo de mjaŭ-nacieco . . . . .	11.36

#### HISTORIAJ OBJEKTOJ

Vizito al la ruino de Ĝardeno Yuanming-yuan . . . . .	2.48
Perlo enterigita en dezerta monto . . . . .	4.21
Rama-piteka kranio trovita en Ĉinio . . . . .	6.50
Antikvaj freskoj de Tibeto . . . . .	8.44
Loulan — antikva urbo sub sablo . . . . .	10.47
Surklifa ŝtona skulptaĵaro de Kongwang-monto . . . . .	12.48

#### TRA ĈINIO

Qaidam — trezorejo de Ĉinio . . . . .	1.3
Qinghai-provinco . . . . .	1.12
Pri vojaĝo per aviadilo . . . . .	1.36
Vojaĝo tra Sichuan . . . . .	5.19
En la naturparko Fanjing-monto . . . . .	11.33
Vizito al la okcidenta parto de Tibeto . . . . .	12.2
Wuhu — nova industria urbo . . . . .	12.15

#### VIDINDAJ LOKOJ

Galerio de ĉinstilaj pejzaĝoj . . . . .	1.29
---	------

	Nr. pĝ.
“Subtera Parko” . . . . .	2.26
Songshan-monto . . . . .	3.27
Agrabla somerumejo — Mogan-montaro . . . . .	4.24
Beidaihe — ĉemara somerumejo . . . . .	5.25
Antikvaĵoj de Quanzhou . . . . .	6.26
Pejzaĝoj de Fuchun-rivero . . . . .	7.25
Maŭzoleo de Sun Jatsen . . . . .	8.24
Taishan-monto . . . . .	9.24
Dongtingshan-monto . . . . .	10.23
Tanzhe-templo . . . . .	11.25
Vizito en Zhangjiajie . . . . .	12.23

### INTERNACIAJ PROBLEMOJ KAJ AMIKECO

Deklaracio de la 53-a SAT-Kongreso en Rijeka pri lingva politiko . . . . .	1.22
Pri la grenata problemoj de la mondo . . . . .	1.25
Medio de la homaro alfrontas seriozan krizon . . . . .	2.30
Simon Bolivar — nacia heroo de Latin-Ameriko . . . . .	3.42
Por elimini internacian ekonomian diskriminacion . . . . .	4.34
Brazilio — la ĉefurbo de Brazilo . . . . .	5.40
Fatalo de sovaĝaj animaloj de la mondo . . . . .	5.45
Nuklea energio — elekto de la mondo . . . . .	6.43
Sveliĝas la nombro de la urbaj loĝantoj de la mondo . . . . .	7.37
Brazilo — granda sudamerika lando . . . . .	8.40
“Mi preferas morti por sendependeco” . . . . .	9.40
Pri la internacia jaro de handikapitoj . . . . .	9.42
La problemoj alfrontataj de la ekonomio de la disvolviĝantaj landoj . . . . .	10.38
Pri la venontaj manĝaĵoj . . . . .	11.46
Konferenco pri la monda krizo de energio . . . . .	12.46

### AMIKECO

“Pirata Vesperfesteno” en Stokholmo . . . . .	1.46
La Yunnan-a Pekin-opera Trupo en Eŭropo . . . . .	2.45
Amikeco en la koro . . . . .	3.44
Menuhin kaj liaj ĉinaj lernantoj . . . . .	4.40
La ĉina virina flugpilka teamo en FR Germanio . . . . .	5.38
Muziko revekis nian amikecon . . . . .	6.48
Per Esperanto por ĉina-pollanda amikeco . . . . .	6.50

	Nr. pĝ.
Semanto de amikeco . . . . .	7.40
Ĉinaj muzikistoj en okcidenta Berlino . . . . .	9.41
“Longa navigado de Sindbad” . . . . .	10.40
Bonan vojaĝon, Mary! . . . . .	12.38

### TRA LA MONDO

Homoj kun dufingraj piedoj . . . . .	1.56
Sekreto pri malprosperiĝo de birdo-insularo . . . . .	1.56
Sapo-insulo . . . . .	1.56
Mistero de Pask-insulo . . . . .	3.49
Rid-arboj . . . . .	3.50
Stranga moro . . . . .	3.50
La roza festo de Bulgario . . . . .	5.42
La tago de geamantoj en Italio . . . . .	5.44
La akvoverŝa festo de Birmo . . . . .	5.44
La internacia flor-merkato . . . . .	7.46
Sensitiv-flora festo de Jugoslavio . . . . .	7.47
Naciaj birdoj . . . . .	9.49
Mirindaj hirundoj . . . . .	9.49
Lucia Festo de Svedio . . . . .	11.40
Fiŝkaptata Festo en Niĝerio . . . . .	11.40

### KALEJDOSKOPO KAJ ALIAJ

Serpentajo-plado . . . . .	2.50
Jinhua-ŝinko . . . . .	2.51
Lotussemoj de Honghu-lago . . . . .	2.51
Baldaŭ pariĝu la blankaj simioj . . . . .	4.44
“Reĝo de tapiŝo” . . . . .	4.45
Tradicia metiartaĵo — blua katuno . . . . .	4.45
La blanknaĝila delfeno hodiaŭ . . . . .	4.45
La naskipova maskla hipokampo . . . . .	6.36
Neĝlotuso — planto sur altebenaĵo . . . . .	6.46
Moskocervo kaj ĝia mosko . . . . .	6.46
Reĝo de tearboj . . . . .	8.23
Houkui-teo . . . . .	8.23
Reĝo de kamelioj . . . . .	8.23
Giganta knabino . . . . .	10.42
Elektrizolulo . . . . .	10.42
“Fajra” bebo . . . . .	10.42
Reĝo de ginsengo . . . . .	12.32
Medikamento antaŭ 3,000 jaroj . . . . .	12.32
Reĝo de arboj . . . . .	12.32
Rara blanka tearbo . . . . .	12.32





Korea danco




Tibeta danco



▲ Diversnaciecaj artistoj vizitas pitoreskejojn en Beijing. ►

Junaj kazaĥaj aktorinoj kaj veterana uigura dancistino Kangbarhan (dekstre)



Novaj amikoj donas sian adreson unu al alia.



En la amuza kunveno



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

Mjaŭ-a knabino

Foto de **REN SHIYIN**

### SUR LA DORSKOVRILO:

Huangshan-monto en printempo

(ĉinstila pentraĵo)

Pentrita de **ZHOU HUAIMIN**

### KOLORAJ SERIOJ:

Arta festivalo de ĉinaj nacimal-  
plimulto

Wuyi-monto

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj  
de E-istoj

(1) Pejzaĝo kun lago ĉe la urbo  
Ans Jutlando (Danlando)

(2) Akvofaloj de la nacia parko  
“Plitvice”, en la meza Kroa-  
tio (Jugoslavio)

Kantoj kaj Dancoj de Ji-oj

La Ekspozicio de Mebloj

### NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La Epigrafa Societo Xiling de  
Hangzhou

La Yunnan-Observatorio

Milpetala lotuso

Kulturado de kukumo en alta kaj  
fresta regiono

Bonvenon al la Amikeca Vizit-  
grupo al Ĉinio de JEI

Rajdado de mongoloj

Novjara Mesaĝo . . . . .	2
Qaidam — Trezorejo de Ĉinio . . . . .	3
Maduo — Paŝtejo sur la Altebenaĵo . . . . .	7
Vizito al Tar-templo . . . . .	9
MATERIALO: Qinghai-provinco . . . . .	12
Neforgesebla renkontiĝo de japanaj kaj ĉinaj esperan- tistoj . . . . .	13
NIA KULTIVEJO: Nealiancitaj — ŝanco por Espe- ranto, Esperanto — ŝanco por nealiancitaj . . . . .	14
Antaŭparolo al la Kvara Eldono de la Plena Grama- tiko de Esperanto . . . . .	16
Iniciato de Jugoslavia Esperanto-Ligo . . . . .	16
Esperanto kaj la ĉina literaturo . . . . .	18
INTER NI: “Ĉinaj Vesperoj” en Schwelm . . . . .	22
Triharuleto salutas esperantistojn . . . . .	20
Deklaracio de la 53-a SAT-Kongreso en Rijeka pri lingva politiko . . . . .	22
ESP-NOVAĴOJ: . . . . .	23
Pri la greno problemo de la mondo . . . . .	25
SPORTOJ . . . . .	26
Ĉinaj tolŝuoj . . . . .	27
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	30
KULTURAJ NOTOJ . . . . .	31
Yunnan — Trezorejo de Vegetaĵoj . . . . .	32
La unua mano farita per operacio . . . . .	34
Pri vojaĝo per aviadilo . . . . .	36
VIDINDAJ LOKOJ: Galerio de ĉinstilaj pejzaĝoj . . . . .	29
Granda arta festivalo de nacimalplimulto . . . . .	39
Tian Xiaofei — nova floreto en la ĉina poezio . . . . .	42
Bonvenigon al la bela morgaŭo . . . . .	43
Simpozio pri la ĉina literaturo en Parizo . . . . .	43
Valenteno . . . . .	46
AMIKECO: “Pirata Vesperfesteno” en Stokholmo . . . . .	46
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Torĉa Festo de Sani-oj . . . . .	49
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: Aŭtun-rikolta Ribelo kaj Guangzhou-a Ribelo . . . . .	52
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	55
TRA LA MONDO . . . . .	56

Generala distribuanto: Esperanta  
Sekcio de GUOJI SHUDIAN  
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Novjara Mesaĝo

ĈE la sojlo de 1981, ni sendas varmajn salutojn kaj bondezirojn por la Novjaro al niaj legantoj, perantoj, kontribuantoj kaj amikoj en ĉiuj landoj.

En Ĉinio oni kutimas retrorigardi al siaj laboroj de la pasinta jaro je la komenco de la nova jaro por kontroli kio estas prijesinda sukceso kaj kio forigenda manko en ili. Kaj surbaze de tio ili faras novan laborplanon. Ankaŭ nia redakcio faris same. Ni opinias, ke nia strebado en la pasinta jaro estis fruktodona. Ĝenerale dirite, la legantoj, estas kontentaj pri niaj klopodoj por plibonigi la revuon, kion pruvis la stabila kreskado de la abonantaro. Tamen ni ne haltas pro la atingoj, ĉar memkontento ofte kondukas al malsukceso. Ni konscias, ke ni devas klopodi pli multe por ke EPC vere meritu la honoran titolon "nia revuo" donitan de diverslandaj samideanoj.

Antaŭ ĉio, ni zorgos, ke EPC havu pli evidentajn trajtojn de Esperanta revuo. Por tio ni pliriĉigos la rubrikon "Nia Kultiĵejo" per valoraj enhavoriĉaj artikoloj pri Esperanto, Esperanto-movado kaj lingvaj problemoj. En tiu ĉi numero ni aperigis la artikolon "Nealiancitatj — Ŝanco por Esperanto, Esperanto — Ŝanco por Nealiancitatj" verkitan de fama jugoslavia esperantisto Tibor Sekelj kaj "Antaŭparolo al la Kvara Eldono de la Plena Gramatiko de Esperanto" de G. Waringhien, eksprezidanto de la Esperanto-Akademio. Ni esperas, ke tio fariĝos bona komenco de nia laboro.

Due, ni havigos al EPC pli da internacia koloro. Lastjare ni publikigis plurajn artikolojn pri mondaj problemoj ĝenerale interesaj al la publiko, ekz. pri energio, loĝantaro kaj monda ekonomio. Krom ni publikigis artikolojn pri Marko Polo kaj Albert Einstein, kiuj interesas la legantojn. En tiu ĉi numero troviĝas ankoraŭ raporto pri la monda problemo de greno, kio pruvas ke ni faras pluan klopodon tiuflanke.

Sed plejparto de nia gazeto estas dediĉita al ĉinaj aferoj, pri kiuj nia raportado sendube estas plibonigenda. Por ke la stilo de tiuj artikoloj estu viveca kaj ilia enhavo interesa, ni devas multe klopodi. Tio estas longe plenumenda tasko. Ni esperas ke pli da progreso estos akirita en la kuranta jaro. Por akceli interkompreniĝon de la popoloj, ni pli multe raportos la vivon de la ĉina popolo, kio certe vekos pli da interesoj ĉe niaj legantoj.

En 1980 ĈEL aliĝis al UEA kaj fariĝis ĝia asocia membro. Ĉe sia membriĝo ĈEL ja deklaris ke ĝi plifortigos la kunlaboron kun UEA, kun Esperantaj organizoj de ĉiuj landoj kaj ĉiuj fakaj Esperantaj organizoj. EPC, kiel eldonaĵo de ĈEL, volonte funkcias kiel ponto de tiu kunlaboro. En la 12-a numero de la pasinta jaro ni aperigis "Krakovo Petas Helpon", la alvokon de la Pola Esperanto-Asocio por renovigi tiun antikvan kulturan urbon. En tiu ĉi numero ni publikigis "Deklaracion de la 53-a SAT-Kongreso en Rijeka pri Lingva

Politiko" kaj "La Jugoslavia Esperanto-Ligo Iniciatas" por starigi kunlaboron inter Esperanto-organizaĵoj kaj unuopaj esperantistoj de la landoj nealiancitatj. Ĉio ĉi esprimas ke nia revuo jam komencis ludi tiun rolon.

En la pasinta jaro nemalmulte da alilandaj esperantistoj sendis al ni enhavoriĉajn artikolojn kaj belajn fotojn, per kiuj ili faris sian valoran kontribuon al plibonigo de nia revuo. Ni kore deziras, ke en la kuranta jaro pli multe da amikoj nin helpos per siaj artikoloj kaj fotoj. Ĉar EPC apartenas ne nur al la ĉinaj esperantistoj, sed ankaŭ al esperantistoj de la tuta mondo, ĝi prosperos nur dank' al subteno de ĉiulandaj samideanoj. Koncerne tion, la alvoko "Disfloru Nia Kunlaboro" en la 12-a numero de la lasta jaro ja esprimis nian deziron. Ni kredas, ke tio estas deziro ne nur de ni mem, sed ankaŭ de ĉiuj niaj fidelaj amikoj.

Kompreneble, ni ankaŭ esperas ke niaj legantoj prezentos al ni pli multe da rimarkigoj kaj proponoj. Ĉe ni eĉ pli bonvenaj estas kritikoj ol laŭdoj de la legantoj. La ĉina popoldiro "ekĝoji je aŭdo pri sia eraro montrita" restos utila sentenco por ni.

Fine, bonvole permesu al ni ankoraŭfoje esprimi niajn korajn dankojn al ĉiuj amikoj, kiuj fervore subtenas nian gazeton diversmaniere. Ni esperas, ke ni povos rekompenci la zorgon kaj subtenon de la diverslandaj amikoj per novaj sukcesoj en la jaro kuranta.

La Red.



# Qaidam— Trezorejo de Ĉinio



*Geologoj sur la Qinghai-Tibeta Altebenajo*

**L**A baseno Qaidam en Qinghai-provinco de la nordokcidenta parto de Ĉinio estas unu el la tri grandaj internaj basenoj de Ĉinio. Ĝi havas areon de 120,000 kvadrataj kilometroj kaj estas ĉirkaŭita de la montaroj Kunlun, Qilian kaj Altun.

Tiu regiono de virga tero nomata de geologoj trezorejo nun estas en antaŭvespero de grand-skala ekspluatado. Ĉe la piedo de la neĝkovrita montaro Kunlun staras vicoj kaj vicoj de ŝaktoskafaldoj, sur la vastega Gobio konstruiĝis fabrikoj kaj minejoj unu post alia, la sirena fajfado de trajnoj fortimigis kamelojn, en distriktoj de mongolaj, tibetanaj kaj kazahaj nomadoj aperis novaj urbetoj.

## VEKIĜAS LA GRANDA BASENO

En profunda aŭtuno mi ekveturis de Xining, la ĉefurbo de Qinghai-provinco, okcidenten

laŭ la Qinghai-Tibeta Fervojo, trapasis la grandan stepon norde de la lago Qinghai, la monton Guanjiao, la basenon Qaidam kaj atingis la novan urbon Golmud ĉe la piedo de la montaro Kunlun. Tie mi intervidiĝis kun Yang Wenjin, sekretario de la Haixi-a Mongol-Tibetan-Kazaĥa Aŭtonoma Subprovinco de Qinghai-provinco.

La pli-ol-50-jara Yang Wenjin estas malalta-statura kaj dika, kun bruna haŭto pro sunumado kun fortaj ultraviolaj radioj. Li estas mongolo kaj venis al la ĵus liberigita Qaidambaseno kune kun nombro da hanaj kadroj en majo de 1950.

Yang Wenjin diris al mi en han-lingvo: “Jam en la jaro 1950, ni komencis enketadon al tieaj subteraj rezervaĵoj. Ekde 1954 granda nombro da prospektoroj iris en la basenon Qaidam. Tiam ne troviĝis ŝoseo, ili alrajdis per kameloj. Kamparanoj

kaj paŝtistoj en la baseno aktive servis al la prospektora taĉmento kiel gvidistoj, interpretistoj kaj transportistoj.”

Geologoj kaj prospektoroj iris tra la tuta baseno kaj trovis la dislokiĝon kaj rezervan kvanton de la plejparto de ĝiaj mineraloj. Krome, la ŝtato konstruis tie sulfarejon, kali-sterkan fabrikan, boraksan fabrikan, minejojn de plumbo-zinko, asbesto kaj karbo kaj petrolan kampon.

Yang Wenjin montris al mi mapon de Qaidam: en la ovala baseno vidiĝas, kiel dissemitaj steloj en senluna nokto, ruĝaj, flavaj kaj verdaj punktoj, kiuj reprezentas diversspecajn metalajn kaj nemetalajn mineralajn riĉfontojn. Yang diris al mi: “En la ekspluatado mankis al ni sufiĉa elektro, kaj dum longa tempo ni ne havis fervojon, tial grandaj meĥanikaj ekipaĵoj ne povis esti enportitaj kaj la ĉelokaj produktaĵoj devis



esti longdistance transportataj al aliaj lokoj per kamionoj, kio kaŭzis tro altan produktan koston kaj limigis la ekspluatadon de mineraloj.”

Por rapidigi la konstruadon de Qaidam, la ŝtato plenumis la unuactapan traksternon de la Qinghai-Tibeta Fervojo en julio de 1979. Kaj trajnoj eniris Qaidam-basenon. Samtempe kun tio, la ŝtato estas konstruanta, ĉe Longyangxia-gorĝo en la supra baseno de Huangherivero (Flava Rivero), grandan hidroelektran centralon kun kapacito de 1,500,000 kilovattoj, kiu laŭplane produktos elektron en 1983 kaj liveros al Qaidam sufiĉan elektron.

### GRANDA SALA LAGO

El la rezervaj riĉaĵoj de Qaidam la unua estas la sala lago. Qaidam en la mongola lingvo signifas salan akvejon. En la baseno troviĝas 32 lagoj, el kiuj 24 estas salaj.

Mi vizitis la salan lagon Qarhan je 65 km. norde de la urbo Golmud. Ĝi longas de la oriento al la okcidento je 168 km. kaj larĝas je 20-40 km., ĝia totala areo estas pli ol 5,800 kvadrataj kilometroj. Qarhan estas la plej granda el la salaj lagoj de nia lando.

Estas strange, ke la lago estas kovrita de bruna tavolo de salo, tamen sur ĝia surfaco ne troviĝas akvo. Vidita de malproksime ĝi estas kvazaŭ ĵus plugita tero sur ebenaĵo. 32-kilometra parto de la Qinghai-Tibeta Fervojo estas konstruita sur la sala kovraĵo. Krome, ŝoseo paralela trapasas la lagon. Kiam nia aŭto veturis sur ŝoseo, ni sentis nin kvazaŭ veturantaj sur asfaltita vojo. Sur la sallago oni konstruis kalisterkan fabrikan Qarhan, loĝodomojn, teatron, infanĝardenon, elementan kaj mezgradan lernejojn, hospitalon, magazanon,

bankon kaj PTT-oficejon, kiuj formis urbeton. Kiu povas imagi al si, ke sub la tavolo 50 mm. meznombre dika estas verda salakvo kaj neĝblankaj saleroj!





La prospektorado montris, ke en la lago troviĝas sedimenta salmino kun rezerva kvanto de ĉ. 60 miliardoj da tunoj, el kiu estas 42.6 miliardoj da tunoj da natria klorido (sal), kiuj sufiĉas por 8,000-jara konsumado de miliardo da homoj. La rezerva kvanto de kalia klorido kaj magnezia klorido respektive estas 150,000,000 tunoj kaj 1,650,000,000 tunoj. Ĝi estas la plej granda el la priprospektoritaj minoj de kalia kaj magnezia saloj. Krome, en la mino kunestas litio, boro, bromo, jodo, rubidio kaj cezio.

En 1958 oni komencis ekspluati la lagon Qarhan. Nun la Qarhan-a Kalisterka Fabriko havas pli ol 500 oficistojn kaj laboristojn, escepte de la min-ekspluatado la produktado estas plenumata per maŝinoj, la jara produktokvanto estas 23,000 tunoj, la produktaĵoj entenas kalian kloridon je pli ol 90%.

Post kiam la fervojo atingis la salan lagon, la ŝtato nun

konstruas apud la Qarhan-a Kalisterka Fabriko grandan kemiindustrian kombinat, kiu povos produkti ĉiujare 1,000,000 tunojn da kalia klorido, 3,000,000 tunojn da natria klorido kaj 12,000,000 tunojn da magnezia klorido.

La ŝtato ankaŭ faras ekspluatadon al aliaj sallagoj. Ĉe la sallago Caka fama pro produktado de bonkvalita salo en la orienta parto de la baseno konstruiĝis salfarejo kun jara produktokvanto de 300,000 tunoj, kies produktokvanto pliiĝos ĝis 1,000,000 tunoj post konstruo de la fervojo. La sallagoj Granda Qaidam kaj Eta Qaidam en la centra baseno abundas je bormino, mirabilito kaj litia klorido. Nun ni jam havas tie fabrikon kun jaraj produktokvantoj de 4,000 tunoj da borakso kaj 2,000 tunoj da mirabilito. La Sallaga Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj nun faras eksperimentadon por ekstrakti metalan lition el litia klorido.

## BOLANTA MINEJO


Mi elvagoniĝis ĉe la stacio Xitieshan de la Qinghai-Tibeta Fervojo, post 10-km-a veturado per mineja fervoja trajno mi atingis la minejon Xitieshan. Ĝi estas stranga monto el diverskoloraj ŝtonoj ĉirkaŭata de dezerto kaj vere similas al gema monto en mito.

Geologia teknikisto Wang Guishan kondukis min en tunelon. Ni iris dekojn da metroj kaj trovis nigrajn briletantajn ercojn sur la ĉirkaŭaj muroj. Wang diris al mi, ke tiu plumbozinka mino entenas plumbon je 5% kaj zinkon pli multe, kaj en ĝi kunestas oro kaj arĝento.


En 1958 Wang venis al la baseno Qaidam post diplomitiĝo de la Shenyang-a Nefera Lernejo. Tiam al Xitieshan mankis akvo kaj elektro, tie ne estis fandejo, tial oni ne povis apartigi ercojn kaj fari fandadon.

Nun la ŝtato fondis tie preparan oficejon de Qaidam-a Nefe-

*Serĉo de petrolo en Qaidam*



*Salfarejo en Qaidam*







*Nova urbo Golmud ĉe la suda rando de Qaidam-baseno*

ra Kompanio, kiu estos granda moderna kombinato de ekspluatado, apartigo kaj fando, kiu povos jare produkti 1,000,000 tunojn da ercoj kaj elfandi 70,000 tunojn da plumbo kaj zinko. Mi vidis vicojn da nove konstruitaj loĝdomoj por oficistoj kaj laboristoj apud blankaj tendoj sur montodeklivo. La

geologiaj laborantoj streĉe faras lastan geologian laboron necesan antaŭ la fondado.

### **PROSPEKTORATA REGIONO DE PETROLO**

Fine, mi venis al la prospektorata regiono de petrolo en la okcidenta parto de Qaidam. En veturado de centoj da kilometroj, mi ne vidis kulturitan kampon, nek paŝistojn, bovojn, ŝafojn, ĉie estas senlima dezerto kaj ondantaj montetoj.

Ĝuste en tiu dezerto mi vidis multajn ŝaktoskafaldojn, vilaĝojn de petrolaj laboristoj formitajn el moveblaj lignotabulaj domoj kaj tendoj. Sur la neglata ŝoseo senĉese kuras kamionoj plene ŝarĝitaj per longaj borstangoj kaj aliaj drilaj ekipaĵoj. Malproksime sismologa taĉmento faras sian prospektoradon, kun eksplodaj bruoj leviĝas fumoj similaj al fungoj.

Ĉinio jam trovis petrolan kampon en la baseno Qaidam, sinsekve trovis 162 ole-produktajn strukturojn, 16 olekampojn kaj 5 naturgasajn kampojn. La

*La Qinghai-Tibeta Fervojo*



petrolaj laboristoj de tiu loko jam produktis pli ol 2,000,000 tunojn da nafto kaj per tio parte kontentigis la bezonon de petrolo en Tibeto kaj Qinghai.

Por akiri pli detalan materialon pri la petrolo rezervo de Qaidam, la Petrolo Ministerio

de nia lando faris grandskalan prospektoradon tie en 1979. Respondeculo de la prospektorata regiono Zhang Bangjie diris al mi: "Nun ni havas dekojn da putoboraj kaj sismologaj taĉmentoj. Ili faras prospektoradon sur areo de 20,000 kvadrataj kilometroj de 16 ole-produk-

taj strukturoj. En la pasinta pli ol unu jaro ni sinsekve trovis altproduktajn oleputojn en formacio sub 3,000 metroj."

Zhang Bangjie ĝoje kondukis min al la sepa oleputo apud la lago Duoskule por ĝin pririgardi. La lago kun la silueto de la neĝkovrita montaro Kunlun speguliĝanta en la blua akvo formis maloftan mirindan pejzaĝon en la dezerto. Laboristo diris al mi, ke la oleputo profundas je 3,322.72 metroj kaj nun en prova produktado ĉiutage povas elŝpruci pli ol 150 tunojn da nafto. Zhang diris kun memfido: "Laŭ la ole-produktaj strukturoj de Qaidam kaj la materialoj akiritaj en la prospektorado, oni trovos tie grandan olekampon."



*Akvomelonoj  
kreskantaj en  
Qaidam-baseno*

JIANG PENG:

## Maduo-Paŝtejo sur la Altebenajo

**Q**INGHAI-provinco estas unu el la kvin grandaj paŝtejoj de Ĉinio. Tie troviĝas pli ol 33 milionoj da hektaroj da utiligeblaj naturaj herbejoj kaj nun estas bredataj 21 milionoj da brutoj. La kvar aŭtonomaj subprovincoj ĉirkaŭ Qinghai-lago en la nordorienta parto de la provinco, kie koncentre loĝas tibetanoj, mongoloj kaj kazaĥoj, estas bazo por bredi ŝafojn porviandajn kaj porlanajn. La Yushu-a kaj Golog-a Tibetanaj Aŭtonomaj Subprovincoj en la suda parto de la provinco estas produktoj de bonrasa ŝafo kaj gruntoŭbo — specioj de brutoj sur la Qinghai-Tibeta Altebenajo.

La stepo Maduo en la Golog-a Tibetana Aŭtonoma Subprovin-

co estas grava trapasejo por eniri Tibeton el la interna parto de nia lando. Tamen, antaŭ la Liberiĝo en 1949, tie troviĝis neniu ŝoseo, nek urbeto, krom bovoj kaj ŝafoj kaj paŝtistaj tendoj. Nur en la komenco de la 50-aj jaroj la ŝoseo etendiĝis ĝis tiu stepo. Kaj nur post 1958, kiam estis starigita Maduo-gubernio, sur tiu longe dorminta stepo aperis urbeto. Nun en la urbeto jam fondiĝis industrio, trafiko, poŝto kaj telekomuniko, kaj kultura, eduka, higiena, brutbreda, scienc-teknika kaj komerca servoj kun ĉ. 1,000 oficistoj kaj laboristoj han-aj kaj tibetanaĵ.

Maduo estas la unua gubernio kiun preterpasas la Flava Rivero

en sia longdistanca fluado. Ŝosea ponto el armita betono super la proksima Flava Rivero interligas la lokon kun la interna parto de nia lando. La gubernio kun areo de 22,000 kvadrataj kilometroj situas sur altebenajo je 4,500 metroj alta super la marnivelo. Tie la imponaj neĝkovritaj montoj, fekundaj stepoj kaj multaj lagoj formas grandiozan kaj belegan pejzaĝon kaj entenas abundajn naturajn riĉaĵojn. Sude kaj norde de la gubernio kuŝas altaj montoj, inter kiuj troviĝas 1,330,000 hektaroj da naturaj paŝtejoj. 70 lagoj grandaj kaj malgrandaj brilas sur tiuj stepoj, kvazaŭ perloj inkrustitaj sur vastaj, ondantaj, verdaj tapiŝoj. En la lagoj abundas senskvamaj



Qinghai-fiŝoj (*Gymnocypris przewalskii*).

La tibetaj ŝafoj kaj gruntoj bredataj sur tiu stepo estas famaj pro sia graseco kaj forteco. Bovoj, ŝafoj kaj lanoj de ŝafoj kaj gruntoj de tiu loko havas grandan debiton en- kaj eksterlande. Krome, en tiu granda natura zoo abundas birdoj, akvaj birdoj kaj bestoj kiel kapreoloj, sovaĝaj bovoj, hemionoj kaj blanklipaj cervoj. Ĉe la lago vivas cigoj, nigrakolaj grupoj kaj aliaj raraj birdoj. Sur altaj montoj kaj en veproj vivas ankoraŭ neĝaj kokoj kaj moskuloj. Ĉiujare post majo tie svarmas migraj birdoj, kies nombro kaj specoj estas nur iom malpli multaj ol tiuj ĉe la Birda Insulo en Qinghai-lago.

Labao, respondeculo de la gubernia registaro, deveninta de la malriĉa paŝtista familio, koniĝis al mi la ŝanĝigon de tiu stepo. Antaŭ la Liberiĝo la ĉefoj de la gentoj, feŭdaj brutoposedantoj kaj superaj religiuloj komplotis unu kun la alia kaj praktikis subpremadon kaj ekspluatadon al paŝtistoj tiel kruelan kaj sovaĝan, kiaj estis en la tibeta sklava sistemo. Krome la bruligo, mortigo kaj rabado fare de la kuomintang-aj reakciaj militaristoj, la arma lukto inter la malsamaj gentoj, atako de


*Gastado en familio de tibetana paŝtisto*



neĝstormo kaj epidemio de brutoj kaŭzis profundan malfeliĉon al la tieaj paŝtistoj kaj la socian stagnon dum longa tempo. Nur post la Liberiĝo la stepo komencis prosperi. En la fino de 1979 la gubernio havis entute 670,000 brutojn, t.e. kvinoble pli multe ol en 1959, dume la nombro de tibetana paŝtistoj pliiĝis de 3,000 al 5,600. En 1979 ĉiu paŝtisto ricevis de la kolektivo meznombre 447 juanojn, kaj laŭ la enspezo de la paŝtistoj, la gubernio okupis la unuan lokon inter la 38 gubernioj en la provinco.

Mi vizitis la Jiangpang-an Produktan Brigadon. Sur la kvinta paŝtejo ĉe la norda piedo de Bayanhar-montaro Ma Shijiao, estro de tiu brigado regalis min en sia tendo per butero, zanba (la ĉefa manĝaĵo el sekalo por tibetanoj) kaj bongusta lakto. Tiu brigado estis fondita

post la demokratia reformado. Tiam ĝi havis nur ĉ. 2,000 brutojn. Tamen, en la sekvintaj 20 jaroj ili plene utiligis sian grasan herbejon por disvolvi brutobredadon. En la fino de 1979 ĝiaj brutoj diversspecaj jam nombris pli ol 33,000, t.e. 15-oble pli multe ol tiu en la unuaj jaroj post fondiĝo de la brigado. Dank' al tio ke la ŝtato levis la aĉetprezon de brutproduktaĵoj, la totala enspezo de la brigado en 1979 plimultiĝis je 60% kompare kun tiu en 1978, kaj ĉiu paŝtisto enspezis meznombre 789 juanojn. Tiel la nomita brigado fariĝis la plej riĉa sur la stepo Maduo. Per la komuna akumulita mono ili aĉetis traktorojn, lantondilojn, lanpakilon kaj apartigilon de lakto kaj aliajn instrumentojn. Kiam Ma Shijiao diris al mi pri la sukcesoj de la brigado, lia sulkoplena vizaĝo radiis de feliĉa rideto.




*Paŝtejo de Maduo-gubernio*



# La Yunnan-a Observatorio

La Yunnan-a Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj situas sur la Feniksa Monto en la antaŭurbo de Kunming, Yunnan-provinco. Ĝi kun alta situo kaj bonaj kondiĉoj de klimato kaj medio estas ideala loko por studi astronomion.

Tie ĉinaj astronomoj faras esploron pri suna fiziko, stela fiziko, radia astronomio, astra meĥaniko, astra mezuro, astronomia latitudo, artefarita satelito, uzo de novaj astronomiaj teknikoj.



Parto de la Yunnan-a Observatorio


Observa ĉambro por 1-metra teleskopo



# La Epigrafa Societo Xiling de Hangzhou


La ŝtona pagodo  
Huayanjing — simbola  
konstruaĵo de la societo  
Xiling

La Epigrafa Societo Xiling de Ĉinio sin trovas apud Xiling-ponto de la Okcidenta Lago de la fama ĉina pitoreskejo Hangzhou. Ĝi fondiĝis en 1904. En 1978 la ŝtato sankciis ĝin kiel eldonejon pri epitaĵoj, stampokopioj, bildalbumoj kaj tiurilataj verkoj.




La korto de la societo Xiling en vintro


Scienca esploranto ĝustigas la ĉielostaton de horizontala teleskopo por observi sunan magnetan kampon.



Scienca esploranto traktas observajn donitaĵojn per komputero.









Japana kaligrafo Tanaka Goro skribas en la societo Xiling.



Verkoj de fama pentristo kaj epigrafisto Wu Changshuo, la unua estro de la societo Xiling

Centimetra-onda sunradia teleskopo





## Milpetala lotuso

En Yuquan-templo de Danyang-gubernio de Hubei-provinco de Ĉinio oni elkulturis raran specon de por-apreza plantaĵo — milpetalan lotuson. Ĝi akiris sian nomon pro tio, ke ĉiu ĝia floro havas 700-1,000 petalojn. Ĝi floras en somero kaj ĝia florado daŭras tri monatojn.



## Kulturado de Kukumo en Alta kaj Frosta Regiono

En Xatongmon-gubernio de Tibeto je 4,000 metroj super la marnivelo oni kulturis kukumon en forcejoj, utiligante termofonton, kaj la plantaĵo kreskas tre bone.

## Vizito al Tar-templo

**S**UR la Qinghai-Tibeta Alt-ebenajo la someraj tagoj estas serenaj kaj la vetero agrabla. En la 6-a de la sesa monato de la luna kalendaro, la datreveno de la naskiĝo de Ŝakjamunio, mi vizitis la faman Tar-templon, situantan je 27 km. sude de Xining, ĉefurbo de Qinghai-provinco. Ĝiaj brila Granda Tegment-orumita Halo, budhaj haloj, pagodoj kaj lamaaj loĝdomoj sur montdeklivo estas klare vidataj demalproksime.

La naskiĝo kaj konstruado de Tar-templo havas striktajn rilatojn kun Majstro Congkapa, la fondinto de la flava sekto de lamaismo. La templo ricevis sian nomon ĝuste pro ties budha pagodo por memoro al Congkapa.


Congkapa origine nomiĝis Losangzhaba. En 1357 li naskiĝis en Lushar de Xining, Qinghai-provinco (t.e. la sidejo de Tar-templo) kaj bonziĝis en sep-jara aĝo. Li baptiĝis de Sramaneraka kaj estis inicita de fama bonzo Dunzhurenqing en Qinghai. 17-jara, li iris al Tibeto por studi sutron kaj post ĉ. 20-jara diligenta studado kaj rigora memkulturo, finfine li kreis la flavan sekton de lamaismo, kies disĉiploj devis rigore observi la regulojn, prak-

tiki asketismon, persisti en dumviva virgeco, abstini de drinkado kaj mortigo de vivantoj. Tiu sekto rapide famiĝis kaj ĝuis altan prestiĝon inter la postaj adeptoj. En la korto de la Granda Tegment-orumita Halo kreskas tilio riĉa je branĉoj. Legendo diris ke post naskiĝo de Congkapa, lia patrino enterigis tie lian placenton kaj poste elkreskis la tilio. La inicia majstro de Congkapa konstruigis por li malgrandan pagodon apud la arbo post kiam li famiĝis en Tibeto. Ekde tiam multaj budhistoj pilgrimis tien. Poste oni konstruis por li malgrandan memor-halon malantaŭ la pagodo. En 1577 Dalai-lamao la Tria konstruigis arĝentan pagodon por protekti tiun tilion preskaŭ velkan pro palpado fare de la pilgrimantoj kaj komencis konstruigi tie templon. Post 400-jara konstruado de Ming- kaj Qing-dinastioj, nun tiu templo havas pli ol 30 halojn, institutojn kaj budhajn pagodojn, kaj pli ol 1,000 kortojn kun 4,500 ĉambroj servantaj kiel oficejoj de vivaj budhoj kaj loĝejoj de lamaoj. Tiu grandioza templo okupas areon de 40 hektaroj.

Starante ĉe la plej alta loko de la templo, oni povas vidi ke la konstruaĵoj estas dividitaj de

rojo en du partojn: Okcidente troviĝas la ĉefaj haloj kaj oficejoj de vivaj budhoj. Ili iom post iom leviĝas laŭ la montodeklivo de la nordo al la sudo, kaj en la suno rebrilas la orumitaj tegoloj, oraj flagoj kaj trezoraj boteloj sur tegmentoj kaj glazuritaj muroj. Oriente troviĝas tibetstilaj loĝdomoj de lamaoj kun ebena tegmento. La tuta templo estas ĉirkaŭita de muro. La grandiozaj konstruaĵoj nature kunfandiĝas kun la majesta monto. Tiu arkitekturo prezentas la aŭtoritaton de lamaisma templo.

La Granda Tegment-orumita Halo estas la ĉefa konstruaĵo de Tar-templo. Ĝi estis starigita por memori Majstron Congkapa, pro kio ĝi nomiĝas ankaŭ Memor-halo de Congkapa. Sur la fronta supra muro en la halo pendas tabulo kun oraj vortoj skribitaj de imperiestro Qianlong (lia regado daŭris de 1736 ĝis 1795) kaj centre staras la pagodo memore al Congkapa kun alteco de 12.5 metroj. Ĝi estas tegita per arĝento kaj volvita per kelkdek tavoloj da blankaj hadaĵoj (blanka kaj longa silka rubando en Tibeto estas prezentata al dioj aŭ al honoraj gastoj por montri la respekton). Du-metra orumita kupra statuo de Congkapa estas



Tar-temple

lokita en la niĉo de tiu pagodo. Antaŭ la pagodo staras dekoj da lampoj oraj, arĝentaj kaj kupraj, kaj krome eburaj ornamentoj kaj antikvaj boteloj. Sur la ĉirkaŭaj muroj kaj budha lotustrono malantaŭ la pagodo estas vivece pentritaj budhaj bildoj kaj freskoj pri budhismaj rakontoj. La pilgrimantoj ĉiuj ventrekuŝe adoras antaŭ la pagodon, kio kun la tempopaso faris sulkojn sur la planko.


Laŭ la historia kroniko tiu halo estis konstruita en 1560. Tiam ĝi estis nur malgranda pagodo kun tibeta stilo. Kaj en 1577, kiam la templo estis oficiale konstruita, la halo estis vastigita ĝis 450 kvadrataj metroj. En 1711 la mongola princo Erdeni de Qinghai donacis al la templo 1,300 taelojn da oro kaj pli ol 10,000 taelojn da arĝento. Per tiuj sumoj oni tegmentis la halon per orumitaj kupraj tego-



Statuo de Congkapa, kreinto de la flava sekto de lamaismo




La granda junia foiro de Tar-temple





loj. En 1740 la tibeta suvereno Poluonai donacis grandan sumon por instalii orajn radojn kaj orajn flagojn sur la firsto de la halo kaj aldoni orajn bestojn kaj kuprajn tintilojn ĉe la anguloj de la tegmento. Tiu giganta konstruaĵo kun verda muro el glazuritaj brikoj kaj ora tegola tegmento, staranta en la centro de la templo, multe majestigis la templon.

Trapasinte la Grandan Tegment-orumitan Halon oni povas veni en la grandan preĝejon. Tiu tibet-stila konstruaĵo kun ebena tegmento kaj areo de 1980 kvadrataj metroj estas la



*Glazuraj ceramikoj de bestoj sur tegmentoj de Tar-temple*

plej granda en la templo. Interne de ĝi staras 168 dikaj lignaj kolonoj kovritaj per tibetaj tapiŝoj kun desegnoj de drakoj kaj feniksoj ludantaj inter la koloraj nuboj. Krome, en la halo staras multaj koloraj flagoj, kaj la plafono surhavas kolorajn desegnaĵojn. Sur la bretaroj bonorde kuŝas pli ol 2,000 kompletoj da sutroj kaj surtere kuŝas pli ol 2,000 sidkusenoj servantaj por lamaoj en preĝado.

La dua etaĝo de la preĝejo estis servinta kiel loko de la vivaj budhoj Dalai kaj Banchan por ilia preparo antaŭ prediko. Tra la koridoreto inter la dua etaĝo kaj la teretaĝo, oni povas rekte atingi la podion. Antaŭ la podio plene metiĝas butero, hadaĵoj, teo kaj moneroj omaĝitaj de la adeptoj.

La arkitekturo de Tar-temple havas sian originalecon kaj ankaŭ ĝia dekoraciado estas admirinda. En la pli malfrue konstruitaj Malgranda Tegment-orumita Halo, Halo de Longeviva Budho kaj Jiujian-halo, ĉiuj traboj kaj kolonoj estas zorge kaj subtile ĉizitaj metiartaj kuriozaĵoj. Kiam ni vizitis Jiujian-halon, la han-aj kaj tibetaj laboristoj estis riparantaj tiun konstruaĵon. Ĉiuj ĝiaj 10 okedraj klostraj kolonoj de Jiujian-halo estis ĵus ruĝigitaj kaj ankaŭ la kapituloj farbitaj. Tio estas la triafoja riparo de la popola registaro.

Antaŭ ol mi venis al la templo, mi jam informiĝis pri ĝiaj famaj pentraĵoj, buteraj skulpta-

joj kaj reliefaj brodaĵoj. Post vizito de la ekspona ĉambro de buteraj skulptaĵoj, mi estis tute konvinkita.

La homaj figuroj, floroj kaj herboj, aŭ montoj, riveroj kaj palacoj, ĉiuj estas plastike modelitaj el butero. Unu el la serioj de skulptaĵoj vivece prezentas la eniron de Princino Wencheng en Tibeton. Tiu serio vivece montris, kiel la princino adiaŭis la imperiestran palacon de Chang'an, la ĉefurbo de Tang-dinastio, kiel ŝi preterpasis Riyue-monton kaj kiel Sunzamkampo, la reganto de Tibeto, bonvenigis ŝin ĉe la fonto de Huanghe (la Flava Rivero) kaj akompanis ŝin en reveno al la Potala-palaco, kaj aliajn du historiajn fragmentojn kun pli ol 200 homoj. Apud mi staris kelkaj maljunaj tibetanoj. Rememorante la historion de la nacia unuiĝo en la pasinteco, ili senĉese admiras la statuojn de la brava Sunzamkampo kaj bela princino Wencheng.

Ĝuste tiam bruo de tamburado tiklis niajn orelojn. Ekstere de la halo, antaŭenmarŝas

*Granda Tegment-orumita Halo de Tar-temple*



solena gvardio formita el dekoj da lamaoj en helflavaj stoloj, portantaj incensujon, rubandflagojn, sceprojn, trumpetojn kaj aliajn religiajn instrumentojn, sekvataj de ĉ. mil lamaoj kaj budhistoj ŝultre portantaj la broditan portreton de Ŝakjamunio 50 m. longan kaj 30 m. larĝan. Gvidate de unu viva budho, ili ĉirkaŭiris la templon kaj post ili sekvis dekmiloj da adeptoj murmurantaj sutron. Jen ceremonio por celebri la datrevenon de la naskiĝo de Ŝakjamunio kaj ankaŭ kulmino de la granda junia foiro de Tar-templo.

En la tago antaŭ nia veno okazis ceremonio por sunumi la grandan broditan portreton de budho. Tiam lamaoj sternis la portreton de la montpinto malantaŭ la templo ĝis la monttallo por ke la budhismaj adeptoj respektu rigardu la portreton en la datreveno de la naskiĝo de la budho.

Ĉiujare en la unua, kvara, sesa kaj naŭa monatoj laŭ luna kalendaro, Tar-templo okazigas grandskalan foiron po unu fojo, dum kiu la templo faris religian aktivadon kaj ĝi ankaŭ estas bona ŝanco de negoco por diversaj nacioj. La sesa monato estas tempo por tondi ŝafon. En tiu hela tempo, kiam disfloras diversaj floroj sur la stepo, paŝtistoj ofte venas ĉi tien por respektu viziti la templon, vendi siajn produktajn de brutobredado alportitajn per gruntoj kaj aĉeti siajn bezonaĵojn. Tiam la placo antaŭ la templo estas plena de standoj de ornamaĵoj, ĉapeloj, tibetaj glavoj, bovloj kun desegno de drakoj, lanaj tapiŝoj k.a. Tie tibetaj, mongolaj kaj tu-aj paŝtistoj ĝoje elektas por si objektojn.

## MATERIALO

# Qinghai-provinco


La provinco situas sur la Qinghai-Tibeta Altebenajo en la okcidenta parto de Ĉinio, kaj ĝi akiris la nomon pro tio, ke en la provinco troviĝas la lago Qinghai. Ĝi havas areon de pli ol 720,000 kvadrataj kilometroj kaj 2,140,000 loĝantojn inkluzive de hanoj, tibetanoj, huj-oj, tu-oj, sala-oj, mongoloj, kazaĥoj kaj aliaj naciecoj. Ĝia ĉefurbo estas Xining.

La situo de la provinco superas 3,000 metrojn super la marnivelo kaj ĝia granda parto estas en la altebenajo. Laŭ la topografio ĝi povas dividiĝi en tri regionojn: 1, Qilian- kaj Altun-montregiono. Ĝi situas super 4,000 metroj super la marnivelo. La valoj de Huanghe (Flava Rivero) kaj Huangshui-rivero kun alteco de 2,000 metroj super la marnivelo en la orienta parto de la montregiono estas ĝia ĉefa agrikultura regiono. La baseno de Qinghai-lago estas ebenaĵo formita el aluvio kaj taŭga por terkulturado kaj paŝtado. 2, Qaidam-baseno kun areo de ĉ. 200,000 kvadrataj kilometroj. Ĝi situas en la nordokcidenta parto de la provinco kaj havas multajn sallagojn kaj mar-

ĉejoj. 3, La altebenajo de la suda Qinghai-provinco kun alteco de 4,500-5,000 metroj super la marnivelo. Ĝi konsistigas pli ol 50% de la areo de la tuta provinco. Tie troviĝas Bayanhar-montaro kiu apartigas unu de la alia la du plej longajn riverojn Changjiang (Jangzi-rivero) kaj Huanghe de Ĉinio. Ĉe la bordoj de riveroj kaj lagoj sur la altebenajo kreskas grasaj herboj. Tiu loko tre taŭgas por paŝtado.

La klimato de la granda parto de Qinghai-provinco estas seka kaj frosta, la sunbrila tempo estas longa kaj la diferenco de taga kaj nokta temperaturo estas granda. En la plej frosta januaro ĝia meznombrata temperaturo estas 8° C sub la nulo; en la plej varma julio ĝia meznombrata temperaturo estas inter 0° — 20° C.

La provinco havas vastajn regionojn por paŝtado kaj estas unu el la gravaj lan-produktejoj de Ĉinio. Tre abundaj estas ĝiaj mineraloj kiel petrolo, natura gaso, kalia salo, salo, neferaj metaloj, karbo, fero, asbesto k. a.



La Ombrita loko estas Qinghai-provinco.

# *Neforgesebla renkontiĝo de*

## *japanaj kaj ĉinaj esperantistoj*



*La vizitgrupo en la Somera Palaco*

**L**A 12-membra Amikeca Vizitgrupo al Ĉinio de JEI estrata de s-ino Isobe Yukiko venis al Ĉinio je la 17-a de oktobro de 1980. Dum la restado en Beijing (Pekino) ĝi vizitis la Someran Palacon, la parkon Ĉiela Altaro, la Imperiestran Palacon kaj la Grandan Muron. Kvankam granda parto de la membroj havas 60-70 jarojn, tamen ili sin montris viglaj kaj energiplenaj.

En la tekunsido aranĝita de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la prepara grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo por bonvenigi la vizitgrupon de JEI, la mastroj kaj gastoj interŝanĝis donacojn kaj sin amuzis per programeroj. La kunsidon ĉeestis fama ĉina blinda esperantisto Huang Nai kaj tio multe kortuŝis la japanajn amikojn. Poste la japanaj gastoj vizitis la Beijing-an Lingvan Instituton, kie ili estis varme akceptataj de la instruisto kaj lernantoj de la Esperanta kurso.

Je la 21-a de oktobro la japanaj samideanoj atingis la urbon Wuhan (Vuhan). En la bonveniga kunveno okazigita de la Hubei-a kaj

Wuhan-a Esperanto-Asocioj, s-ino Isobe faris paroladon, en kiu ŝi rememoris la amikecon inter Ĉinio kaj Japanio kaj intimajn rilatojn de esperantistoj de ambaŭ landoj. Ŝi diris, ke kunlaboro de la japanaj kaj ĉinaj esperantistoj utilas ne nur al la Esperanta movado de ambaŭ landoj, al tiu de Azio kaj la tuta mondo, sed ankaŭ al la monda paco. Membro de la vizitgrupo d-ro Fukuhara Masuo diris sian opinion pri mobilizo de matematikistoj de diversaj landoj al lerno kaj uzo de Esperanto. En la kunveno Wuhan-aj junuloj prezentis programe-rojn.

En la urbo Shanghai (Ŝanhajo) la vizitgrupo de JEI vizitis la Geknaban Domon de Hongkou-kvartalo kaj malnovan loĝdomon de la forpasinta fama japana esperantistino Verda Majo. Ĝi vizitis ankaŭ la Orient-Ĉinian Normalan Universitaton kaj estis varme bonvenigitaj de ĝiaj instruistoj kaj studentoj. La prepara grupo de la Shanghai-a Esperanto-Asocio okazigis bonvenigan kunsidon en la Orient-Ĉinia Tekstila Instituto kaj

en la kunsido membro de la vizitgrupo s-ro Imai Masaki deklamis siajn Esperantajn versojn nove verkitajn.

Ĝardenoj de la urbo Suzhou (Suĝou) multe plezurigis la japanajn amikojn. Ili ekskursis al la famaj ĝardenoj Leona Bosko kaj Zhuozhengyuan kaj al la pitoreskaj Tigra Monto kaj Hanshan-templo. La ŝtonplato kun la skribo "Nokta ankrado ĉe Feng-ponto" en la templo multe interesis la japanajn amikojn kaj ili sin fotis antaŭ ĝi por memoro. Ili ankaŭ ascendis la turon de la templo por bati ĝian sonorilon. Kaj la sonoro tre gajigis la japanajn amikojn. En la vespera kunveno aranĝita de la Suzhou-a Esperanto-grupo la ĉinaj kaj japanaj samideanoj sin banis en varma atmosfero. S-ro Matubara Katahika prezentis jongladon kaj s-ro Monma Yutaro deklamis en la ĉina lingvo poemon de Zhang Ji de Tang-dinastio pri Hanshan-templo.

La 29-an de oktobro la vizitgrupo forlasis Shanghai por hejmenreveno.





## *Nealiancigitaj—ŝanco por Esperanto* *Esperanto—ŝanco por nealiancigitaj*



*La aŭtoro Tibor Sekelj*

**P**OST la plene malsukcesinta “subskriba kampanjo” antaŭ Unesko, UEA kaj aliaj kompetentaj organizaĵoj faras valorajn klopodojn antaŭ UNO, Organizo de Amerikaj Ŝtatoj, Unuiĝo de Afrikaj Ŝtatoj, Eŭropa Ekonomia Konsilantaro, ĉe ne-registaraj organizaĵoj ktp., kun pli aŭ malpli da perspektivo, kun pli aŭ malpli justigita espero je sukceso.

Inter la multaj eblecoj— aŭ maleblecoj— antaŭ kiuj Esperanto staras, ŝajnas al mi ke ĝis nun ni preterlasis organizaĵon kiu prezentas unikan ŝancon por nia strebado en la nuna evolustato de la homa socio. Temas pri la Movado de Nealiancigitaj Landoj. Mi parolas pri grupo de 105

landoj— kun du trionoj de voĉoj en la Unuiĝintaj Nacioj— kiuj, kvankam malsamaj laŭ interna sociordo kaj kelkaj aliaj karakterizoj, decidis ne alianciĝi al iu el la grandaj politikaj-armeaj blokoj, strebas al plena sendependeco de ĉiu lando de eksteraj fortoj, pledas por ke ĉiu lando sola difinu sian irotan vojon, kaj insiste neas la rajton de iu nacio, granda aŭ malgranda, enmiksiĝi en la internajn aferojn de alia lando.

Tiucele la ŝtatoj partoprenantoj en la Movado de Nealiancigitaj Landoj dum la lastaj du jardekoj organizis kunvenojn de ŝtatestroj, de ministroj kaj de laborgrupoj sur plej diversaj niveloj. Kaj tiaj kunvenoj fariĝas pli kaj pli oftaj.

Estas evidente kaj kompreneble ke tiuj kunvenoj baraktas kun la samaj lingvaj problemoj kiel UNO, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj. Do, kio speciala pri Movado de Nealiancigitaj Landoj (MNL)?

Speciala estas la fakto, ke al neniu el la partoprenantaj landoj estas gepatra lingvo la angla aŭ la franca, tamen iliaj reprezentantoj dum la kunvenoj komunikiĝas ĉefe en tiuj lingvoj, uzante apude ankaŭ la nacian lingvon de la momenta parolanto, komplikante tiel la

tradukadon kaj plialtigante la jam grandajn kostojn al la partoprenantoj— plejparte malriĉaj— ŝtatoj. Sed ankoraŭ io alia. Grandnombro de la partoprenantoj ŝtatoj antaŭ ne longe sendependiĝis de la kolonia reĝimo franca aŭ brita, kaj la kulpon pro sia malprogreso kaj malriĉeco ĵetas sur la ekspluatadon flanke de la antaŭa kolonia mastro. Kaj ĉar ĉio ligitata al tiu kolonia epoko estas malbona, ankaŭ la lingvo altrudita de la ekskolonia mastro estas malbena kiu ankoraŭ pezas sur tiuj landoj. Ne apartenas al tiu ĉi artikolo ekzameni la gradon de vereco de tiuj ĉi asertoj kaj justigeblo de tiaj sentoj.

Kompreneble, ni ne devas forgesi ankaŭ la faktoron, kiu iel ŝajnas kontraŭdiri, kaj efektive kreas realan reziston, al la supra ideo. La plejmulto de la altranguloj el la ekskoloniaj landoj, kiuj bone konas la koncernan eŭropan lingvon, per kiu ili povas “digne reprezenti” la landon en la internaciaj kunvenoj, ne estus volontaj rezigni sian privilegion. Sekve ĉe multaj reprezentantoj en tiaj kunvenoj, aŭ eĉ en la registaroj de tiuj landoj, ekzistas apriora, neeldirita kaj neeldirebla rezisto kontraŭ ŝanĝo en la nuna lingva panoramo. Tiu ĉi sento estas sendube obstaklo pri kiu oni devas kalkuli.

Transirante de lingvaj konsideroj al "pli esencaj", ni devas konstati ke la agado de MNL evoluas laŭ etapo. La unua etapo de ĝia aktivado estis la strebado al politika sendependeco por ĉiuj landoj de la mondo. Se ne tute, almenaŭ parte, al tia strebado ŝuldiĝas la sendependiĝo de pluraj landoj desub la kolonia regado dum la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj. Tiu proceso de "dekoloniigo" alproksimiĝas al sia sukcesa fino.

La dua etapo de la agado de MNL koncernas la akiron de ekonomia sendependeco por ĉiuj popoloj de la mondo. La iniciato por kreo de nova ekonomia ordo estis lanĉita dum la kunveno de ŝtatestroj de nealiancigitaj landoj en Kolombo, 1976, iniciato kiun poste transprenis UNO. Temas pri vastaj kaj profundaj ŝanĝoj en la nuna ekonomia sistemo reganta en la mondo, do la proceso estos longa kaj komplika. Tamen, la ideo ekmarŝis kaj ĝi sekvas sian vojon.

La tria etapo de agado de la Movado de Nealiancigitaj Landoj estos strebado por kultura sendependeco de ĉiuj landoj. Kvankam tiu etapo ankoraŭ ne estas anoncita oficiale en la planoj de MNL, jam estas entreprenitaj paŝoj en diversaj direktoj, formantaj koheran parton de tia strebado. Unu el tiuj paŝoj estas la organizado de ĵurnalista kunagado de nealiancigitaj landoj, por ke ili liberiĝu de la ĉionpovaj ĵurnalagentejoj de kelkaj grandaj landoj, kaj akiru la rajton kaj la praktikan eblon esti sendependaj interpretistoj kaj distribuantoj de novaĵoj pri si mem. Alia ero estas la konferenco kiu pritraktis kaj ekfunkciigis kunlaboron de televido de diversaj nealiancigitaj landoj. Tiu kunla-

boro, same kiel la ĵurnalista, kompreneble, devas esti plue evoluigita dum la venontaj jaroj.

Espereble pli ampleksa kaj multflanka liberiĝo sur la kampo de kulturo estos planita dum la proksima estonto, kaj tian planon por la etapo de kultura sendependiĝo oni verŝajne anoncos en unu el la proksimaj kunvenoj de ŝtatestroj. Kaj ni ne povas imagi tian planadon de multflanka kaj multaspekta kultura liberiĝo kaj kunagado de centoj da landoj, sen komuna lingvo.

La multlingveco ne alkondukas al intensa kultura kunlaboro de popoloj. Oni do devas pripensi la elekton de unu lingvo. Inter la angla kaj la franca ekistos rivaleco nesolvebla. Krome estos facile vidigi al ĉiuj, ke iu ajn el tiuj solvoj, aŭ eĉ la alpreno de ambaŭ, estas humiliga por la tuto de la movado, kaj ne kondukas al kultura sendependeco. La alpreno de la nacia lingvo de unu el la popoloj apartenantaj al MNL estos same tiel humiliga por ĉiuj aliaj.

Restas la nura ebleco alpreni iun neŭtralan, nenies lingvon, kaj la nealiancigitaj landoj devus krei apartan komisionon de saĝuloj kiu dum multaj jaroj da penaj klopodoj devus krei tian lingvon . . . se ĝi ne ekzistus jam.

Feliĉe ĝi ekzistas ĝuste tia: neŭtrala, elprovita kaj uzopreta. Tiel ni povas diri sen troigo ke Esperanto estas unika ŝanco por la Movado de Nealiancigitaj Landoj por povi lanĉi plene la trian etapon de sia agado: strebon al la kultura sendependiĝo. Tiu ĉi pensmaniero ŝajnas al mi tre logika, kaj verŝajne konsentos kun

mi la plejmulto de la legantoj. Kompreneble aperos sennombraj nevideblaj kaj neimageblaj obstakloj, tamen se oni povos ilin venki, la Movado de Nealiancigitaj Landoj povos esti unika ŝanco por Esperanto.

Por ke tio povu okazi, antaŭ ĉio ĉiu paŝo de la irota vojo devas esti adekvate priplanita kaj, se ĉiu ero de la plano sukcesas, laŭ mia opinio, la Movado de Nealiancigitaj Landoj povas doni la definitivan solvon al la monda lingvoproblemo.

Ĉar se MNL adoptas Esperanton kiel sian oficialan lingvon de interkomunikado kaj ĝin praktike uzos, tiun uzon ili baldaŭ transplantos al la Unuiĝintaj Nacioj. Se en centoj da landoj Esperanto estas instruata en lernejoj kaj uzata en ĉiuj internaciaj rilatoj, tiu "infekta sano" kompreneble vastiĝos nehaltigeble, kiel arbora fajro, ankaŭ trans iliaj limoj.

Antaŭ ĉio, la proponon al MNL devas fari nek unuopa E-isto nek E-ista organizaĵo. La proponon devas, por ke ĝi havu efikon, fari unu el la membroŝtatoj de MNL mem. Sed kiu? Feliĉe ekzistas inter ili unu tia lando, en kiu ne nur ĉiu klera persono estas informita pri Esperanto, sed certa nombro de ĝiaj gvidantoj mem lernis la lingvon kaj bone konas ĝian idearon kaj praktikan signifon. Eble tiu lando prenos sur sin la riskon iniciati la adopton de komuna interkomprenilo. La E-ista organizaĵo de tiu lando tamen devas prezenti al sia registaro konvenan perspektivan planon kun ŝancoj de sukceso. Se tiel, la propono povus okazi eble dum la proksima kunveno de ŝtatestroj, en Bagdad, 1983.

# Antaŭparolo al la Kvara Eldono de la Plena Gramatiko de Esperanto

*Estas tute senbezone fari al niaj legantoj superfluan prezenton pri prof. G. Waringhien, kiu prezidatis la Akademion de Esperanto kaj tiel multe kontribuis al la E-movado per siaj altvaloraj verkoj originalaj kaj tradukitaj, beletraj kaj lingvosciencaj. Lian nomon vi ja tiel ofte renkontas en la gazetaro. Tamen estas notinde por nia revuo, ke unuafoje lia artikolo aperas en EPĈ laŭ lia propono farita en lia jena letero al Ye Junjian (Cicio Mar):*

*“Vi tre afable petis min hieraŭ pri mia eventuala kunlaboro al via ŝatata revuo — sed mi avertis vin, ke tion mi povos fari nur post iu tempo, ĉar mi nun pretigas la redaktaĵojn por la 5-a volumo de miaj ‘Eseoj’.*

*“Intertempe, vi povus, se tio plaĉus al vi, publikigi en via Revuo tuton aŭ parton el la ‘Antaŭparolo’ (al la 4-a eldono) de la Plena Analiza Gramatiko, kiun via ĉina asocio nun estas presanta. Samajn antaŭpublikaĵojn kutime faris ‘Literatura Mondo’ pri siaj eldonaĵoj. Tiamaniere vi samtempe povus informi vialandan publikon pri la apero de tiu verko laŭ specialaj kondiĉoj por la interna merkato.”*

*Trovinte lian afablan proponon tre bonvena kaj danke ĝin akceptinte, ni aperigas la plenan tekston de la artikolo.*



G. Waringhien

— La Red.

Sed antaŭ tio, se la plano estas akceptita flanke de la ŝtato-proponanto, vasta skriba kaj buŝa informa kampanjo pri Esperanto devas okazi en ĉiuj koncernaj landoj, tiel ke la propono ne estu surprizo sed bonvena, jam atendita novaĵo, de ĉiuj akceptebla. En tiu kampanjo la monda E-istaro povas fari grandan servon al MNL kaj al la monda lingva kaoso.

Dum la sekvanta trijara periodo en ĉiuj koncernaj landoj devas okazi kursoj por ĉiuj par-

toprenontoj en iu ajn internacia kunveno: politika, scienca, komerca, kultura, sporta. Samtempe oni kapabligas certan nombron da instruistoj en ĉiu lando por instrui la lingvon en lernejoj.

Kiel sekvo, en 1986 la uzo de Esperanto jam estus permesata en la kunveno de ŝtatestroj kaj en aliaj kunvenoj kiel aldona lingvo.

Post plua trijara intensa instruado, en 1989 la Internacia

Lingvo jam povus fariĝi egalrajta tria lingvo, dum unu aŭ du trijaraj periodoj, por fine, eble en 1995 ekregi kiel sola oficiala lingvo por ĉiuj internaciaj kontaktoj. En tiu tempo jam ĝi estus sufiĉe vaste konata en la landoj de MNL, ke ili povos uzi ĝin por ĉiuj celoj, inkluzive interŝanĝo de televidaj programoj kaj aliaj kulturprogramoj.

Eble iu diros “utopio”! Momente mi nomu ĝin dezirplena pripensado. Alian nomon alkroĉu al ĝi la estonteco.

## Iniciato de Jugoslavia Esperanto-Ligo

*Antaŭ nelonge, ni ricevis leteron de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiu iniciatis starigon de kunlaboro inter Esperanto-organizaĵoj kaj opaj esperantistoj de landoj nealiancigitaj, landoj-observantoj kaj evolulandoj kunlaborantaj kun ili. Ni plene subtenas tiun iniciaton kaj volonte aperigas la ĉefan parton de la letero kiel jene:*

La Red.

Konforme al interkonsentoj de la nealiancigitaj landoj pri internacia paca kaj egalrajta kunlaboro, ni geesperantistoj de Jugoslavio, kunfondinto kaj aktiva membro de la nealiancigita movado, iniciatas per tiu ĉi letero starigon de kunlaboro an-

kaŭ inter Esperanto-organizaĵoj kaj opaj esperantistoj (kie ne ankoraŭ ekzistas Esperanto-organizaĵoj) de la landoj nealiancigitaj, landoj-observantoj kaj evolulandoj kunlaborantaj kun ili por pli bona mondo.

Ĉar Esperanto jam montris la

tutan efikecon kaj utilecon de neŭtrala internacia lingvo, ni forigos per ĝia aplikado lingvan diskriminacion kaj plifaciligos senperan interkompreniĝon kaj interŝanĝon de spertoj sur kampoj de klerigo, kulturo kaj scienco.



Tiu ĉi antaŭparolo estas subskribita, ho ve, de unu sola nomo: la malapero de mia verkofrato sentigas al mi, pli ol iam, kiom mi ŝuldis al lia genio kaj kiom pezas sur miaj ŝultroj la restanta tasko.

Dudek jaroj forpasis, de kiam ni kune redaktis la trian eldonon, kaj eĉ tiu restis nekompleta: la subita morto de nia amiko Stefano La Colla, kiu iniciatis tiun reeldonon, faris, ke la tria parto, pri la vortfarado, kvankam kompostita, ne povis aperi libroforme. La unuaj du kajeroj cetere rapide elvendiĝis, kaj la verko jam de longe ne plu estas akirebla. Granda estas la merito de la Estraro de U.E.A., ke ĝi entreprenis, en la nunaj malfacilaj cirkonstancoj, la publikigadon de jena kvara eldono.

Dum tiuj dudek jaroj okazis revolucio en la lingvistiko, mi diru pli ĝuste revolucion, ĉar, se la fundamenta ambicio de ĉiuj skoloj estas fari el ĝi rigore ekzaktan sciencon, esprimeblan per algebraĵoj, diversaj sistemoj ne ĉesis sekvi kaj kritiki unu la alian, la *strukturismo* de Trubetzkio, la *glosematiko* de Hjelm-slev, la *distribucionalismo* de Fries, la *generativismo* de Chomsky ktp. Kaj la nomenklaturaj, postulataj por "diskrete" elnombri ĉiun fenomenon, fariĝis ne nur pli detalegaj (mi citu nur la svarmantan tribon de la em-nomoj: *pleremo*, *alosemo*, *kategoremo*, *grafemo*, *prosodemo*, *asilabemo* ktp., ktp.) sed ankaŭ pli kaj pli diverĝaj laŭ la aŭtoroj (kio estas *morfemo* ĉe Jakobson estas *monemo* ĉe Martinet ktp.), tiel ke Benveniste povis skribi jam en 1954, ke "iaj diskutoj estas kompreneblaj por la adeptoj de unu metodo, nur se ili estas transponitaj en ties propran nomenklaturon." Estas certe tute normale, ke lingvistoj provu apliki sian metodon al nia lingvo (kvankam mi persone havas la intiman konvinkon, ke estas neeble redukti al aŭtomataj transponformuloj la senliman kreivecon de la homa spirito, same kiel procedaroj, eĉ elektronaj, neniam elĉerpos la fekundecon de la homa arto). Sed la

legantoj, kiuj havis la paciencon legi niajn unuajn tri antaŭparolojn, jam konstatis, ke la celo de nia verko neniam estis la starigo de ia ajn teorio, kaj ke nia tuta ambicio estis meti en la manojn de la Esperanto-parolantoj oportunan rimedon malkovri, kia estas la tradicia, klasika uzado pri ĉiuj punktoj de nia lingvo (\*), kaj per kiaj tendencoj efektive esprimiĝas tiu "spirito de la lingvo", aludita de Zamenhof en lia letero al Borovko, kaj difinita kiel modelo de stilo en la "Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo". La kunekzistado (ne ĉiam paca!) de pluraj lingvistikaj sistemoj unuflanke, kaj, aliflanke, la zorgo pri la utiligebleco de nia verko por ĉia publiko, klarigas, kial ni decidis konservi nian prezentmanieron kaj terminologion, kiun ni cetere rafinis laŭ la postuloj de la analizo, distingante ekzemple la subjunkciojn disde la konjunkcioj, la prediktajn tempojn apud la preteritaj, kaj, kelke tridek jarojn antaŭ Chomsky, sintakson de la vortokerno aparte de la sintakso pri la pozicio kaj pri la frazo.

Dum tiu sama tempospaco multaj estis la konsiderindaj esploroj pri la gramatiko de nia lingvo; interalie la demando pri la uzado de la pasivaj participoj estis studita en la "Simpozio pri ata/ita" (Stafeto, 1961), kaj la tuta demando pri la uzado de la tempoj en la "Vojaĝo inter la tempoj" de K. Kalocsay (Stafeto, 1966), dum R. Schwartz briligis sian klarecon de "ne-lingvisto" en la broŝuro "Ne kiel Meier!" (Franca Esperanto-Instituto, 1967) kaj en eseo "Kompleta Inventaro de la pasivaj participoj en la verko *La Rabistoj*" (Aktoj de la Akademio II, 1974): el ĉio tio mi penis eltiri la esencon, kaj enkorpiĝi ĝin en la koncernajn ĉapitrojn.

Male, pri aliaj problemoj, pri kiuj mi ne havis la okazon aŭ la eblon diskuti kun Kalocsay, mi restis tre singarda, ne volante meti sub lian nomon opiniojn, kiujn li estus povinta ne partopreni. En la multaj lokoj, en kiuj mi trovis utila

esprimi mian propran vidpunkton, mi ĉiam aldonis en la fino miajn inicialojn: G.W.

Jen do la lasta formo de tiu verko de intima kunlaborado, komencita en 1934 laŭ la instigo de Vilmos Bleier, nia neforgesinda eldonisto; en ĝin ni metis la resumon de niaj konstantaj esploroj pri la lingvo de Zamenhof, Grabowski, Kabe kaj aliaj plej famaj aŭtoroj, kaj la plej bonan el nia sperto de tradukistoj. Je ĉiu reeldono ĝi vekis kritikojn, ofte pasiajn, sed entute ĝi estis ŝatata kaj uzata de la plimulto. Mi rajtas diri, ke, malgraŭ la neeviteblaj mankoj, ĝi efike kontribuis, kaj — mi esperas — kontribuos plu, same kiel la "Plena Ilustrita Vortaro" sur alia tereno, al la stabiligo kaj unuecigo de nia lingvo, nenion deprenante de ĝia fleksebleco. Kian pli altan celon povis proponi al si la du aŭtoroj, kaj kian pli prudentan deziron ili povus esprimi je ĉi tiu adiaŭa momento, ol ke tiun saman celon neniam forgesu tiuj, kiuj pli aŭ malpli baldaŭ venos ilin anstataŭi?

Vitry-sur-Seine, 1977.

— G. WARINGHIEN

P.S. 1a. Mi dankas la korespondantojn, kiuj bonvolis komuniki al mi siajn rimarkigojn! du almenaŭ mi volas nomi, pri ilia detala esplorado de la P.G., s-rojn F. Couwenberg kaj L. Lentaigne.

P.S. 2a. La legantoj, kiuj bedaŭros nian decidon ne adopti, en ĉi tiu esence pedagogia verko, la metodojn de la novaj lingvistoj, konsolu sin per jena konfeso de la plej eminenta el ili: "Sincere, mi estas sufiĉe skeptika pri la valoro, por la lingvo-instruado, de tiaj subtilecoj kaj sagaco, kiajn oni akiris en lingvistiko kaj psikologio." (Noam Chomsky, "Linguistic Theory", en "Northeast Conference on Research and Language Learning", 1966)

(\*) Tion ni volis akcenti per la enmeto de "analiza" en la antaŭan titolon.

## Esperanto kaj la ĉina literaturo

**Ĉ**INIO havas longan historion kaj brilan kulturon, kaj en la historio ekzistis multaj famaj literaturistoj, artistoj kaj multaj elstaraj verkoj, kiuj enskribis brilajn paĝojn en la historion de la monda literaturo.

### VERKOJ DE LUSIN KAJ GUO MORUO EN ESPERANTO

Lusin kaj Guo Moruo estis fame konataj modernaj literaturistoj de Ĉinio. Ili donis simpatian kaj subtenon al Esperanto kaj ĝuis altan respekton de la ĉinaj esperantistoj. Kaj nature iliaj verkoj estis unue tradukitaj en Esperanton. Frue en 1930 la novelo "La Vera Historio de Ah-Q" de Lusin estis esperantigita. En 1939 la redakcioj de "Voĉoj el Oriento" kaj "Orienta Kuriero" redaktis kaj eldonis en kunlaboro "Elektitaj Noveloj de Lusin", kiu entenas "La Taglibro de Frenezulo", "Medikamento", "La Morgaŭno", "Naskiĝloko", "La Publika" kaj aliajn ses novelojn. Ĝia apero estas frukto de kunlaboro de esperantistoj de Ĉinio, Hungario kaj Koreio. Dum la tempo de 1937 ĝis 1947 Venlo Fon esperantigis "Kong Jigi" kaj "Morto", kiuj estis publikigitaj en "Literatura Mondo".

En 1927 la dramo "Ŭan Ĉaŭ Ĉun" de Guo Moruo estis tradukita en Esperanton. En 1935 S.

J. Zee tradukis kvar poemojn el "Diino" de Guo Moruo (Luma Maro, Vespera Promeno, Himno al Suno kaj Noktokanto de Mizantropo) kaj aliajn tri poemojn en prozo, kiuj estis publikigitaj en la gazeto "La Mondo". Memore al la 25-a datreveno de verkado de Guo Moruo, en 1941, la redakcio de "Heroldo de Ĉinio" speciale eldonis kolekton de liaj verkoj por prezenti parton de liaj poemoj kaj prozoj kaj lian dramon "Ŭan Ĉaŭ Ĉun" al diverslandaj legantoj.

### DISKONIGADO DE LITERATURO PRI LA KONTRAŬJAPANA REZISTMILITO

Por rezisti kontraŭ la japanaj agresantoj, la ĉinaj esperantistoj sin ĵetis en la nacisavan movadon. Kun Esperanto kiel batalilo ili senlace faris korespondon kaj propagandon kaj aperigis multajn literaturaĵojn pri la rezistmilito en la gazetoj "La Mondo", "Voĉoj el Oriento", "Heroldo de Ĉinio" k.a. Ili tradukis kaj eldonis "Kantono sub Bombardo" k.a. Krome ili esperantigis ankaŭ la novelojn "Nova Vivo", "Reveno" kaj novelaron "Nova Tasko". Tiuj verkoj vidigis la mallumon kaj mizeron de la malnova Ĉinio, malkaŝis la kruelaĵojn de la japanaj agresantoj kaj prikantis la bravan batalon de la ĉina popolo.

### DISKONIGADO DE LITERATURO KAJ ARTO DE LA NOVA ĈINIO

Post la Liberiĝo de Ĉinio la ĉinaj esperantistoj daŭrigis siajn tradukadon kaj eldonadon de literaturaj kaj artaj verkoj. En la pasintaj 30 jaroj post la fondiĝo de "El Popola Ĉinio" en majo de 1950, ĝi publikigis pli ol 400 verkojn, inter kiuj troviĝas noveloj, prozoj, poemoj kaj dramoj. Samtempe la gazeto aperigis multajn artikolojn kaj fotojn, kiuj konigis la ĉinajn operon, filmon, muzikon, dancan, belarton, fotografion, ksilografion, brodadon, papertranĉadon k.a.

Estas menciinde, ke prezentante la ĉinan literaturon kaj arton la gazeto publikigis pli ol 100 verkojn de pli ol 50 modernaj verkistoj, kies plejparto estas farita post la Liberiĝo. Inter tiuj famaj verkistoj estas Lusin, Guo Moruo, Mao Dun, Zhao Shuli, Tian Han, Lao She, Zang Kejia, Ai Qing, Guo Xiaochuan, Bing Xin, Cao Yu, Liu Baiyu, Zhang Tianyi, Yang Shuo k.a. La gazeto aperigis ankaŭ ĉapitrojn de la romanoj "Kanto de la Juneco" de Yang Mo kaj "Kanto de Ouyang Hai" de Jin Jingmai kaj la tutan mezlongan romanon "Edziĝo de Erheĵjo" de Zhao Shuli. En 1980 aperis en la gazeto parto de "Meznokto" de

Mao Dun. Krom tio ĝi ankaŭ prezentis parton de la elstaraj filmoj, operoj, kantoj, dancoj, fotografiaj verkoj de diversaj periodoj post 1949. Tiel la legantoj ne nur havis ĝeneralan konon pri fruktoj de la literaturo kaj arto de Ĉinio, sed ankaŭ profundiĝis en kono pri ĝiaj socio kaj popolo.

“El Popola Ĉinio” ankaŭ faris prezentadon de la ĉina klasika literaturo. Krom antikvaj fabeloj, legendoj kaj mitoj ĝi publikigis poemojn de famaj poetoj Cao Zhi, Li Bai, Du Fu, Wang Wei, Li He kaj Lu You kaj konigis elstarajn eseojn de la literaturaj majstroj Tao Yuanming, Liu Zongyuan kaj Ouyang Xiu. Kaj ĝi ankaŭ prezentis travivaĵojn kaj verkojn de la famaj Qing-dinastiaj verkistoj Cao Xueqin, Shi Nai’an kaj Pu Songling.

## REDAKTADO KAJ ELDONADO DE LITERATURAJ VERKOJ

Same kiel esperantistoj de aliaj landoj, la ĉinaj esperantistoj donis grandan atenton al redaktado de literaturaj verkoj. Komence de la 50-aj jaroj la esperantistoj de Shanghai (Ŝanhajo) tradukis kaj eldonis la poemojn en prozo “Sovaĝa Herbo” de Lusin. Post tio, la Fremdlingva Eldonejo aperigis la poemaron “La Plej Forta Voĉo de la Paco” kaj la novelaron “La Feliĉo”. En la jaro 1959 la Ĉina Esperanto-Ligo redaktis kaj eldonis la novelaron “Por Nova Afero Nova Maniero” kaj “Ĉina Antologio”. La antaŭa entenas 12 novelojn de Zhao Shuli, Sun Li, Ma Feng, Zhang Tianyi kaj aliaj kvin modernaj famaj verkistoj, kaj la lasta konsistas el elstaraj verkoj faritaj en la dek

jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio. En ĝi kolektiĝis 21 poemoj, 16 noveloj kaj 3 raportoj de Mao Zedong, Guo Moruo, Feng Zhi, Tian Jian, Li Ji, He Jingzhi, Wen Jie, Ai Wu, Li Zhun, Du Pengcheng kaj aliaj 21 verkistoj. Fama moderna verkisto Mao Dun skribis antaŭparolojn por la du libroj. De diversaj flankoj tiuj verkoj figure prezentis la vivon, laboron kaj spiritan fizionomion de la ĉina popolo. Kiel la unua enhavoriĉa verko eldonita en Esperanto, “Ĉina Antologio” ricevis altan takson de alilandaj esperantistoj.

En la 60-aj jaroj la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Fremdlingva Eldonejo publikigis “Noveloj de Lusin”, “Rakontoj pri Fantom-spitantoj” kaj la epopeon “Aŝma”. La pli poste

1. Ĉinaj literaturaj verkoj en Esperanto

2. Ĉinaj porinfanaj legendoj en Esperanto

3. Esperantigitaj verkoj de Lusin





aperigita "Noveloj de Lusin" inkluzivas 30 novelojn, je 19 pli multe ol tiu publikigita en 1939. Kaj cetere la nova eldono karakteriziĝas per fajneco de presado, bindado kaj ilustrado.

En "Rakontoj pri Fantomspitantoj" estas enmetitaj 35 rakontoj de 19 ĉinaj antikvaj verkistoj. Ili temas pri fantomoj. Ili havas malsimplajn intrigojn kaj lakonan lingvaĵon.

"Aŝma" estas sani-a legendo cirkulanta en Yunnan-provinco. Ĝi prikantas la belan sani-an knabinon Aŝma, kiu kun sia frato strebas al libereco kaj feliĉo batalante kontraŭ la feŭda forto. Laŭ peto de niaj legantoj, "Rakontoj pri Fantomspitantoj" kaj "Aŝma" estis represitaj antaŭ du jaroj.

En la 70-aj jaroj la Fremdlingva Eldonejo reeldonis "Noveloj de Lusin", kun aldono de kvar pecoj, ke ĉiuj noveloj de Lusin estis tradukitaj en Esperanton. En 1979 la eldonejo aperigis "Poemoj" de Mao Zedong. Krome ĝi eldonis la romanon "Vizito al Lernejo" de Guan Hua kaj la novelaron "Koloraj Nuboj" de Hao Ran.

Dum la periodo de la 50-aj ĝis la 70-aj jaroj la ĉinaj esperantistoj eldonis la albumojn "El Ĉina Fotografia Arto", "Modernaj Lignogravuraĵoj de Ĉinio", "Indigno de la Servutuloj", "Pentraĵoj de Ĉinaj Infanoj", "El Novaj Ĉinstilaj Pentraĵoj", "Pejzaĝo-lignogravuraĵoj", "Ĉinaj Metiartaĵoj" kaj dekojn da bildlibroj.

En 1980 la redakcio de "El Popola Ĉinio" eldonis la romanon "Aŭtuno en la Printempo" kaj "El Ĉina Poezio". La antaŭa estas elstara verko farita de Bakin en la 30-aj jaroj.

Ĉifoje li skribis antaŭparolon por ĝia Esperanta eldono por esprimi sian amon al Esperanto. La lasta estas poemaro, en kiu kolektiĝis 82 antikvaj kaj 25 modernaj poemoj. La tradukinto estas S. J. Zee, kiu komencis traduki ĉinajn antikvajn kaj modernajn poemojn frue en la 30-aj jaroj. Nemalmultaj el liaj tradukaĵoj aperis en "Literatura Mondo". En "El Ĉina Poezio" li donis vortojn pri la ĉina klasika poezio.

### SIGNIFOPLENA LABORO

Nun oni jam povas vidi, ke la laboro de diskonigado de la ĉina literaturo fare de la ĉinaj esperantistoj havas profundan signifon.

Unue, ĝi pluapaŝe riĉigis kaj disflorigis la Esperantan literaturon, ebligante al Esperanto ensorbi sukcon de la literaturaĵoj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Due, ĝi akcelis kulturalan interŝanĝon de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj profundigis ilian interkompreniĝon. "El Popola Ĉinio" atingis pli ol 60 landojn kaj regionojn, kaj iuj el ĝiaj artikoloj estis reaperigitaj en Esperanto-gazetoj de iuj lokoj, kaj aliaj tradukitaj en iujn naciajn lingvojn.

Nun la ĉinaj esperantistoj entreprenas tradukadon de "Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero" de Lusin kaj "La Kanto de la Juneco" de Yang Mo, kaj redaktadon de "Ĉinaj Modernaj Noveloj" kaj "Popolrakontoj de Ĉinaj Nacimalplimulto". Por akceli kulturalan interŝanĝon de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj pliriĉigi la Esperantan literaturon, ili aperigos en la 80-aj jaroj pli multajn kaj pli bonajn literaturajn verkojn.

SHI SIWEI:

## Triharuleto

**T**RIHARULETO ekaperis en la verko de fama ĉina karikaturisto Zhang Leping antaŭ 40 jaroj. La knabo de longe estas konata en Ĉinio. Kiam mi estis pli-ol-10-jara knabo, mi jam ekŝatis la bildlibron "Vagabondo, Triharuleto" verkitan de Zhang. Kaj nun, kiam mia filino ekvidis ĝin, ŝi tute absorbiĝis en legado. Lastatempe mi vizitis lin kaj vidis, ke li faras novan pentraĵon en sia laborĉambro. La pentraĵo montras, ke Triharuleto feste vestita, alte tenante la verdan stelon en unu mano kaj kun freŝaj floroj en la alia, ridetante salutas diverslandajn esperantistojn venintajn por viziti Ĉinion. La karikaturisto diris al mi, ke li unuafoje prenis Esperanton kiel temon por sia pentrado.

Li, 72-jara, estas vicprezidanto de la Shanghai-a Belartista Asocio. Dum dekoj da jaroj li ĉiam subtenis Esperantan laboron. Frue antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio li konatiĝis kun iuj esperantistoj sin okupantaj pri la progrese kultura laboro. Nun li ankoraŭ tenas rilatojn kun multaj ĉinaj esperantistoj. Li diris, ke Esperanto vere estas tre bona komunikilo kaj la mondaj popoloj kun malsamaj haŭtkoloroj povas per ĝi esprimi sentojn kaj plifirmigi amikecon. Pere de ĝi ili povas ankaŭ akceli interŝanĝon de sciencoj

# salutas esperantistojn ◀


kaj kulturo. Senila, li restas fervora amiko de Esperanto. Antaŭ nelonge mi informis lin, ke la Universala Esperanto-Asocio akceptis la Ĉinan Esperanto-Ligon kiel sian oficialan landan asocion. Li tre ĝojis pri tio kaj esprimis sian volon fari novan pentraĵon por ĝin dediĉi al la monda esperantistaro.

La supre menciita bildlibro priskribas la tragedion de la malriĉa Triharuleto en la malnova Ĉinio. La karikaturisto per sia peniko rigore akuzis la malracian soci-sistemon kaj vekis simpatian kaj atenton ĉe la publiko al tiu vagabondo-

knabo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio Triharuleto ekhavis novan vivon. Li vizitis lernejon kaj fariĝis mastro de la ŝtato. En la lastaj jaroj la maljuna karikaturisto verkis la bildserion "Triharuleto Amas Sciencojn", kiu esprimas la firmajn volojn de la ĉinaj knaboj efektiviĝi la modernigon de la patrolando kaj atingi la kulminon de sciencoj. Hodiaŭ Triharuleto kun granda ĝojo varme salutas diverslandajn esperantistojn venintajn por viziti Ĉinion. La karikaturisto humure diris: "Ankaŭ Triharuleto diligente lernas Esperanton. Li estas

esperantisteto." Efektive, en iuj lernejoj de Ĉinio fondiĝis postlecionaj Esperantaj studrondoj por geknaboj. En la proksima estonteco alilandaj esperantistoj povos trovi pli da ĉinaj samideanetoj.

Nun tiu nova verko prezentiĝas al niaj legantoj. La karikaturisto komisiis al mi donace transdoni ĝin al la japanaj esperantistoj, kiuj estis vizitontaj Shanghai en septembro de 1980. Kiam la 76-jara Tokuda Rokuro ricevis la donacon, li, en la nomo de la vizitgrupo de japanaj esperantistoj, esprimis koran dankon al la karikaturisto.



Fama ĉina karikaturisto Zhang Leping en pentrado

*Triharuleto salutas esperantistojn.*

de ZHANG LEPING



# Deklaracio de la 53-a SAT-Kongreso en Rijeka pri Lingva Politiko

*Jena deklaro farita en julio atingis nin malfrue, ke ni ne havis la eblecon ĝin aperigi en iu numero de nia revuo en 1980. Ni tamen ĝin prezentas al niaj legantoj ĉi tie, ke ili povu legi tiun valoran dokumenton.*

— La Redakcio

## Konsiderante la fakton,

- ke la situacio en la mondo, karakterizita de la danĝeraj perspektivoj de la blokpolitiko, de la konfronto inter la ekonomie forta nordo kaj la ekspluatata sudo, de la kreskanta premo de la transnaciaj societoj sur la labor- kaj vivkondiĉoj de la homoj, trudas ĝeneraligon de la internaciaj rilatoj;
- ke ĉiuj rimedoj ĝis nun uzataj por solvi la lingvan problemon, restis ne nur nesufiĉe efikaj, sed eĉ plikomplikis ĝin, pro foresto de demokrata alternativo kon-

traŭ la kultura imperiismo, esprimiĝanta esence per la lingva diskriminacio, kiu jam devigis la plej multajn popolojn rezigni pri siaj lingvoj en internaciaj rilatoj;

**La Kongreso proponas** al la laboristaro tutmonda, al ĉiuj ekspluatataj popoloj kaj al ĉiuj progresemaj fortoj en la mondo, alpreni jenan principan orientigon en apliko de lingva politiko en internaciaj rilatoj:

- en rilatoj inter la popoloj kaj ŝtatoj la demokrateco kaj egalrajteco devas esti res-

pektataj ankaŭ en la uzado de lingvoj;

- al neniu popolo oni rajtas trudi fremdan lingvon;

— respektata estu ĉiu genta lingvo kiel integra parto de genta identeco;

- en rilatoj inter la popoloj, neniu privilegio estu donata al iu ajn nacia lingvo, ĉar ĉiu privilegio naskas novajn sciajn diferencigojn en kultura, ekonomia kaj politika senco;

- opinias, ke lingvajn problemojn



## “Ĉinaj Vesperoj” en Schwelm

En kadro de prelegserio “Esperanto en radio”, la 20-an de februaro 1980 la Esperantosocieto de Schwelm en Germanio, kiu ekde 1966 ĉiumerkrede kunvenas en lerneja ĉambro, okazigis “Ĉinan vesperon”. Nia leganto Heinz Schindler aŭdigis sonbendon kun duonhora Esperantoprogramo de Radio Pekino pri turismo en Ĉinio kaj pri arbora pejzaĝo en meza Ĉinio. Per tio li pruvis, ke la elsendoj de Radio Pekino estas sufiĉe bone aŭdeblaj. Li petis la grupanojn, kiuj havas fortajn radioaparatojn, ke ili mem provu aŭskulti la elsendojn.

Poste li montris al la grupanoj la gazeton “El Popola Ĉinio” kaj rakontis pri la interesa enhavo. Speciale la bildoj de belaj pejzaĝoj kaj floroj, de dancistinoj en belegaj popolkostumoj kaj la bildoj pri la vivo de la popolo en la diversaj regionoj de Ĉinio tre plaĉis al la grupanoj. Krome la multflankaj

raportoj pri Ĉinio, pri Esperanto kaj aliaj interesaj temoj montris, kiel valora estas ĉi tiu gazeto por esperantistoj. Ankoraŭ longe oni parolis dum tiu vespero pri la granda malproksima lando kaj el la grupo venis la deziro, ke oni faru pluan, sed tute alian “Ĉinan Vesperon”.

*Esperanto-societo Schwelm dum grupvespero (meze sidas la aŭtoro)*





oni devas solvi laŭ la samaj principoj inter ĉiuj lingvaj hom-grupoj, inter la grandaj kaj malgrandaj popoloj, inter lingvaj plimulto kaj malplimulto. Tiuj samaj principoj validu ankaŭ en rilatoj inter la ŝtatoj same kiel inter la nacioj kaj naciaj malplimulto en multnaciaj ŝtatoj.

— proponas jenan solvon de la lingva problemo en rilatoj inter la popoloj:

— ĉiu principe rezignu uzi la propran nacian lingvon en rilatoj kun aliaj popoloj, kaj la Internacia Lingvo Esperanto, samgrade fremda kaj samgrade propra al ĉiu, fariĝu la dua lingvo por ĉiu kiel komuna lingvo por internacia uzo kaj esprimo de aparteno al la pli larĝa homa komuneco.

Merkredon, la 7-an de majo 1980, la Esperantosocieto unuafoje ne kunvenis en la lernejo, sed en la ĉina restoracio "Peking" en Schwelm. Tie oni mendis tipajn ĉinajn manĝaĵojn, ekzemple pecetoj de anaso kun fungoj, bambupintoj kaj migdaloj aŭ porkaĵo kun papriko, morkeloj kaj bambupintoj. Ne ĉiu uzis la kutimajn ĉinajn bastonetojn por manĝi, sed manĝis per tranĉilo kaj forko, sed ĉiuj laŭdis la bongustajn manĝaĵojn. Ankaŭ la mastro de la restoracio verŝajne estis kontenta, ĉar li donacis al la esperantistoj specialan ĉinan brandon. Dum tiu amuza vespero oni multe babilis pri vojaĝoj kaj travivaĵoj. Ĉar kelkaj el la grupo estas tre vojaĝemaj, la deziro iam viziti tiun interesan landon certe ne nur restos revo.

Inter la du ĉinaj vesperoj nia leganto en Schwelm varbis kvar novajn abonantojn por la gazeto "El Popola Ĉinio". Schwelm havas 33.000 enloĝantojn kaj situas 50 km. nordoriente de Köln.



### ESPERANTA SIMPOZIO DE HUBEI

En la fino de oktobro de la pasinta jaro la Hubei-a Esperanto-Asocio okazigis Esperantan Simpozion en la provinca ĉefurbo Wuhan. Krom esperantistoj de la provinco, ĝin ĉeestis ankaŭ esperantistoj de Beijing, Interna Mongolio, Heilongjiang, Shanxi, Hunan, Shanghai kaj Guizhou. La simpozio ricevis 22 disertaciojn, kiuj temas pri interlingvistiko kaj esperantologio, pri rilatoj inter Esperanto kaj aliaj lingvoj, pri la rilatoj inter Esperanto kaj la nova literaturo kaj reformado de ideogramoj de Ĉinio, kaj pri esperanta poezio, Esperanto-instruado por infanoj kaj la historio de Espmovado de Ĉinio. La ĉeestantoj opiniis la simpozion tre sukcesa kaj

esperas, ke oni faros pli multan studon pri Esperanto kaj oftigos tian aktivadon.

### FONDIGIS LA HUAINAN-A ESPERANTO-ASOCIO


En la 21-a de septembro de 1980 fondiĝis Esperanta asocio en Huainan, fama karboindustria urbo de la provinco Anhui. La kunveno de la fondiĝo ricevis gratulajn leterojn kaj telegramojn de Esperantaj organizoj kaj individuoj en kaj ekster la provinco. La konsilantaro de la asocio konsistas el Yang Haichun, Qi Minxiu kaj kelkaj aliaj kamaradoj. En la lasta unu jaro, Espmovado de la urbo estis subtenata de la Propaganda Departemento de la Urba Komitato de la Partio kaj la Urba Scienca kaj Teknika Asocio. La esperantistoj de la urbo establis kursojn, korespondajn kursojn kaj fondis revuon "Maroto" esperantan-ĉinan.

*Simpozio de la Hubei-a Esperanto-Asocio*



*Inaŭgura Kongreso de la Huainan-a Esperanto-Asocio*





*Parto de la Esp-grupanoj kaj Esp-kursanoj de la Orientĉinia Normala Universitato en Shanghai*

### ESPERANTAJ KURSOJ EN DU SUPERAJ LERNEJOJ

Ekde la 1-a de septembro de 1980 la fremdlingva fakultato de la Orient-ĉinia Normala Universitato en Shanghai ekprenis Esperanton kiel nedevigan kurson de studentoj. 15 studentoj de anglalingva kurso lernas en la kurso. La lernolibro estis kompilita de profesoro Pandišo, kaj la instruantoj estas Pandišo kaj Qian Minqi. Esperanta kurso fondiĝis ankaŭ en la fremdlingva fakultato de la Centra-ĉinia Normala Instituto en Wuhan. La lernolibro estis kompilita de juna instruisto Zhang Dancheng. La kurson instruas Zhang Dancheng kaj Cao Donghai.

Postlaboraj esperantaj kursoj fondiĝis ankaŭ en la Universitatoj Sichuan kaj Heilongjiang, en la Normala Instituto de Hunan kaj en la Tria Normala Instituto de Chongqing.

### FREMDLANDAJ ESPERANTISTOJ GASTIS EN BEIJING

En oktobro de 1980, esperantistoj de Beijing intervidiĝis kun 5 fremdlandaj samideanoj. Ili estis aŭstralia s-ino Kay Morrison, svedaj gesroj Anna kaj Karl Ullstrom, kaj britaj gesroj R. Dalton. Ili estis tre bonvenaj al la ĉinaj kolegoj. Ĉinaj esperantistoj kaj la gastoj re-

ciprokis la staton de Esp-movadoj kaj donacajojn.

### ESPERANTA LABOR-KUNSIDO DE NANJING

La Prepara Grupo de la Nanjing-a Esperanto-Asocio okazigis labor-kunsidon en la 15-a de oktobro de 1980. En la kunsido oni diskutis pri la laboro de la Prepara Grupo kaj ĝia plano. La Radiostacio kaj tagjurnalo de Nanjing raportis pri la kunsido.

### 52-A ESPERANTO-KONGRESO DE ITALIO

La 52-a Kongreso de Itala Esperanto-Federacio kun la ĉefa temo "Esperanto — Eŭropo" okazos en Romo de la 19-a ĝis la 24-a de septembro 1981 sub la alta protektado de la parlamenta trupo "Amikoj de

*Nankina (Nanjing-a) Esperanta Laborkunveno*



Esperanto". Inf.: Itala Esperanto-Federacio, via Villoresi 38, I-20143 Milano.

### INTERNACIA KULTURA SEMAJNO PRI NORDA NATURO

Islanda Esperanto-Asocio organizos de la 18-a ĝis la 24-a de julio 1981 Internacian Kultureman Semajnon en apudmara urbeto Stykisholmur. Okazos seminario pri la originala Esperanto-poezio. Limdato por aliĝo estas la 31-a de marto 1981. Inf.: Islanda Esperanto-Asocio. Pf. 1081, Reykjavik.

### 54-A SAT-KONGRESO

En Bazelo, Svislando, okazos la 54-a SAT-Kongreso de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto, 1981. La postkongresa kaj internacia feriosemajno organizota de la Turista Asocio la Naturamikoj Esperanto Fako (TANEF), okazos la 8-15-ajn de aŭgusto en Luzerno. Korespondadreso por ambaŭ aranĝoj estas: 54-a SAT-Kongreso, E. Doring, Poŝtfako 225, CH-4003 Bazel, Svislando.

### LA 66-A UK KAJ LA 37-A LJK

Oficiala Komunikado de UK informas, ke la prezidanto de Brazilo Joao Baptista de Oliveira Figueiredo konsentis roli kiel alta protektanto de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Brazilo. La prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estas vicestro de la reganta partio en la brazila senato s-ro José Lins de Albuquerque, kiu estas multjara esperantisto. La Departamento de Turismo de la Federala Distrikto senpage disponigos sian modernan ampleksan kongrescentron al la kongreso. Ĝis la 16-a de okt. 1980 registriĝis jam 672 aliĝintoj el 43 landoj. La temo de tiu kongreso estos "kulturoj kaj lingvoj: pontoj kaj baroj". La 37-a Internacia Junulara Kongreso okazos en la feriejo Oaxtepec, 78 km. for de Meksiko, la ĉefurbo de Meksikio.

# Pri la greno problemo de la mondo

**E**N la nuna mondo greno estas la ĉefa manĝaĵo de 90% de la tuta loĝantaro de la mondo, komercaĵo konsistiganta okonon de la totala spezo de diversaj komercaĵoj de la tuta mondo, baza materialo de la moderna industrio de bruta nutraĵo, kaj eĉ grava armilo en la internacia diplomatia batalo. Pro tio greno fariĝis grava problemo zorgata de la tuta mondo, same kiel energio, loĝantaro, medio k.a.

Ĉirkaŭrigardante la mondan grenan merkaton, laŭ la analizo de internaciaj grenaj specialistoj, oni trovis, ke en la nuna mondo la greno frontas jenajn problemojn atentindajn.

## **AKRA KONTRAŬDIRO INTER LIVERO KAJ BEZONO**

Nun en la mondo unu el la akraj kontraŭdiroj pri greno estas ke greno livero ne povas plenumi la bezonon, kaj pli kaj pli evidentiĝis la manko de greno. De longa tempo la kresko de greno produktado ne povas kuratingi la kreskon de la monda loĝantaro kaj ĝian konsumon. Iu raporto diris, ke la totala greno produktokvanto de la mondo en 1978 estis 1.46 miliardoj da tunoj, kaj tiu en 1979 malmultiĝis je 60 milionoj da tunoj. La produktokvanto de greno de Sovetunio kaj Hindio malmultiĝis plej akre.

Kontraste kun la malrapida

kresko de la greno produktado, la nombro de monda loĝantaro kreskas tre rapide. La registro montras, ke en 1850, la tuta loĝantaro de la mondo estis nur 1 miliardo, dum en 1975 la monda loĝantaro nombris 4 miliardojn. Oni taksas, ke en 1980 la loĝantaro de la mondo atingos 4.4 miliardojn. La monda greno organizo montris, ke por plenumi la bezonon de la kresko de la loĝantara nombro kaj ties enspezo en la tempo 1962—1985, oni devas klopodi, ke la greno produktokvanto ĉiujare kresku je 3.7%. Tio superis la rapidecon de kresko de la monda greno produktado en efektiveco.

Rapida kresko de la konsumo por brutobredado multe grandiĝis la totalan konsumon de greno. En la komenco de la 60-aj jaroj, la greno konsumita de brutobredado estis 0.28 miliardo da tunoj, kaj en 1977, ĝi superis 0.465 miliardo da tunoj.

La supraj kaŭzoj estigis seriozan nesufiĉecon de greno en la mondo. Antaŭ nelonge, la Usona Internacia Institucio de Greno Politiko montris, ke en 1975, al iuj landoj, kies loĝantaro konsistigas du trionojn de la tuta loĝantaro de la disvolviĝantaj landoj, mankis 12 milionoj da tunoj da greno, kaj en 1990 al ili mankos 85 milionoj da tunoj. En tia kriza stato, gvidanto de la monda greno komitato diris, ke greno “krizo

estos tuj sub la nazo, se oni ne senprokraste alprenos riparan rimedon”.

## **REDUKTIĜAS LA GRENA KONSERVO, SENHALTE ALTIĜAS LA PREZO DE GRENO**

La malmultiĝo de la totala produktokvanto de greno kaj kresko de ĝia konsumo konsekvence kaŭzis reduktiĝon de ĝia konservo kaj altiĝon de ĝia prezo. Sur la monda mapo de greno ekonomio, la Norda Ameriko estas granda grenejo, kaj Usono, Kanado, Francio, Aŭstralio kaj Argentino estas ĉefaj landoj eksportantaj grenon kaj ankaŭ landoj plej grandaj en greno konservo. Tamen, eĉ ties greno konservo reduktiĝas plurfoje. En la komenco de la 70-aj jaroj la totala konservokvanto de tritiko de Usono, Kanado, Argentino, Aŭstralio kaj la Eŭropa Ekonomia Komunumo estis 67.8 milionoj da tunoj, kaj tiu de maldelikata greno estis 52.8 milionoj da tunoj. Sed en la mezo de la 70-aj jaroj la konservokvanto de tritiko en tiuj regionoj reduktiĝis ĝis 32 milionoj da tunoj kaj tiu de maldelikata greno reduktiĝis ĝis 21.5 milionoj da tunoj. En la lastaj 4-5 jaroj, ĉiam reduktiĝas greno konservo de la mondo. Specialistoj pri greno problemoj havas ĝeneralan impreson: Radikale ŝanĝiĝis la stato de la



monda greno, nome la ĉefaj landoj eksportantaj grenon turniĝis en landojn sentantajn malsufiĉecon de grena konservo.

La malmultiĝo de la monda grena konservo kaŭzas senĉesan altiĝon de grena prezo. De 1972 ĝis 1975, Usono altigis sian grenan prezon je 140%. En aŭgusto de 1977, en la grena merkato de Ĉikago, ĉiu buŝelo da tritiko kostis 2.13 dolarojn, en aprilo de 1978 la kosto estis 3 dolaroj, en junio de 1979 ĝi superis 4 dolarojn kaj post du monatoj ĝi atingis 4.2 dolarojn. Daŭre altiĝos la prezo de greno en la monda grena merkato. Iu japana specialisto pri grena problemo montris, ke oni eniras en la etapon, en kiu la grena prezo altiĝas tutmonde kaj malstabiligas la interrilato de livero kaj bezono de greno.

## KLOPODI POR ALTIGI GRENAN AŬTARCIECON

En la nuna situacio, altigi grenan aŭtarciecon kaj plimultiĝi grenan konservon jam fariĝis ĝenerala politiko de plejparto de la landoj. En la lastaj jaroj Britio jam povis liveri al si 64% de la bezonata greno, kaj la Okcidenta Germanio povis liveri al si 80%. Multaj orient-eŭropaj landoj multe plibonigis sian grenan produktadon en la lastaj jaroj, kaj Hungario, krom sia bezono, povis eksporti malgrandan kvanton da greno. 30% de la bezonata greno de Japanio estas liveritaj de ĝi mem. En 1976, nur 4% de ĝia bezonata tritiko kaj 3% de la sojfabo estis liveritaj de ĝi mem. Por liberiĝi de troa dependo de Usono en greno, la japana registaro planis

mem liveri 75% de la bezonata greno en 1985.

La landoj de la tria mondo ĝenerale prenis la politikon aktive disvolvi agrikulturon, altigi grenan aŭtarciecon kaj malmultiĝi sian importan kvanton. Oni raportis, ke dekoj da disvolviĝantaj landoj plimultiĝas agraron, disvastigas bonajn speciojn, kompletigas irigacian sistemon, disdonas krediton kaj subvencion kaj klopodas en altiĝo de area produktokvanto. Surbaze de disvolvo de agrikulturo, la disvolviĝantaj landoj donis grandan atenton al grena konservo por garantii la tiel nomatan grenan sekurecon. Unuvorte, havi necesan grenan konservon jam fariĝis baza celo de ĉiuj landoj en ilia grena politiko.



### LA HALTERLEVA INVITA TURNIRO EN SHANGHAI

La internacia halterleva invita turniro okazis en oktobro de 1980 en Shanghai. En la dek kategorioj de la konkurso la ĉina, usona kaj japana teamoj gajnis 15, 10 kaj 3 orajn medalojn respektive. Multaj el la halterlevistoj rompintisian propran rekordon. La turniron partoprenis la teamoj de Usono, Japanio, Ĉinio, Britio, Germanio, Kanado kaj aliaj ses landoj.

### LA MONDPOKALA GIMNASTIKA KONKURSO EN TORONTO

La 26-an de oktobro malfermiĝis en Toronto la Mondpokala Gimnastika Konkurso de 1980. En la

3-tagaj unuopaj konkursoj vira kaj virina ĉinaj gegimnastoj Li Yuejiu, Huang Yubin kaj Zhu Zheng gajnis 2 orajn, 1 arĝentan kaj 2 kuprajn medalojn.

Li Yuejiu gajnis la ĉampionecon per 19.65 poentoj en la paralela konkurso. Li kaj ĉeĥoslovaka gimnasto ambaŭ gajnis la ĉampionecon de libera gimnastiko same per 19.70 poentoj. Huang kaj sovetunia gimnasto ambaŭ gajnis la ĉampionecon en la konkurso de ludringado same per 19.55 poentoj. Ĉina gimnastino Zhu Zheng gajnis la trian lokon en la konkurso de ŝtupa paralelo.

### VIRINA TENISA KONKURSO EN TOKIO

La 1-an de novembro 1980 okazis en Japanio la teama invita konkurso de virina teniso. La konkurso, aranĝita de la Japana Tenisa Asocio, daŭris kvin tagojn. Ĝin partoprenis 24 tenisistinoj el Japanio, Usono, Hungario, Ĉeĥoslova-

kio, Ĉinio kaj aliaj kvin landoj kaj regionoj.

### ĈINA STANGOSALTISTO STARIGIS NOVAN REKORDON

En la Atletika Ĉampionea Konkurso de 1980 okazinta en Wuhan de Ĉinio, je la 12-a de oktobro, atleta Zhang Cheng el la Beijing-a Teamo transsaltis alton de 5.43 metroj en stangosalto kaj per tio rompintisian azian rekordon de 5.42 metroj, kiun japana stangosaltisto Takanezaŭa kreis en la jaro 1976.

### LA FR GERMANIA SKERMA TEAMO EN ĈINIO

La Skerma Teamo de FR Germanio vizitis Ĉinion en la tria tagdeko de oktobro 1980. En la pitoreska urbo Kunming okazis matĉo inter la nomita teamo kaj la teamo de Yunnan-provinco de Ĉinio. La lertaj germanaj geskermistoj venkis en la spadado kaj la vira kaj virina rapiradoj.

# Ĉinaj tolŝuoj



*Suistinoj*

“Jes, 60% de niaj stokholmaj knabinoj ŝatas porti ĉinajn tolŝuojn”, diris iu sveda ĵurnalisto al Li Shilin, estro de la tolŝua fabriko “Unua de Junio”, post pririgardo al tiu fabriko. Li venis speciale por viziti ĝin kaj foti ĝiajn tolŝuojn.

## LA PLEJ GRANDA TOLŜUA FABRIKO EN ĈINIO

La nomita tolŝua fabriko situas en kvieta strato, interne de Anding-pordego de Bejing (Pekino). La fabrikdomo kun areo de 10,000 kvadrataj metroj havas ses ĉenlaborejojn por kunglui tolojn, fari tajladojn, borderi ŝudorsojn, kunigi ŝudorsojn kaj plandumojn, ktp. Tie laboras 1,200 ŝuistoj. Ili faras ŝudorsojn el tolo, veluro kaj silko de diversaj koloroj, alligas ilin al ŝuformiloj kaj metas ilin sur maŝinon, kiu produktas plastajn plandumojn kaj kungluas ilin ambaŭ. Tiel produktiĝas diversformaj ŝuoj kun alta, mezalta kaj malalta kalkanumoj.

La fabriko kun jara produktokvanto de pli ol 4 milionoj da

paroj da ŝuoj estas la plej granda en Ĉinio. Ĝi produktas ĉefe virinajn kaj infanajn ŝuojn kun marko “Libelo”, kiuj havas dudekelkajn tipojn. Direktoro de la Japana Mizubiŝi-a Transnacia Korporacio diris kun admiro, ke ĝiaj tolŝuoj estas zorge faritaj, komfortaj, malpezaj, klarkonturaj, kun molaj plandumoj.

Antaŭ nelonge mi intervjuis fabrikestron Li Shilin, kiu aĝas ĉirkaŭ 50 jarojn. Li estas kompetenta entreprenisto. Sub la vitroplato sur lia tablo troviĝas multaj vizitkartoj de fremdlandaj komercistoj. Li diris: “Lastatempe iu nederlanda komercisto deziregis mendi milionon da paroj da ŝuoj, kaj iu japana komercisto petis nin pli multe produkti ŝuojn kun peonio, drako aŭ fenikso mane broditaj.” Per la profito de la pasinta jaro, la fabriko ja povus konstrui du fabrikojn same grandajn kiel la nuna.

## DILIGENTECON REKOM- PENCAS FRUKTOJ

La fabrikestro montris al mi paron da bluaj tolŝuoj, dirante:

“Rigardu! Ni jam donis novan modon al niaj ŝuoj. Ni plenumas parton de la laboro antaŭe faritan per manoj per maŝinoj. Ni ankaŭ aplikis iujn ledŝuajn formojn al tolŝuoj.” Parolante pri la formo de tolŝuoj li rakontis al mi pri la 34-jara projektistino Liu Baozhu, kiu bone resumis la sperton de ŝufarado kaj elpensis metodon de ŝufarado laŭ specimeno. Ŝi bone kaj rapide projektas specimenojn de ŝuoj laŭ preciza mezuro anstataŭ mezurado per okuloj kaj palpado. Pro tio ŝi estis elektita kiel avangarda laborantino en la kampo de la malpeza industrio de Bejing.

En la printempo de 1980 Liu Baozhu en bone tajloritaj vestoj ĉeestis intertraktadon kun fremdlandaj komercistoj pri prilaborado de tolŝuoj. La lastaj volis vidi pli da specimenoj de ĉinaj ŝuoj. En tiu nokto Liu Baozhu kaj ŝiaj kamaradoj faris novajn specimenojn. Kaj matene de la sekvanta tago 30 belaj specimenoj ŝuparoj prezentiĝis antaŭ tiuj komercistoj, kaj ili tre admi-

ris ilin. Tuj en tiu tago estis interkonsentita la mendo de ŝuoj kun kosto de 600,000 dolaroj.

Liu Baozhu devenas de tajlora familio. Ŝi tre ŝatas studi beletron. Frue kiam ŝi vizitis mezlernejon, ŝi ofte gajnis 100 poentojn en la belarta ekzameno. En 1962 ŝi eklaboris en tiu fabriko. Ŝi tre diligente lernis teknikon de ŝufarado. Baldaŭ ŝi posedis sciojn pri aplikata belarto kaj meĥanika desegnado. Kiam ŝi venis al butikoj aŭ parkoj, ŝi ĉiam pensis pri tio, kiaj ŝuoj bone sidas sur la piedoj de tiu aŭ alia homo, kaj kiaj ŝuoj estas plaĉaj al la publiko.

Iutage ŝi vidis en butiko novtipajn virinajn ŝuojn produktitajn de Shanghai (Ŝanhajo) kaj dronis en medito. Kaj ŝi dediĉis sian liberan tempon al farado de junulinaj tolŝuoj kun plaĉaj unikaj dorsoj, kiuj poste fariĝis unu el la ĉefaj eksportataj komercaĵoj de la fabriko. Ĝis nun ŝi projektis pli ol 80 specojn de virinaj kaj infanaj ŝuoj, el kiuj 24 menditaj estis en granda kvanto. En 1980 ŝi estis nomumita projektisto de la fabriko.

## OKCIDENTANOJ EKŜATIS ĈINAJN TOLŜUOJN

Parolante pri la debito de ĉinaj tolŝuoj, li diris, ke jam de longe iuj fremduloj estis altiritaj de la broditaj ŝuoj portataj de la feinoj en ĉinaj teatraĵoj. En la lastaj jaroj ĉinaj batalartistoj vizitis aliajn landojn, kie ili en tolŝuoj faris lertajn prezentadojn kaj ricevis aplaŭdojn de la spektantoj. Kun ĉiam kreskanta komunikigo inter Ĉinio kaj aliaj landoj, ties popolanoj ekŝatis ĉinajn tolŝuojn.

Shi Qingxiang, direktoro de la Beijing-a Kompanio de Ŝua Industrio, diris: "Ĝenerale la virinoj de okcidenta Eŭropo havas altan staturon kaj grandajn piedojn. Laŭ ili la malgrandaj piedoj estas pli belaj. Tial ni penas ĉarmigi la formojn kaj liniojn de niaj eksportataj ŝuoj, ke ili aspektu ne tre grandaj. Kaj samtempe ni pli multe produktas nigrajn kaj verdajn tolŝuojn konforme al la koloro de la kostumo de la konsumantoj. Ni povas antaŭdiri, ke baldaŭ furoros en

okcidenta Eŭropo ĉinaj tolŝuoj de la kvara generacio."

Li speciale rakontis al mi pri la evoluo de la ĉinaj tolŝuoj de la unua ĝis la kvara generacio. Antaŭ tre longe ili sendis materialon al kamparo kaj tieaj virinoj faris prilaboron. Ili mane kudris plandumojn kudreron post kudrero. Kaj ĉiu el ili povis kudri nur unu plandumon ĉiutage. Tiel naskiĝis la unua generacio de la ĉinaj tolŝuoj. Poste ili komencis maŝinan kudradon kaj povis kudri 50 parojn da plandumoj ĉiutage. Tio prezentis la duan generacion. Kaj pli poste ili uzis plastajn plandumojn kaj ĉiu ŝuisto povis prilabori pli ol 100 parojn ĉiutage. Progresis la ŝua produktado kaj aperis la kvara generacio de tolŝuoj kun algluitaj plastaj plandumoj. La procedon de la ŝufarado mi vidis en la tolŝua fabriko "Unua de Junio".

"Beijing-aj ŝuoj estas famaj en Ĉinio", daŭrigis la direktoro, "kaj la maŝinoj produktantaj plastajn aŭ kaŭĉukajn plandumojn kaj kungluantaj ilin kaj ŝudorsojn estis fabrikitaj de Beijing-aj tolŝuaj farejoj kaj nun estas vaste uzataj en aliaj ŝufarejoj de la lando. La delikataj metiartaj eksportataj Beijing-aj tolŝuoj altiras al si fremdlandajn komercistojn." Li diris: "Niaj eksportataj metiartaj tolŝuoj portas la markon 'UFO' proponita de iu transmara ĉino. Antaŭe ni volis uzi markon kiel 'Ĉiela Altaro' aŭ 'Orienta Vento'. Foje iu transmara ĉino demandis nin: Nun la vorto 'UFO' estas en modo, kial vi ne uzas ĝin kiel markon? Ni pensis, ke lia propono estas bona, kaj ĝin akceptis. Ĉinaj tolŝuoj estas komfortaj, malpezaj kaj taŭgaj precipe por turistoj."



Projektistino Liu Baozhu de tolŝua fabriko de Beijing




Fotoj de ZHANG WEI

# Wuyi- monto

Nubmaro de Wuyi-monto





Naŭ-kurbiĝa Rivereto inter montoj

Boato sur verda akvo







Tabula vojo sur krutajo de Ĉielvojaĝa Montpinto



**FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ**

Pejzaĝo kun lago ĉe la urbo Ans Jutlando


de **HARDY SKOUGAARD** (Danlando)



Akvofaloj de la nacia parko "Plitvice", en la meza Kroatio

de **PLEADIN JOSIP** (Jugoslavio)





CHEN ZHEN kaj  
CHANG RONG:

# Galerio de ĉinstilaj pejzaĝoj

## —Pri Wuyi-monto

**W**UYI-MONTO, situanta en Chong-an-gubernio de norda Fujian-provinco de Ĉinio, estas fama pro siaj verdaj akvoj kaj groteskaj montpintoj. Oni nomas ĝin "Galerio de Ĉinstilaj Pejzaĝoj".

Wuyi-monto havas perimetron de pli ol 60 kilometroj. Tie troviĝas Naŭ-kurbiĝa Rivereto kaj 36 montpintoj. La Naŭ-kurbiĝa Rivereto longas 7.5 kilometrojn. Preskaŭ ĉiuj vidindejoj de la monto troviĝas ĉe ĝiaj bordoj. Ni ekiru kontraŭflue de la unua kurbiĝo por rigardi la belajn pejzaĝojn.

Starante sur la ponto super la unua riverkurbiĝo, ni trovis, ke ĉie ĉirkaŭe estas verdajoj. La montpinto Reĝo, la unua el la 36 montpintoj, staras ĉe la buŝo de la rivereto, kiel ĉielskrapanta kolonego. Okcidente, svelte leviĝas la montpinto Belulino ĉe la dua riverkurbiĝo. Kun glata kaj delikata krutaĵo, ĝi tre similas al jad-skulptita feino. Sur ĝia supro dense kreskas herboj kaj floroj, kvazaŭ allogaj ornamoj sur la kapo de bela knabino, kaj la malpeza nebulo ŝirmanta la monttalion similas al zono ĉirkaŭanta ŝian lumbon. Ĉe la montpiedo ŝtupe steriĝas te-ĝardenoj, kvazaŭ smeralda scenejo, sur kiu flirtas la bela knabino. Ĉio ĉi tio speguliĝas en la klara akvo, kio faras la montpinton ankoraŭ pli ĉarma. Dekstre antaŭ la montpinto kuŝas ronda spegul-simila roko kun alteco de 7 metroj. Oni diras ke ĝi estas tualeta spegulo, antaŭ kiu la belulino faras tualeton. Sur la roko okul-

frape videblas gravuritaj vortoj "Tualeta Spegulo". Ĉirkaŭ la montpinto kuŝas ankaŭ multaj aliaj rokoj, el ili iuj kvadratoj similaj al stampiloj, aliaj al ventumiloj kaj triaj al kombiloj. Tiuj groteskaj kaj delikataj rokoj, punktitaj ĉirkaŭ la montpinto aŭ kuŝantaj ĉe la bordoj aŭ emergintaj el la akvo, kune formis fabelan landon.

Sude de la montpinto estas pejzaĝo "La Strio de Ĉielo". Tie la rokoj elstaras kaj etendiĝas centojn da metroj. Sur la supro de la krutaĵo troviĝas fendo unu metron larĝa, kvazaŭ hakita per akra hakilo. Rigardante supren el la kaverno sub la krutaĵo, ni povas vidi nur strion da lazura ĉielo. En la kaverno fontakvo gutadas kaj blovas facila vento. Eĉ en somero oni sentas malvarmeton, tial ĝi estas bona ripozejo.

Ĉe la bordo de la tria riverkurbiĝo staras "La Roko de Kuriozaj Ŝipoj". Rigardante la montpinton, ni trovas, ke inter la fendoj sur la altaj krutaĵoj estas horizontale metitaj pluraj lignotabuloj, sur kiuj metiĝas lignaj ŝipoj. Jen estas unu el la famaj antikvaj restaĵoj de Wuyi-monto. La ligna ŝipo longas ĉ. 4 metrojn kaj pezas ĉ. 300 kilogramojn. Nun oni ankoraŭ ne scias, kiel la ŝipoj estis metitaj tie en la antikveco. Post ĉelokaj esploro kaj ekspertizo ĉinaj arkeologoj konstatas, ke ili estas ĉerkoj, faritaj de lokaj naciminoritatoj antaŭ ĉ. 4,000 jaroj.

Antaŭe sur la krutaĵoj de la kvara riverkurbiĝo estis ankaŭ tiaj ŝipoj, kiuj nun jam defalis. Mal-

dekstre de la krutaĵoj estas te-ĝardeno. Ekde la 13-a jarcento tie produktiĝis rara teo Shiru por tributigi al la kortego.

La kvina riverkurbiĝo troviĝas en la mezo de la nomita rivero. Tie estas vasta tereno. La rivereto fluas inter montoj, kaj ambaŭborde staras altaj montpintoj. La kruta montpinto Ekranon staras norde de la rivereto. Ĉe la piedo de la monto troviĝas la Akademio Ziyang, kie donis lekcion Zhu Xi (1130-1200 p. K.), fama instruitulo de Song-dinastio.

El la naŭ kurbiĝoj la sesa estas la plej mallonga. Norde de ĝi staras rokego Polmo, sur kies kruta muro erozio lasis formon de fingroj, ĝuste pro tio ĝi ricevis la nunan nomon. Sub la montpinto estas la Chong'an-a Te-ĝardeno, kies Wuyiyan-teo ĝuas grandan famon.

Norde de la sepa kurbiĝo troviĝas Sanyang-montpinto. Ĝi estas la ĉefa montpinto de Wuyi-monto kaj altas 750 metrojn. Sur ĝia muro estas gravuritaj la vortoj "kulmino de Wuyi-monto".

Ĉe la oka kurbiĝo, la rivero fariĝis vasta kaj la fluo rapida. Ambaŭborde troviĝas diversformaj rokoj, inter kiuj iuj similas al bov-kornoj, aliaj al ranoj kaj triaj al leonoj aŭ testudoj. Sur unu rok-muro troviĝas ronda roko supre granda kaj malsupre malgranda. Se oni frapas ĝin per ŝtono, ĝi sonas tambure.

Ĉe la naŭa kurbiĝo estas la vilaĝo Douxing. Sur la ebenaĵo

staras bonordaj domoj kaj kuŝas verdaj kampoj. Tien veninte, oni sentas sin kvazaŭ reveninta de paradizo en la homan mondon.

La kampuloj de la vilaĝo estas lertaj en flosado. Preskaŭ ĉiuj turistoj veturas de la pramejo laŭflue per bambua flosa por rigardi la ambaŭbordajn pejzaĝojn. Sur flosa kampuloj, montrante pejzaĝon, rakontas al turistoj multajn interesajn legendojn.

Poste ni ascendis la Ĉielvojaĝan Montpinton, la unuan pitoreskejon de Wuyi-monto, de kie mi povas ĝui ĝian panoramon. Ĝi estas tre rava. Koloraj nuboj ŝvebis for sub niaj piedoj, kvazaŭ ni leviĝus inter la nubamasoj. Post disiĝo de la

nuboj, ni trovis, ke la ondantaj montpintoj kvazaŭ estus galopantaj ĉevaloj. Ambaŭborde de la rivereto agrikulturaj plantoj kaj tearboj kreskas konkure. La vilaĝoj kaŝiĝas en arbaroj. La ŝoseo kiel ora rubando serpentumas ĉirkaŭ la monto. La lignaj flosoj rapidas antaŭen, disigante ondojn.

Norde de Wuyi-monto troviĝas multaj aliaj pejzaĝoj. Inter ili la roko "Aĝla Beko" estas fama. Rigardate de malproksime, tiu nigra roko tre similas al aglo, brave fluganta en vento.

Proksime de ĝi, du fontoj sur la "Akvokurtena Kaverno" verŝas sian akvon en basenon sub roko, la akveroj ŝprucas foren je pli ol

10 metroj. En zefiro la akveroj dancas, bunte varias en sunbrilo kaj formiĝas en koloran perlan kurtenon. En rokkavernoj apud la kaverno estas du temploj. Kvan-kam ili kadukiĝas pro tempopaso, tamen klare videblas floroj kaj birdoj gravuritaj sur iliaj lignaj kolonoj.

La klimato de Wuyi-monto estas milda, kaj oni povas viziti ĝin tutjare. En printempo pompas ĉarmaj floroj ĉie sur la monto; en somero murmuris fontoj kaj verdas ombroriĉaj arboj; en aŭtuno la tefloroj aromas; kaj en vintro brilas sunradioj. Tie la pejzaĝo varias laŭ la vetera kaprico, kio ĉiam allogas turistojn.



## ĈINIO ŜPARIS ENERGIION

Lastatempe en Beijing (Pekino) okazis la tutlanda kunveno por interŝanĝi spertojn en ŝparado de energio. La materialoj montris, ke Ĉinio akiris rimarkindan sukceson en sia ŝparado de energio. En 1979 estis ŝparitaj 23 milionoj da tunoj da karbo, 2.8 milionoj da tunoj da petrolo kaj 7.8 miliardoj da kilovattthoroj da elektro. Triono de la 180,000 kaldronejoj uzataj en la tuta lando devas esti reformita aŭ renovigita pro troa kadukiĝo, malalta laborefiko aŭ multa energikonsumado. Se tiuj kaldronejoj ricevos reformon aŭ renovigon, ĉ. 10 milionoj da tunoj da karbo povos esti ŝparitaj ĉiujare.

## LA EBENAJ-VERDIGO EN ĈINIO

En la lastaj tri jaroj la ebenaj-verdigo en Ĉinio ricevis novan disvolvigon. En tiu tempo la forstumita areo proksimiĝis al la totala

forstumita areo en la antaŭaj 27 jaroj. Depost la jaro 1977 oni forstumis 6,600,000 hektarojn per kamposirmaj arbidoj. La areo de mikse kulturataj agrikulturaj plantoj kaj paŭlovnioj (*Paulownia fortunei*) estis 1,000,000 hektaroj, kaj oni plantis 3,200,000,000 arbidojn. Plus la antaŭe forstumita areo, la areo de interkampaj arboj atingis 12,800,000 hektarojn kaj la areo de mikse kulturataj agrikulturaj plantoj kaj paŭlovnioj atingis 1,930,000 hektarojn kun 7,200,000,000 arboj.

## 80 NEMETALAJ MINERALOJ TROVITAJ EN ĈINIO

Ĉinaj geologoj akiris gravan sukceson en serĉado de nemetalaj mineraloj. Ili jam trovis 4,300 nemetalajn minejojn kaj la rezervokvanto de 80 specoj de nemetalaj mineraloj estis esplorita. Kaj la rezervokvanto de sulfur-fero, gipso, magnezio, boro, fosforo, arseno,

asbesto, fluorito, aluno kaj roksalo el la 80 mineraloj lokiĝas en la antaŭaj vicoj en la mondo.

## LA ANHUI-JIANGXI-A FERVOJO EN STREĈA TRAKMETADO

La nomita fervojo estas alia trafika linio liganta la nordan kaj sudan partojn de la sudorienta marborda regiono de Ĉinio. Ĝi iras de Wuhu de Anhui-provinco en la nordo ĝis Guixi de Jiangxi-provinco en la sudo. Ĝia totala longeco estas 540 km. Oni jam plenumis trakmetadon de 340 km., el kiuj 230 km. jam malfermiĝis al trafiko.

La fervojo ludos gravan rolon por disvolvo de la nacia ekonomio en la sudorienta marborda regiono de Ĉinio kaj donos oportunon al ĉinaj kaj fremdlandaj turistoj, kiuj volas vojaĝi al la pitoreskaj montoj Huangshan kaj Jiuhua.



## LA UNUA PRODUKTA LINIO POR KOLORAJ TELEVIDILOJ DE ĈINIO

La nomita linio, kiu povas produkti 150,000 14- kaj 22-colajn kolorajn televidilojn ĉiujare, komencis produktadon en Tianjin (Tiangin) post 11-monata konstruado. Ĝia kompleto da ekipaĵoj havas belan aspekton kaj altan aŭ-



tomatecon. Krome ĝi eligas bruon malgrandan. Ĝi estis enkondukita el Japanio kaj projektita laŭ la aktualaj kondiĉoj de Ĉinio.

## 500,000 URBAJ FAMILIOJ TRANSLOĜIGIS EN NOVAJN DOMOJN

De januaro ĝis septembro de 1980, Ĉinio finkonstruis loĝdomojn

de 25,950,000 kvadrataj metroj en urboj kaj ĉe minejoj. Laŭ areo ili superas tiujn en la sama periodo de 1979 je 51.2% kaj povas enteni 500,000 familiojn. Ne nur la ŝtato faras investon por loĝdoma konstruado, sed ankaŭ registaroj de 22 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj aktive organizas privatajn loĝdomojn por konstrui aŭ aĉeti loĝdomojn.

## NOVA ELDONO DE LA "KOLEKTITAJ VERKOJ DE LUSIN"

La 25-a de septembro ĉijare estos la centjara datreveno de la naskiĝo de la ĉina granda forpasinta literaturisto Lusin.

La verkaro konsistas el 16 volumoj, je 6 volumoj pli multe ol la malnova eldonita en 1958. Ĝi enhavas aldonitajn anekdotojn, verkojn pri Ĉinaj Klasikaĵoj, antaŭparolojn kaj postskribojn de tradukitaj verkoj, leterojn kaj taglibrojn sume kun ĉ. du milionoj da ideografiaĵoj. En la unua trimestro de 1981 oni komencos la eldonadon kaj ĝin finos en aŭgusto.

## 30-JARA JUBILEO DE LA ARTAJ-VENDEJO RONGBAOZHAI

La nomita vendejo estas fama en kaj ekster Ĉinio pro vendado de ĉinstilaj pentraĵoj, kaligrafiaĵoj, penikoj, inkopecoj, leterpaperoj, ŝtonaj ĉin-inkaj frotplatoj kaj reproduktitaj pentraĵoj per lignogravuro. En la 27-a de la lasta julio ĝi invitis pli ol 300 ĉinajn kaj alilandajn personojn de kulturaj kaj artaj rondoj al kunsido por celebri la 30-jaran ekzistadon de la Nova Rongbaozhai.

La vendejo jam havas historion de pli ol 200 jaroj. Kun la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝi sin savis el depresio. En oktobro de 1950, ĝi

akceptis reformon de la registaro kaj fariĝis ŝtata vendejo Nova Rongbaozhai.

Dum la pasintaj 30 jaroj la vendejo prosperis kun la tagoj. Ĝia reprodukta arto per lignogravuro kaj enkadrigo de pentraĵoj plialtiĝis; la kaligrafiaĵoj, pentraĵoj, kopioj de manskribaĵoj gravuritaj sur antikvaj tomboŝtonoj kaj bronzajoj, ŝtonaj ĉin-inkaj frotplatoj, penikoj, leterpaperoj kaj ĉinaj inkopecoj produktitaj de tiu vendejo estas bone akceptataj de pli kaj pli multaj klientoj. Dank' al vendado kaj eksportado de la artaj objektoj, ĝi vaste kontaktiĝas kun personoj de kulturaj kaj artaj rondoj, ŝtongravuristoj, kaligrafoj, pentristoj kaj metiartistoj, kaj faris per tio kontribuojn en riĉigo de la popola kultura vivo de nia lando, en plifortigo de amikeco kun alilandaj popoloj, en disvastigo de kulturo kaj arto de nia patrujo kaj en konservado de niaj valoraj historiaj objektoj.

## ĈINAJ LIBROJ EN INTERNA- CIA LIBROFOIRO

Nombro da libroj kaj bildalbumoj eldonita de la Ĉina Scienca Eldonejo estis eksponita en la Internacia Librofoiro de Frankfurto, okazinta de la 8-a ĝis la 13-a de oktobro, 1980.

Inter la eksponitaj libroj troviĝis "Aplikoj de Nombra Teorio al

Proksimuma Analizo", "Granda Pando", "Vegetaĵoj de la Ĉina Popola Respubliko", "Principoj kaj Metodoj de Biologia Regado de Finsektoj" kaj librospecimenoj de "Ĉinaj Porcelanaĵoj", "Ĉinaj Antikvaj Pagodoj" kaj "Historio de Ĉina Antikva Arkitekturo". Krome estis eksponitaj katalogoj de pli ol 400 libroj.

## KONGREGACIA SERVO DE ISLAMANOJ

En oktobro lastjare kelkcent ĉinaj kaj fremdlandaj islamanoj okazigis la unuan kongregacian servon en la plej granda kaj malnova moskeo nove riparita, kiu situas sur la strato Niujie de Bejing.

La preĝhalo kun 42 ĉambroj estas la ĉefa konstruaĵo de la tuta moskeo. Krom la mihrabo, kiu ankoraŭ konservas arabajn skribaĵojn kaj kolorojn sur la originala niĉo, la aliaj haloj estas ore pentritaj de nove. Sur la portalo kaj niĉoj estas delikate gravuritaj tekstoj de la Korano kaj psalmoj al profeto Mahometo. La moskeo havas kaj trajtojn de ĉina tradicia templo kaj belan araban koloron. La traboj de la preĝhalo estas delikate gravuritaj kaj brile pentritaj. La moskeo konservas grandan nombron da islamaj klasikaĵoj kaj la Korano en diversaj eldonoj.

CHEN JIE:

# Yunnan—Trezorejo de Vegetaĵoj

**Y**UNNAN-provinco kun kompleksaj terformo kaj klimato situas ĉe la sudokcidenta landlimo de nia lando. Ĝia meza parto, en kiu troviĝas ĝia ĉefurbo Kunming konata kiel "Printempa Urbo", tutajre ĝuas printempajn mildecon kaj belecon. En la provinco tre riĉas vegetaĵoj tropikaj, subtropikaj, mezvarmaj kaj malvarmaj-zonaj, pro kio ĝi estas nomata "trezorejo de vegetaĵoj".

La arbara areo de Yunnan-provinco estas relative granda. Tie kreskas la valoraj arboj metasekvojoj (*Metasequoia glyptostroboides*), tektonoj, palisandroj kaj kamforarboj ktp. En tiaj arbaroj ankaŭ produktiĝas multaj valoraj drogoj kiaj pseŭdoginsengo, mosko, cervaj junkornoj kaj vegetalaj raŭpoj (*Cordyceps sinensis*). La ĉefaj grenoj tie produktataj estas rizo, maizo kaj tritiko, kaj rizo estas dufoje rikoltita ĉiujare. La tiaj ekonomiaj

plantaĵoj estas teo, kanabo, kotono, ternuksoj, tabako, sukerkanoj ktp. En la sudo de la nomita provinco produktiĝas ankoraŭ kafo, ananasoj, bananoj ktp.

Yunnan-provinco estas mondo de floroj. La ondanta montaro ĉirkaŭ

Dali en ĝia norda parto estas floraj montoj. Nemalmultaj familioj konkure metas la florfazojn antaŭ siaj pordoj por formi floran "monteton", en konkuro de familio kun familio kaj de strato kun strato. Tiaj floroj estas tre multspecaj kaj la plej bonaj




Botanikisto Wu Zhengyi, estro de la Kunming-a Botanika Instituto



Rekta arbego duabanga (Duabanga grandiflora)

Pasifloro





## Rhododendro

kamelioj famaj de nia lando devenis de Dali. Hodiaŭ tie ankoraŭ troviĝas kameliaj arboj de centoj da jaroj. Sur iu monto kreskas kamelia arbo kun folioj similaj al tiuj de cinamarbo, alta je 16 metroj kun diametro de 40 centimetroj. Ĉiujare, antaŭ kaj post la Printempa Festo, ĝi portas milojn kaj milojn da rozkoloraj floroj grandaj kiel bovloj. La sovaĝaj kamelioj kreskas ĉie sur la montoj. Yunnan havas la areon de 390,000 kvadrataj kilometroj, t.e. 1/25 de tiu de la tuta lando. Ĝi havas ĉ. 15,000 specojn da altklasaj vegetaĵoj, t.e. duono de tiuj de la tuta lando. Tre riĉa estas tie la fonto de la sovaĝaj kaj duonsovaĝaj vegetaĵoj.



orienton en arbaro kaj ne kunportas manĝaĵon, povas dehaki parton de trunko de tiuj arboj, ĝin rosti kun ŝelo kaj poste ĝin manĝi. El la floroj de tiuj vegetaĵoj oni ankaŭ povas produkti sukero. Ekzemple, el la likvaĵo elfluinta el la floroj de unu glata areko oni povas produkti 10 ĝis ĉ. 50 kilogramojn da sukero.

En Yunnan-provinco kreskas speciala olea vegetaĵo — olea kamelio kun ruĝaj floroj. Tiuj arboj havas

ruĝajn aŭ rozkolorajn florojn kaj densajn branĉetojn kaj verdajn foliojn tutjare. Tia arbo kaj la fama kamelio de Yunnan estas fratinoj el sama familio. En Yunnan kreskas pli ol 100 specoj da kamelioj kun relative grandaj ĉarmaj floroj multpetalaj kaj folioj pli grandaj ol la ordinaraj. Tial, ili estas rigardataj kiel trezoroj en ĝardenoj en kaj eksterlandaj. La frukto de la ruĝfloraj oleaj kamelioj estas grandaj kun multaj semoj kiuj entenas multe da oleo. Tie estas granda olea kamelio vivinta jam ĉ. 200-300 jarojn. Ĝi povas produkti ĉ. 50 kilogramojn da oleo ĉiujare. Tie kreskas ankaŭ alia olea vegetaĵo kun fruktoj similaj al malgrandaj kalabaso. Oni nomas ilin oleaj kalabaso. Iliaj kernoj povas facile bruli. Tiaj oleaj kalabaso pli ol sesdek-pocente konsistas el oleo.

Estas prave, ke iuj nomas Yunnan loko de aroma oleo.

Tie troviĝas ia arbedo el kies folioj povas distiliĝi per akvo aroma oleo nomata Dongmai-oleo. La pura oleo kaj ekstrakto el lapa saŭsureo (*Saussurea lappa*) havas bonodoron de animalaj aromaĵoj. Alia



Floro de doliĉandro  
(*Dolichandron caudafelina*)

Oni ofte dividas la vegetaĵojn en amelajn, oleajn, aromajn, medikamentajn vegetaĵojn ktp. La plej ofte menciitaj amelaj vegetaĵoj estas rizo, tritiko, maizo, sorgo, taro, batato kaj manioko. Ĉu vi scias, ke amelo troviĝas en la trunko de iuj arboj? En la suda parto de Yunnan troviĝas tiaj amelaj vegetaĵoj kiaj fiŝvosto-palmoj (*Caryota ochlandra*), glata areko (*Arenga pinnata*) ktp. Malsata vojaĝanto kiu perdis la

Botanikisto Cai Xitao (maldekstre) observas la oleproduktan olemelonon (*Hodgsonia macrocarpa*).





ekzemplo, natura kamforo ordinare estas distilita el ligno de kamforarboj. Tamen en Yunnan estas kelkaj kamforaj vegetaĵoj, el kies folioj oni povas ekstrakti kamforon. Tia ebleco multoble altigas ilian ekonomian valoron.

Yunnan-provinco estas ankaŭ grava produkteto de drogoj tropikaj kaj subtropikaj, kiaj kaempferio (*Kaempferia galanga*), amomo (*Amomum villosum*), unkario (*Uncaria rhynchophylla*) ktp. Tie kreskas ankaŭ la nordaj drogvegetaĵoj kiaj licio, angeliko kaj ignamo. En la lastaj kelkaj jaroj oni tie trovis drogajn vegetaĵojn, kiaj antaŭe estis importitaj kaj iuj el ili estas pli efikaj en kuracado ol la importitaj. Krome, tie ankaŭ troviĝas multaj ĉinaj drogherboj longe uzataj de popolo. Iuj el ili troviĝas nur en Yunnan. Tie kreskas speco de gigantaj arboj, kies frukto havas dikan ruĝetan petiolon, el kiuj oni povas fari delikatajn metiartaĵojn kaj valoregan medikamenton. Tie kreskas alia vegetaĵo, el kiu oni povas ekstrakti "senŝeligan hormonon" por silkraŭpoj. Per tia hormono oni povas akceli la metabolon de silkraŭpoj, unuigi ilian senŝeligan tempon.

Plejparto de la supre diritaj vegetaĵoj de Yunnan-provinco estas altklasaj kaj tie estas eĉ pli multaj malaltklasaj vegetaĵoj. Ekzemple, estas mirinde multaj fungoj ruĝaj, orangflavaj, verdaj, blankaj, nigraj kaj grizaj. Iuj el ili similas al fiŝreto, aliaj al kresto, triaj al koro de bovo kaj kvaraj al ombreloj. Kaj koncerne la saponon, ili estas diversaj.

En Yunnan troviĝas ne nur multaj lokaj vegetaĵoj, sed ankaŭ multaj vegetaĵoj sukcese enkondukitaj el aliaj lokoj kiaj kaŭĉukarbo, kokao, kafarbo, pirarboj kreskantaj en Ameriko, aŭstraliaj nuksarboj kaj durioj, oleaj palmoj kaj eburaj mangoj el sudorienta Azio, Hindio ktp. La plantado de tiuj vegetaĵoj pliriĉigas tiun belan "trezorejon de vegetaĵoj".

QING WEI:

## La unua mano

**L**A homoj ne povas malhavi manojn. Sen manoj homo ne povas vivi libere. En la pasinteco la ĥirurgoj povis doni al senmana kriplulo nur unu aŭ du artefaritajn manojn. Tia mano ne havas vivon, nek povas doni al la kriplulo bonan helpon en zorgado de la vivo. Nun la fama ĉina ostologo Yu Zhongjia sukcese faris la unuan revivigitan manon, kio alportis al la tutmondaj senmanaj kripluloj ĝojigan informon.

Yu Zhongjia estas ostologo de la Sesa Hospitalo de Shanghai (Ŝanhajo). Li estas fama tra la tuta lando pro sukcesa kunigo de rompita membroj. En 1973 lia disertacio pri kunigo de rompita membro rikoltis laŭdojn de diverslandaj ostologoj en la Internacia Ostologia Konferenco en Meksiko. En 1974, li venis al Togo de Afriko, kun ĉina medicina grupo sub sia gvido kaj tie sukcese faris al paciento operacion por forseki antaŭbrakan ostotumoran parton kaj reku-nigi la detranĉitan brakon.

Antaŭe Yu Zhongjia estis arma kuracisto. Per sia kuraĝo kaj lerta kuracarto, li naŭfoje faris meriton en la Popola Libera Milito. En 1959 li estis postenigita al la Sesa Hospitalo de Shanghai, li unue laboris kiel ĥirurgo, kaj poste kiel ostologo.

Ĉu oni povas fari manon per operacio? Pri tio Yu Zhongjia cerbumis naŭ jarojn. Li absorbite tra legis koncernajn materialojn ĉu ĉinajn aŭ eksterlandajn kaj elpensis projektojn unu post alia.

Tia mano estas uzata por fortigi la kapablon de la resta parto de antaŭbrako per operacio. Ĉirkaŭ la Unua Mondmilito germana ĥirurgo inventis antaŭbrak-forkigan operacion, t.e., apartigi la ulnon kaj radiuson de la resta parto de la antaŭbrako kaj tiel formi kraban forkon. Tamen tia "mano" farita per operacio estis tre malmala kaj abomenata de kripluloj. Kio do estas racia projekto?

Post multa cerbumado racia projekto iom post iom formiĝis en la kapo de Yu Zhongjia: Unue oni devas fari por la kriplulo metakarpeon (ĉar ĝi estas subtenilo de la manplato) el metala materialo, kiu ne kaŭzas malbonan reakcion al la homkorpaj histoj; due oni devas bone fiksi kaj envolvi ĝin per muskolo kaj aliaj molaj histoj ĉirkaŭ la antaŭa parto de la manplato, kaj poste kovri ĝin per haŭto de la rompita antaŭbrako por formi novan manplaton; kaj trie oni devas detranĉi kvin piedfingrojn de la kriplulo, kaj transplanti ilin sur la novan manplaton kaj bone kunigi iliajn angiojn, muskolojn kaj nervojn, por ke ili reakiru sensojn kaj movpovon.

25-jara juna laboristo Gao Tianshe de Shaanxi-provinco perdis siajn manojn pro esplodigo en konstruado de akvrezervejo antaŭ kvar jaroj. Yu Zhongjia elektis lin kiel operaciaton.

"Malgranda Gao, ĉu vi volas anstatuigi la artefaritajn ma-

# farita per operacio

nojn per manoj kreitaj per operacio?" demandis kuracisto Yu.

"Ehe, mi deziras tion eĉ en sonĝo," respondis malgranda Gao.

Li estis fortika kaj vigla junulo. Kun ŝarĝo de 100 kilogramoj surŝultre li povis kuri flugrapide. Sed nun, liaj artefaritaj manoj eĉ ne povis levi pinglon, nek preni paperpecon. Kiel li ĉagreniĝis pro tio! Kiam Yu prezentis al li sian projekton pri kreado de manoj per operacio, tuj ekflamis en lia koro fajrero de espero.

Fine ostologo Yu montris al Cao sian V-forman manplatoston artefaritan el altforteca titana alojo. Gao fikse rigardis kaj emocie kisis ĝin.

Yu diris: "Ni operacios vin post du tagoj. Bone ripozu kaj estu trankvila. Ni nepre bone faros la operacion laŭ nia plej

ebleco." Eldirinte tion, li forlasis la malsanulan ĉambron kun firmaj paŝoj. Aŭdinte tion, malgranda Gao eklarmis pro ekscitiĝo.

Je la 21-a de oktobro, 1978, en la hospitalo regis ekstrema kvieteco. Gao Tianshe en puŝĉaro estis malrapide portita de flegistoj en la operacian ĉambron.

La operacio daŭris 12 horojn. Post la finiĝo de la operacio li rimarkis, ke mirakle aperis dika kaj montra fingroj sur la resta parto de lia dekstra antaŭbrako. Rigardante la ekstreme laciĝintan Yu, kun larmoj li ekkriis nedeteneble: "Oh, mi reakiris manon!"

Post la operacio ostologo Yu zorgeme observis la kunkudritan vundon de la kriplulo. Post unu monato malgranda Gao komencis trejni sian novan manon. Post tri monatoj liaj


fingroj povis pinĉi kaj kapti. Kaj post ses monatoj li povis bruligi cigaredon, teni tason, manĝi, ŝakludi kaj skribi per la nova mano. Dank' al senĉesa trejnado lia mano ĉiam pli fortiĝis kaj la du fingroj povas levi objekton kun pezo de 15 funtoj. Tiel lia nova mano akiris fundamentan kapablon de ordinara mano.

Ostologo Yu sukcese kreis manon per operacio. Ĝi estas la unua en sia speco en la mondo! La Radio Pekino disaŭdigis la informon al la tuta lando kaj la tuta mondo.


Intutage la ambasadoro de Maroko al Ĉinio vizitis la hospitalon kaj ekvidinte la revivigitan manon li diris: "Bone, bone!" Li diris, ke se oni faros al lia filo tian manon, li nomos ĝin Zhongjia-mano.

Alitage usona specialisto venis en la hospitalon kaj estis mirigita de la mano farita per operacio. Post kelkaj minutoj li emocie diris: "La ĉina rekreita mano jam fariĝis socia novaĵo en Usono kaj alportis al la homaro ĝojigan informon."


*Antaŭ la operacio*



*Post la operacio*







*La Birda Insulo sur Qinghai-lago*

# Pri vojaĝo per aviadilo

**Ĉ**INIO havas vastan teritorion kun gigantaj montoj, majestaj altebenaĵoj kaj vastaj basenoj, kaj ankaŭ kun torentaj riveroj, dislokitaj lagoj kaj multaj apudmarbordaj insuloj. . . Ni faru rondveturan vojaĝon per aviadilo tra la tuta Ĉinio.

En serena oktobro ni ekflugas de Beijing (Pekino) nordorienten. Antaŭ ni sterniĝas la Nordorienta Ebenajo, la plej granda de Ĉinio. Ĝi havas areon de 350,000 kvadrataj kilometroj kun fekunda grundo kaj estas unu el la gravaj ĉinaj grenaj produktaĵoj. Okcidente de ĝi, staras montoj kaj montetoj kovritaj de densaj pinarbaroj similaj al verda maro. Tie estas la arbara regiono de la Granda Xing'an-montaro, la plej granda de Ĉinio. Sur la orienta deklivo de la montaro estas ĝia natura rezervejo, kiu havas areon de 480,000 hektaroj. Tiu rezervejo estas maro de arboj, en kiu vivas multaj specoj de sovaĝaj animaloj kaj plantoj. Sur Changbai-montaro en la orienta flanko de la ebenajo troviĝas grandega lago, la Ĉiela Baseno de Baitoushan, formita el kratero. Ĝi situas ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Koreio kaj la areo estas 9.38 kvadrataj kilometroj. Kiel la plej profunda lago de Ĉinio, ĝi havas bluan akvon kaj similas al peco da safiro inkrustita inter montoj.


Ĉe la bordo de Heilongjiang-rivero en la plej norda parto de Ĉinio, troviĝas la urbeto Mohe. Kiam oni estas okupiĝanta pri aŭtuna rikolto en Beijing en oktobro, Mohe jam portas neĝmantelon. Pro ĝia alta latitudo vintro daŭras tie ok monatojn kaj somero nur ĉ. du monatojn. Ĝia absoluta plej malalta temperaturo iam atingis 52.3° C sub nulo, tial oni donis al ĝi la nomon "Malvarmega Poluso de Ĉinio".

Ni flugis sudokcidenten, transveturinte la Grandan Xing'an-montaron, gregoj de bovoj kaj ŝafoj sin movas, kiel blankaj nuboj, sur la senlima stepo. Ĝi estas la plej granda stepo de Ĉinio Hulun Boir. Famaj Sanhe-ĉevaloj kaj Sanhebovoj produktiĝas en tiu regiono.

Kiam nia aviadilo flugis super la Altebenaĵo de Interna Mongolio ni vidis multajn montetojn. Laŭ aserto de geologo, ili estas bazaltaj vulkanaroj formitaj en la kvaternaro, inter kiuj la 204 vulkanoj ĉirkaŭ Hanbumiao formis la plej grandan vulkanaron de Ĉinio.


Ni flugis okcidenten al Xinjiang (Hingiang), kie kuŝas la famaj Tarim-baseno, Junggar-baseno kaj Turpan-baseno. La lasta lokiĝas ĉe la orienta flanko de Tianshan-montaro, la lago Aiding en la fundo de la baseno brilas arĝente, ĝia surfaco estas malalta 154 m. sub la marni-

*Kampoprotekta forsto sur Gobio de Xinjiang*





*Paŝta regiono sur la stepo de la Interna Mongolio*



velo, centre de la baseno estas okulfrapa ruĝa monto longa je 100 kilometroj, kiu estas de antikveco fame konata kiel Flama Monto. Ĉar ĝi konsistas el ruĝaj grejsaj rokoj, ruĝe brilas sub la ardanta suno kvazaŭ flamoj. Krome, pro tio ke la baseno estas ĉirkaŭita de altaj montoj, la temperaturo altiĝas rapide kaj malaltiĝas malrapide, kaj la klimato en la fino de somero estas ege varma kaj seka. La plej alta temperaturo iam atingis  $47.6^{\circ}$  C, tial ĝi ricevis la nomon "Flamanta Loko". En tiu loko abunde produktiĝas famaj senkernaj vinberoj kaj Hami-melonoj.

La aviadilo flugis sudokcidenten de Tianshan-montaro kaj aperis antaŭ ni la plej granda baseno de Ĉinio Tarim-baseno. Ĝia areo estas 530,000 kvadrataj kilometroj. Ĉe la norda parto de tiu baseno fluas la plej granda enlanda rivero Tarim-rivero, kiu longas je 2,179 kilometroj. Ĉe la orienta parto de la baseno kuŝas la lago Lopnor. La centro de la baseno estas Taklimakan-dezerto, la plej vasta de Ĉinio, kun areo de pli ol 320,000 kvadrataj kilometroj. Ĉirkaŭ la dezerto dis-

lokiĝas grandaj kaj malgrandaj oazoj similaj al smeraldoj inkrustitaj sur la vasta dezerto, tiel ke la seka dezerto aspektas viva.

De la suda parto de Tarim-baseno ni alflugis la plej altan altebenajon de Ĉinio — la Qinghai-Tibeta Altebenajo. Ĝi havas areon de 2,300,000 kvadrataj kilometroj kaj la meznombra alteco de ĝi estas pli ol 4,000 metroj super la marnivelo. Tibeto havas pli ol 1,000 grandajn kaj malgrandajn lagojn kun totala areo de 25,000 kvadrataj kilometroj. Malsupren rigardante el la aviadilo, ĉiuj lagoj kaj lagetoj, kiel speguloj, dislokiĝas inter la neĝmontoj. Qinghai-lago troviĝas sur la altebenajo. Tiu estas sallago kun areo de 4,427 kvadrataj kilometroj. Namu-lago estas granda lago, kiu estas la plej alta de la mondo super la marnivelo. Ĝi situas je 4,718 metroj super la marnivelo, kun areo de 1,940 kvadrataj kilometroj. Yarlungzangbo-rivero, la plej alta de la mondo super la marnivelo, kiel blanka rubando, sternaĝas sur la suda parto de la altebenajo kaj fluas orienten inter la montaroj Gangdise kaj Himalaya. Ĉe la suda rando de

la altebenajo estas Himalaya-montaro, la plej alta en la mondo. Ĝi situas ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Hindio, Nepalo, Sikimo, Bhutano, kaj estas 2,500 kilometrojn longa. La meznombra alteco de ĝiaj ĉefaj montpintoj estas 6,000 metroj super la marnivelo kaj superis tiun de ĉiuj aliaj montoj en la mondo. Qomolangma majeste staras ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Nepalo kun alteco de 8,848.13 metroj super la marnivelo, kaj estas la plej alta montpinto de la mondo. La herojaj montgrimpistoj de Ĉinio dufoje surgrimpis Qomolangma de ĝia norda deklivo kaj starigis la kvinstelan ruĝflagon sur la kulmino de la terglobo. Kiam ni rigardis malproksimen el la aviadilo, ni trovis ke Qomolangma ĉirkaŭita de ondantaj montaroj similas al majesta giganta piramido. En la montaroj troviĝas multaj valoj kaj glaciriveroj distendiĝantaj kvazaŭ arĝentaj serpentoj kune formis tre imponan pejzaĝon.

De la suda Tibeto ni flugas al Hengduan-montaro, en kiu estas profundaj ravinoj. Kiel glavoj la riveroj Nuĵiang, Lancang kaj Jinsha

trahakis la grandajn montojn kaj torentas al sudo en la ravinoj. Tie estas la fama regiono kun profundaj ravinoj. Jinsha-rivero estas la supra parto de Changjiang-rivero. Ĝi fontas el Geladandong-neĝmonto, la grandioza Tangula-montaro, similas al blanka rubando interliganta naŭ provincojn kaj unu municipon kaj fluas en la Orientan Ĉinan Maron ĉe la oriento de Wusong-enfluejo. Changjiang-rivero longas je 6,300 kilometroj kaj fluas en baseno de 1,800,000 kvadrataj kilometroj, ĝi estas la plej longa rivero de Ĉinio. La ravino Hutiao, kiu situas nordoriente de Shigu de Yunnan-provinco, kun profundeco de 3,000 metroj, estas unu el la plej profundaj ravinoj en la mondo.

Nia aviadilo flugis suden, kaj transveturis la ĉiam printempan urbon Kunming. De tie ni flugis orienten kaj atingis la sudokcidentan parton de Guizhou-provinco kaj vidis tie la torentan Huangguoshu-akvofalon. Sur la malhele verda tero, Beipanjiang-rivero similas al blanka rubando serpenta, Baishui-rivero ĉe la supra parto de Dabanghe-rivero galope torentas en la profundan Xiniu-lageton de sur la krutaĵo alta je 60 metroj. Nombro da akvokurtenoj larĝaj kaj longaj forte frapas la krutaĵon kaj sonas tondre. En la lageto la ondoj furiozas ŝprucigante disen akverojn. Vere impona estas la pejzaĝo!

La naturo prezentas al ni buntan bildon. Ni vidis ĉe Guilin kaj Yangshuo en la nordorienta parto de Guangxi (Guanghi) ĉarmegan pejzaĝon: majeste starantaj verdaj montoj kaj lazuraj riveroj kaj diversaspecaj groteskaj kavernoj.

Changjiang-rivero transfluas Sichuan-basenon kaj enfluas la tri famajn montgorĝojn ĉe la gubernio Fengjie. En tiu regiono estas profundaj ravinoj, furiozanta torento kaj tondre muĝantaj ondoj. Inter la tri montgorĝoj Xiling estas la plej longa en Ĉinio, kun longeco de 156 kilometroj.


Elfluante el la tri montgorĝoj Changjiang-rivero torentas sur la ebenaĵo de siaj meza kaj malsupra basenoj. Poyang-lago, kvazaŭ kukurbo, situanta ĉe la norda parto de Jiangxi (Gianghi)-provinco, ligiĝas kun Changjiang-rivero. Tiu lago havas areon de 3,000 kvadrataj kilometroj, estas la plej granda dolĉakva lago de Ĉinio. Poyang-lago estas la kunfluejo de la kvin riveroj Gan, Fu, Xin, Xiu kaj Rao. Ĝia malsupra parto enfluas en Changjiang-riveron. La surfaco de la lago estas tiel vasta, kvazaŭ ĝia rando tuŝiĝus kun la ĉielo. Ĉe la malsupra parto de Changjiang-rivero formiĝis la plej granda delto de Ĉinio. Ĝia areo estas 50,000 kvadrataj kilometroj. La delto kun multaj riveretoj kaj lagoj estas fekunda kaj abunda je fiŝoj kaj rizo. Ĉe la enfluejo de Changjiang-rivero, kuŝas langforma insuleto Chongming, kiu havas areon de 1,083 kvadrataj kilometroj.

Forlasinte Changjiang-enfluejon, ni veturis suden kaj atingis la

regionon Hangjiahu, kie abunde produktiĝas silkajo. Qiantang-rivero fluas preter la urbo Hangzhou. Ĝi estas fame konata pro sia impona spektaklo de tajdo. Ĉ. la 17-a de la oka monato laŭ luna kalendaro la tajdo estas plej superba. Sur la riverosurfaco oni povas vidi ke la marakvo brue fluas kontraŭ la fludirekto de la rivero kun rapideco de dekelkaj metroj en ĉiu sekundo. Antikvulo priskribis la scenon jene: "la vasta maro kontraŭfluas, kvazaŭ povanta engluti la sunon kaj la lunon. Estas vere belega pejzaĝo de la naturo!"

La aviadilo transflugis la verdan sudorientan marbordan regionon kaj traveturis la urbon Xiamen (Hiamen) de Fujian (Fugian)-provinco kaj la plej larĝan Taiwan-markolon de Ĉinio, kaj venis al la trezora insulo de Ĉinio — Taiwan (Tajvan)-provinco. Ĝi estas la plej granda insulo de Ĉinio kun areo de 35,760 kvadrataj kilometroj. Rigardate de supre, Taiwan similas al verda folio flosanta sur la malhele

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Qinghai
2. Yunnan
3. Wuyi-montaro
4. Lunan-a Jinnacia Aŭtonoma Gubernio
5. Hunan
6. Guangzhou

blua maro. Sur la insulo kun sufiĉa pluvkvanto ĉiam estas kiel prin-tempe kaj troviĝas ĉ. 100 termo-fontoj, pli multe ol ĉiuj aliaj provincoj.

La Suda Ĉina Maro ligiĝas kun la Orienta Ĉina Maro. Ĝi estas nia plej granda el la ĉinaj landlimaj maroj, kun areo de 3,600,000 kvadrataj kilometroj. Niaj sanktaj teritorioj Xisha-insularo, Nansha-insularo k.a. dissemiĝas en la Suda Ĉina Maro, inter kiuj Zengmu-rifo estas ĉe la plej suda rando de Ĉinio.

Turniĝinte, ni flugis norden kaj vidis ke sur la marsurfaco punktiĝas velŝipoj kaj multaj insuletoj. Tie estas la plej granda Zhoushan-insularo de Ĉinio ĉirkaŭ kiu abunde produktiĝas grandaj kaj malgrandaj

ŝtonkapaj fiŝoj, sepioj kaj trikiuroj, kaj ankaŭ estas la plej granda fiŝ-produktejo de Ĉinio.

Ni flugis trans la Flavan Maron kaj atingis la Orientan Ĉinan Maron. Ni trovis duoninsulon en formo de koko kiu apartigas Bohaimaron kaj la Flavan Maron. Ĝi estas la plej granda duoninsulo de Ĉinio — Shandong-duoninsulo. Ĝi kaj Liaodong-duoninsulo brakumas la plej grandan internan maron de Ĉinio Bohai-marono. Ĉe ĝia nordokcidento flava rivero fluas inter du gigantaj digo. Ĝi estas Huanghe (la Flava Rivero) famkonata tra la mondo pro la granda kvanto da sablo kunportata de ĝi. Oni konstatis, ke ĉiu kubmetro da ĝia akvo enhavas 37 kilogramojn da sablo, maksimume eĉ 590 kilogramojn.

Ĉiujare la riverlito de ĝia malsupra baseno altiĝas meznombro 10 centimetrojn kaj tiel la rivero fariĝis rivero super la tersurfaco.

La urbo Jinan (Ginan), situanta ĉe la suda bordo de Huanghe-rivero estas urbo kun plej multaj fontoj. Ĝenerale, oni nomas ĝin "Urbo de Fontoj". En tiu ĉi urbo troviĝas 72 fontoj. Oni ofte priskribas ĝian belecon per "fontakvo en ĉiu domo kaj plorsaliko en ĉiu korto".

Karaj amikoj, nia vojaĝo finiĝis. Hodiaŭ la ĉina popolo klopodas por efektiviĝi la kvar modernigojn. Ni kredas ke en la nemalproksima estonteco nia popolo certe konstruos sian grandan patrolandon en landon ankoraŭ pli belan, prosperan kaj potencon.

---

## Granda arta festivalo de nacimalplimulto

**O**KTOBRE de la pasinta jaro, okazis en Beijing (Pekino) granda arta festivalo de nacimalplimulto, en kiu partoprenis 1,834 artistoj el 55 nacimalplimulto kaj dum la daŭro de unu tuta monato ili prezentis 473 programerojn de danco, muziko, teatro kaj ĉjuji-o\*.

Tiuj programeroj kun naciecaj kaj buntaj temoj, formoj kaj stiloj estas elektitaj el dekmilo da programeroj de diversaj naciecoj en la lastaj du jaroj. Ekzemple, ĉiuj 30 programeroj prezentitaj de la artistoj de 13 nacimalplimulto de Xinjiang (Hingiang) estas novaj. La freŝeco de la artistoj kaj progra-

meroj de la trupo de la Interna Mongolio vidigis al ni la prosperiĝon de la literatura kaj arta afero sur la vasta stepo. Krom tibetaj kantoj kaj dancoj la tibeta trupo unuafoje surscenigis en la ĉefurbo ankaŭ kantojn kaj dancojn de la popoloj luoba-oj, deng-oj kaj ŝarba-oj vivantaj ĉe la montpiedo de Himalajo. Ankaŭ la heĝe-oj, la plej malgranda nacimalplimulto de nia lando, alsendis kelkajn knabinojn, kiuj prezentis heĝe-an popoldancon. Du aktoroj de la ĝino-a nacieco, kiu longe vivadas sur Letu-monto en Yunnan(Junnan)-provinco terkulturante per primitiva metodo kaj estis rekonata kiel aparta nacieco en la pasinta ja-

ro, ludis sian muzikon de bambutuboj, kaj tiel unuafoje havigis ŝancon al la publiko apreci la mirindan melodion de primitiva ĉasista vivo.

Kaj sur la scenejo de Beijing unuafoje prezentiĝis manĉuraj kantoj kaj dancoj, kiuj rikoltis multajn laŭdojn. En nia lando nun vivas 2,600,000 manĉuroj. Ekde la 17-a jarcento, la regantoj de tiu nacieco regadis Ĉinion dum pli ol 200 jaroj, tamen post la komenco de tiu ĉi jarcento, ĝia riĉa kulturo kaj arto malaperis iom post iom. En la lastaj jaroj, manĉuraj literaturistoj kaj artistoj komencis elfosi sian arton por ke ĝi disradiu denove.



La karakterizaĵo de tiu ĉi festivalo estas, ke la prezentitaj artaj verkoj havas intensan vivetoson, originalan artan komponon, frapan nacian koloron kaj relative fortan efekton.

Ekzemple, la danco "Dorsporti Novedzinon" prezentas al ni malnovan edzinigan moron de ji-nacieco. En la malnova socio, ji-naciecaj knabinoj vivantaj en Liangshan-montaro de Sichuan-provinco ofte estis subite forportitaj de rabistoj surdorse, kiuj ilin forvendis por perforta edziniĝo. Post la Liberiĝo, la ji-aj knabinoj ricevis la liberon en edziniĝo, tamen konserviĝis la malnova moro "dorsporti novedzinon" kaj estis observata en geedziĝa ceremonio, nome anstataŭ mem iri al la domo de la novedzo, la novedzino devas esti tien dorsportata de junulo alsendita de la novedza familio. La danco "Dorsporti Novedzinon" tre interesas la spektantaron per sia priskribo de la ŝajnigitaj konfliktoj inter la perfortaj rabantoj kaj rezistantaj novedzino kaj ŝiaj parencoj. El tiu danco oni povas vidi profundan ŝanĝon en la socio de la ji-oj.

La mongola danco "Peza Ŝarĝo, Longa Vojo" prezentas, per personigita kamelo, la neŝanceblan persistemon de la popolo de Interna Mongolio en konstruado de nia lando. Tre sukcesaj estis ankaŭ la dancoj "Tapiŝo" kiu priskribas la vivon de ujuraj teksistinoj, "Perlokolektado" kiu priskribas laboradon de ĝing-aj knabinoj, kaj "Gaŭŝan-a Amkanto" kiu prezentas la sopiron de gaŭŝan-oj vivantaj sur la ĉina ĉeftero al siaj karuloj kaj rekuniĝo de Taivan kun la patrolando.

La trupo de la Ningxia (Ninghia)-a Huj-nacieca Aŭtonoma

Regiono prezentis la operon "Mansuer" en kvin aktoj, kies kantoj prenas la formon de "hua-er". Tiu teatraĵo pri antikva amo-legendo forte interesis la spektantaron per sia originaleco. "Hua-er" estas tradicia ĝenerala formo de popolkantoj de la nordokcidenta huj-nacieco. Kiam okazas grandioza hua-erkunveno, popolanoj iras al la kunvenejo kun ŝafaro, tendo sur ŝarĝbruto, sakoj de rostita faruno surdorse kaj vino en mano por prezenti improvizitajn kantojn en konkurso.

La danco "Frapado al Kalkano" prezentas ludon de mjaŭ-aj gejunuloj en kamparo, kiuj esprimas sian amon per ĵeto de terbuloj al ies kalkano. Oni diras, ke ju pli forta estas la frapo, des pli profundan amon ĝi esprimas. Kaj tian ludon oni daŭrigas ĝis interŝanĝo de donacoj por gefianĉiĝi. La gajaj viglaj paŝoj de la dancantoj bone montris la optimismon kaj entuziasmon de la mjaŭ-aj gejunuloj. "Paŝtado de Leono" estas tibetana danco

kun historio de ĉ. 300 jaroj, kiu estas populara en la areo ĉirkaŭ la fonto de Huanghe (Flava Rivero). Ĝi detale priskribas la amon, bredadon, amuzadon kaj dresadon al la leono fare de bredisto.

Inter la prezentitaj muzikaĵoj, apartan intereson vekis la ampleksa antikva muzika verko "Blanka Gazo" de la naŝi-a popolo en Yunnan (Junnan)-provinco. Oni diras, ke tiu muzika verko estis donacita de la mongola ĉefo Kublaj-Hano al naŝi-a ĉefo en la 13-a jarcento, kiam li militiris kun sia armeo al la sudo. Post longtempa cirkulado kaj modifado, ĝi fariĝis popola muzikaĵo de la naŝi-a popolo. Ĝi sonas sentimentale kaj kortuŝe. Ĉifoje oni ludis nur tri partojn el ĝi. El ĝia melodio kun ĉarmo de antikva simpleco oni povas percepti la kunfandiĝon, evoluon kaj disvolviĝon de la muzika arto de la ĉinaj naciecoj.

En la festivalo, centoj da reformitaj antikvaj naciaj muziki-

#### *Manĉura danco*



loj donis novajn sonojn. La mongola pluka instrumento hobuso estis reformita laŭ projekto de han-a princino Wang Zhaojun antaŭ du mil jaroj, kiam ŝi estis edziniĝonta al huna reĝo loĝanta ekster la Granda Muro. Tiu instrumento deveninta de bivo malaperis antaŭ longe, sed mongola muzikisto Ĉingeltu faris esploradon kaj sukcesis ĝin refari post kvarjara klopodado kaj ludis ĝin en la festivalo.

Tiu ĉi festivalo estas ankaŭ parado de profesiaj kaj amatoraj artistoj de la 55 nacimalplimultoj de Ĉinio.

Brilaj artaj steloj de nacimalplimultoj kiuj debutis en la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj, kiel ekzemple la mongola Modegma, la tibeta Caitan Ĝolma kaj la ujugura Kangbarhan, ĉifoje kolektiĝis denove kaj montris sur sama scenejo sian energiecon promesplenan kiel antaŭe. Samtempe ankaŭ aperis multaj novaj brilegaj steloj sur la scenejo de nacimalplimulta arto. La



*La tibeta dramo "Jialuwenba-danco"*

meznombra aĝo de la artistoj en la festivalo estas sub 25 jaroj. Ĉirkaŭ 90 procentoj de la prezentitaj programeroj estas verkitaj kaj luditaj de junuloj. Ĉiuj membroj de la trupo de Zhejiang (Ĝegiang)-provinco estas junaj amatoroj el kiuj 13 ŝe-oj estas la-

boristoj, kamparanoj kaj studentoj el montregiono.

Tiuj novaj steloj ĝenerale maturiĝis frue pro tio, ke ili baniĝas en la maro de nacieca arto de sia infanaĝo. Ekzemple, la juna jugur-a kantistino Yinxiangjisi veninta de la piedo de

*La danco "Perlokolektado"*



*La opero "Mansur"*





Qilian-montaro havas patron, kiu estas kantisto, kaj patrino kaj fraton, kiuj estas lertaj en kantado. Kiam ŝi estis 4-jara, ŝi jam scipovis bele kanti popolkantojn kaj kiam ŝi fariĝis mezlernejanino, ŝi ricevis la titolon "Lotusfloro en Dezerto". La 20-jara Alataj famiĝis sur la vasta stepo de sia hejmloko jam de sia infaneco pro sia brila talento en muzikarto kaj ŝi estis

laŭdita kiel la plej bona mez-sopranulino en tiu ĉi festivalo. La aktorino, kiu faris sensacion per sia ĉjang-nacieca solo-danco "Ŝafkorna Floro" estas elektristino kun aĝo de 20 jaroj. Ji-jueerpo, ludisto de ji-nacieca ŝeng-o (bambutuba buŝharmoniko), estas malpli ol 13-jara, kaj tamen li jam ellernis preskaŭ tute la ŝeng-an ludarton de sia patro. Li estis premiita jam

en la landa kamparana arta festivalo en 1978.

Dum la festivalo, oni ankaŭ aranĝis 12 kunvenojn por interfluo de artoj de ĉiuj naciecoj kaj la verkistoj kaj aktoroj de eminentaj programeroj interŝanĝis sian sperton.

*Ĉuji-o estas la komuna nomo de ĉinaj popolaj artoj kiel rakontado, kantrakontado, humura dialogo k.a.*



ARMAND SU:

**T**IAN Xiaofei estas tre simpla kaj ordinara ĉina knabineto. Ĝuste ŝi akiris premion en la enlanda Konkurso de Poezio de Mondaj Infanoj organizita de UNESKO en septembro de 1980. La tuta familio ekjubilis pri tiu ĉi malordinara evento en la vivo de la 9-jara knabineto.


Ŝia patro estas redaktoro de iu literatura revuo en Tianjin kaj ŝia patrino estas instruistino ĉinlingva en iu mezlernejo. Ŝi havas ankoraŭ unu pliaĝan fraton, kiu studas diligente. En ŝia ĉambro estas multaj libroj kaj gazetoj, kaj ĝuste inter ili vivas nia malgranda Xiaofei.

Ŝi ne nur emas legadi, sed ankaŭ amas florojn, malgrandajn bestojn, amas kantadon, desegnadon kaj muzikon. Jam delonge ŝi provas ludi pianon, erhu-on (dukorda arĉmuzikilo) kaj biven. Krome, ŝi tre amas legadi kaj skribadi taglibron, rakontetojn, poemetojn ktp. Kaj ŝi ŝatas legadi klasikajn verkojn kaj ĉiam demandadis al siaj gepatroj kaj frato pri ĉio nekomprenebla. Ili pacience klarigis al ŝi ĉion.

Sed fakte, ŝi estas nur knabineto. Ŝi petolas, ludas kun bestoj, ofte kuras post kato kaj multe ŝvitas.

Ŝi ne trompis la esperon de la familio kaj fine akiris premion en la enlanda Konkurso de Poezio de Mondaj Infanoj organizita de UNESKO kaj tiel montris por la unua fojo sian talenton per la poemo "BONVENIGON AL PLI BELA MORGAŬO". Ne forgesu, ke inter preskaŭ 90,000 poemoj estis elektitaj nur ok poemoj — unu estas tiu de Tian Xiaofei — nia petola kaj vivema knabineto!

*Armand Su kaj Tian Xiaofei*



# Tian Xiaofei—Nova floreto en la ĉina poezio





TIAN XIAOFEI:

# Bonvenigon al la bela morgaŭo



*Mi sonĝis,  
ke mi venas en ĝardenon.  
Multaj infanoj  
tie laboras.  
Ies vizaĝoj estas blankaj,  
ies haŭto nigre-ruĝe koloras,  
iuj havas blondajn harojn,  
iuj bluan okulparon.  
Vi helpas min florojn akvumi kaj arbojn planti,  
mi helpas vin eltiri herbojn kaj kapti insektojn.  
Iu nigra knabo, veturante per kosmoŝipo  
plukis multajn stelojn de l' ĉielo  
kaj pendigis stelojn sur arbojn.  
En la ĝardeno ĉie brilis kandelabroj.  
Ni kantis kaj la membrojn dance movis,  
en la ĝardeno jen kaj jen zefiro blovis . . .  
Vekiĝinte, mi rakontis ĉion al panjo.  
Panjo diris: "Tio ne estas sonĝo,  
ja tiel estos la morgaŭo —  
feliĉo, paco."*

(Trad. ARMAND SU)



\* K-do Jan Vedevik (60-jara oficisto), 40101 Goteborg I, Svedlando, volonte kor. kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

\* Milošević Jovica (27-jara), Naselje "Elmos", Z-18 2/3, 35000 Sveztozarevo, Jugoslavio, dez. kor.

\* S-ro Heikki Ojala (41-jara instruisto de kemio), Korvanranta 50 B 19, FI-96300 Roi 30, Finnlando, kun ĉina amiko por plibonigi sian ĉinan lingvon.

\* S-ro Curnier, 29-strato Beauferrier, 24100 Bergerac, Francio, dez. kor. kun instruisto en Ĉinio.

\* John Pearce (55-jara instruisto), "Greenacve", Sandmead Road, Sandford, Bristol, BS19-5QG, England (Britio), kun geesp-istoj pri kurantaj aferoj.

\* Višnya Knezević (20-jara studentino), Naselje 8 Mart 17A/III, 41410 V. Gorica, Jugoslavio, dez. kor. kun ĉinaj gejunuloj.

\* Robert Sarrut (35-jara instruisto), Lachamp 48300 Langogne, Francio, kun geesp-istoj, precipe el sudorienta Azio, Japanio, Ĉinio pri psikologio, psikoterapio, pedagogio. k.s.

\* S-ino Lorent Jacgveline (57-jara), Leuvensesteenweg, 352, 2960 Muizen Belgio, kun geviroj samaĝaj pri ĉiuj temoj.

\* Bomuslav, Mavik, Janov 4, Lit-


vinova, 43542 RA16, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. kun ĉinaj esperantaj kluboj aŭ korespondantoj pri la praktika vivo.

\* Cornelius J. McKown, 460 Orland Ave, State College, PA, 16801 USA, kun ĉinaj esp-istoj pri ĉiuj temoj kaj aparte pri bibliotekoj, informadikoj kaj religioj.

\* R. Melo, 34, Av. de Russie, F. 03700 Bellerive s/A. Francio, dez. kor. pri diversaj temoj: filozofio, parapsikologio, kutimoj kaj interŝanĝi p.m.

\* Raković Dejan (20-jara studento), str. Nivole Vopernika, 37/20, 18000 Niš, Jugoslavio, kun geamikoj en Ĉinio, Indonezio, Hongkong, Svedio, Japanio, Koreio, Vjetnamio, Meksikio, Pollando kaj Greklando.

## Simpozio pri la ĉina literaturo en Parizo



*Parto de la simpozio. Iniciatinto Robert Rhulmann sidas ĉe la dekstra fino de la unua vico*

**E**N la meza tagdeko de junio de 1980 la franca "Fonduso Singer-Polignac" okazigis en Parizo Simpozion pri la Literaturaĵoj de Ĉinio en la periodo de ĝia Kontraŭjapana Rezistmilito. La simpozion ĉeestis pli ol 40 profesoroj, erudiciuloj, poetoj kaj verkistoj el Ĉinio, Francio, Italio, Britio, Usono, Nederlando, Kanado, la Germana Federacia Respubliko, la Germana Demokratia Respubliko kaj Xianggang (Hongkong). Ili kaj la observantoj nombris preskaŭ 100. Ĝin ĉeestis ĉinaj verkistoj Liu Baiyu, poeto Ai Qing, literatura kaj arta teoriisto Kong Luosun, dramisto Wu Zuguang kaj aliaj.

La simpozion iniciatis s-ro Robert Rhulmann, dekanato de la

ĉinlingva fakultato de la Instituto de Orientaj Lingvoj de la Pariza Tria Universitato. Li, diplomito de la Ĉina-Franca Universitato de Beijing (Pekino), havas grandan intereson pri la ĉina literaturo. Kvankam li aĝas jam pli ol 60 jarojn, tamen li montras sin ankoraŭ energio-plena kaj entuziasma. Lia helpantino en tiu laboro estas Bai Yuegui, kiu instruas ankaŭ en la Instituto de Orientaj Lingvoj.

La simpozio prenis sian lokon en la muzika halo de la fonduso. Ĝian inaŭguron prezidis Wolf, prezidanto de la Fonduso kaj akademiano de la Franca Akademio, kaj franca verkisto Peyrefitte donis salutvortojn al ĝi. Li diris, ke en la Dua Mondmilito Francio kaj Ĉinio ambaŭ estis

agresataj kaj nombro da iliaj verkistoj partoprenis en la kontraŭfaŝisma batalo kaj skribis multajn verkojn edukantajn la popolon por defendi la patrolandon. Li diris, ke verkisto estas spegulo de epoko kaj devas fidele speguli epokon. Lia parolado rikoltis varman manklakadon de la tuta ĉeestantaro.

En siaj paroladoj en la simpozio la ĉeestantoj faris seriozan analizon al verkoj de ĉinaj verkistoj Mao Dun, Lao She, Ding Ling, Ai Qing, Sha Ting, Ai Wu, Wen Yiduo, Feng Zhi, Yu Dafu, Dai Wangshu, Bian Zhilin kaj Duanmu Hongliang. En la tagordo de la simpozio estis raporto de sovetunia verkisto Fedorenko pri ĉina verkisto Zhao Shuli, sed li ne venis laŭdire pro malsukceso pri vizo.

Mia parolado temis "Pri la Literatura Movado en la Shanxi-Suiyuan-a Kontraŭjapana Bazloko", en kiu mi rakontis, kiel kulturiĝis nombro da junaj talentaj verkistoj en tiu malriĉa kaj postiĝinta malfronta bazloko kaj sub la malfacilaj kondiĉoj de senĉesaj kruelaj balaaj operacioj de la malamikoj, kaj kiel ili eĉ nun aktivadas en la ĉina literatura rondo. Mi citis iliajn nomojn kaj verkojn. Mia parolado daŭris nur 15 minutojn. Oni elmetis al mi nemalmultajn demandojn kaj mi respondis ilin laŭ mia scio sen ia ajn beligo kaj mensogo kaj tio ricevis laŭdojn de multaj ĉeestantoj. Tio mon-

tris, ke ĉu ĉinoj aŭ fremduloj, ĉiuj volas aŭskulti veraĵon.

El la paroloj de fremdlandaj amikoj ni rimarkis, ke ili legis multajn materialojn pri la ĉina literaturo kaj faris seriozan esploron pri ili. En amika atmosfero oni senkaŝe interŝanĝis opiniojn. La paroladoj de kanada verkistino Cui Shuying kaj usona verkisto Goiz vekis ĉe mi grandan atenton. Cui detale analizis fonon de la novelo de Zhang Tianyi "S-ro Hua Wei" kaj ĝian priskribon pri personoj.

S-ro Goiz pritraktis la novkulturan movadon de la Nova Kvara Armeo. Li aparte prezentis junan verkiston Qiu Dongping kaj analizis liajn verkojn. Tiu junulo brave oferis sian vivon en milito. Post lia parolado ĉina verkisto Liu Baiyu esprimis al li dankon.

La simpozio ne invitis japanajn amikojn. Sed mi scias, ke japanaj verkistoj alte taksas ĉinajn literaturaĵojn priskribantajn la Kontraŭjapanan Rezist-

militon. Antaŭlonge ili jam eldonis tiajn verkojn en la japana traduko, ekzemple "Herooj de Luliang" verkita de mi kaj Xi Rong estis eldonita de ili en la japana lingvo, ili eĉ donis al la tradukajo novan titolon "Pereo de la Orientaj Diabloj".

La simpozio daŭris 4 tagojn. Dum tagmanĝo kaj kaf-trinkado ni ĉinaj verkistoj estis ofte ĉirkaŭataj de aliaj. Oni volis profiti tiun ŝancon por pli multe informiĝi pri la ĉina literaturo. Ni interparolis libere. Nermalmultaj amikoj demandis min pri la fama ĉina verkisto Zhao Shuli. Informiĝinte ke li mortis en la kultura revolucio, ili sentis grandan bedaŭron. S-ro Holm de Oksford-universitato diris al mi, ke li abonis unu ekzempleron de la ĉina monata literatura revuo "Fenshui-rivero" kaj serioze legis ĉiun ĝian numeron. S-ro Kubin de la Libera Universitato de Berlino diris, ke li interesiĝis pri la noveloj de ĉina verkisto Xi Rong kaj tradukis lian novelon "Ordinara

Laborposteno" en la germanan lingvon.

Iu franca amiko demandis min: "Kiun verkon el fremda lando vi legis plej frue?" Mi respondis, ke la unua fremdlanda novelo legita de mi en mia 15-jara aĝo estis "La Lasta Lektiono" de franca verkisto Alphonse Daudet. Tiam mi lernis en elementa lernejo kaj la novelo estis enmetita en nian lernolibron. Kiam nia instruisto klarigis tiun tekston, ni ĉiuj kaj ankaŭ la instruisto larmis, ĉar tiam potenca malamiko minacis nian patrolandon.

Antaŭ la simpozio estis aranĝita malgranda koncerto, en kiu muzika amatorino Tan Xuemei kaj kelkaj aliaj francaj amikoj kantis kaj ludis plurajn ĉinajn nacisavajn kantojn, kio plidensigis la etoson de la simpozio.

---

*\* Ma Feng estas fama ĉina verkisto, kiu nun funkcias kiel prezidanto de la Shanxi-a Literatura kaj Arta Federacio kaj konsilanto de la Ĉina Verkista Asocio.*

*Prezidanto de la Fonduso s-ro Wolf (meze, en okulvitoj), ĉina verkisto Liu Baiyu (maldekstre de li), ĉina Verkisto Wu Zuguang (dekstre de li) kaj la aŭtoro Ma Feng (la unua de dekstre en la unua vico)*





GIOVANNI PASCOLI (Italio):

## Valentino

*Ho Valentino, tutnove vestita,  
kiel burĝonoj de blanka kratag'!  
Nur piedetoj rubuse skrapitaj  
hauĉon surportas de l' fora naskig'.*

*Portas vi ŝuojn faritajn de panjo,  
kiujn ne ŝanĝis de tiu fortag',  
kiuj moneron ne kostis, kontraŭe  
kostas la vesto, kudrita de ŝi.*

*Kostas, ja costas, ĉar tute malplenas  
tiu tintanta ŝpariga monuj':*

*nun ĝi vakuas, kaj pli ol monaton  
por ĝin plenigi kantadis kokej'.*

*Pensu, januare, ke l' fajro de ŝtupo  
ja ne sufiĉis: vi tremis, ho ve!  
kantis kokinoj, rekantis: "Jen ovo,  
jen, jen oveto, oveto por ĉi!"*

*Poste kokinoj elkovis, kaj venis  
marto, kaj vi, kampuleto sen rev',  
meze restadis, tiele, kun plumoj,  
sed nudpiede, samkiel birdet':*

*Kiel birdet' alveninta de l' maro,  
kiu ne scias, en sia traflug',  
ĉu . . . ĉu krom beki, krom kanti, krom ami,  
estas alia feliĉo en kor'.*

Elitaligis: GIOVANNI ROATTINO

XU MINGYUAN:



EN la ora monato oktobro, la popolo de Beijing (Pekino) havis la honoron akcepti la Delegacion de la Urbo Stokholmo estratan de sinjoro Rutger Palme, prezidanto de la urbaj konsilantaro kaj magistrato de Stokholmo. Informiĝinte pri la vizito de s-ro R. Palme al Beijing, mi rememoris la "piratan vesperfestenon" aranĝitan de li en la ĉefurbo de Svedio honore al la Amikeca Delegacio de Beijing antaŭ du jaroj, kiu impresis min per originaleco.

La festeno okazis en la restoracio Högloftet en la parko

## "Pirata Vesperfesteno" en Stokholmo

Skansen de Stokholmo. La verdaj kaj kvieteco en kiuj troviĝis la restoracio pliigis la eksterordinaran etoson de la festeno.

Descendinte de la aŭto, ni tuj rimarkis, ke brile flamas torĉegoj ambaŭflanke de la pordego de la restoracio. Enirinte ĝin, ni vidis gardistojn kun pirata kasko surkape kaj spado enmane. Kiam ni alproksimiĝis al ili, ni trovis, ke ili estas gesinjoroj Palme, kiuj staras tie por saluti la gastojn. Je nia alveno, oni tuj donis al ni po unu kaskon kaj unu spadon.

Ni eniris la salonon kaj konstatis, ke ĉiuj gastoj, ĉu viraj aŭ inaj, estas senescepte en tia kostumo. Ĉe la mezo de la salono staris barelego plena je biero. Iu servisto plene armita kiel "pirato" ĉerpadis bieron per ligna

kulerego kaj ĝin verŝadis en fajencajn pokalojn. Li aspektis kiel impona militisto, tamen sintenis ĝentile kaj disdonis al ĉiu pokalon da biero kaj pecon da sandviĉo kun enmetita fumajita fiŝo.

Kiam ni estis interbabilantaj dum la manĝeto, subite aŭdiĝis frapego al la planko kaj iu kolosa "pirato" kriis laŭte: "Bonvolu iri supren por la festeno!" Kondukate de prezidanto R. Palme ni iris en la festenan salonon en la supra etaĝo. Ĉiuj ekridis kore pro la originaleco de tiu aranĝo.

Kiam ĉiuj altabliĝis, sur la podiumo iu "pirato" ekludis bonvenigan arion sur piano kaj alia "pirato" ekkantis. Laŭ la melodio kvar "piratinoj" kune alportis la unuan pladon sovaĝe dan-

cante. Post dancado en la mezo de la salono, ili portis la manĝaĵon al ĉiu gasto, kaj poste reiriĝis dancante laŭ la muziko. Tiam eksplodis varma manklado. Kaj tiel sekvis la dua kaj tria pladoj.

Kiam ĉiuj ĝoje tostis, la pianoludanta "pirato" subite ordonis, ke ĉiuj kantu laŭ lia muziko. Pro tio, ke oni ne bone sciis la tekstojn de la kanto, multaj nur zumis mallaŭte. Tio "kolerigis" la "piraton". Li forte jetis sian spadon sur la tablon kaj kriis sovaĝe: "Kial vi ne kantas energie?" Kaj montrante al la tablo, kie sidas pli multaj svedaj mastroj, li rimarkigis: "Vi maldiligentaj! Kantu energie, ju pli energie, des pli bone!" Kaj laŭta entuziasma kanto tuj plenigis la salonon:

*Ju pli longe ni kunestas, ni  
kunestas,  
des pli ĝoj' sin manifestas!  
Ĉar ni estas ja amikoj,  
ju pli longe ni kunestas,  
des pli ĝoj' sin manifestas!*

Ni legis en historia literaturo, ke la jaroj de 800 ĝis 1,050 p.K. estis "pirata periodo" en la historio de Svedio. Ankoraŭ hodiaŭ iuj svedaj literaturaj kaj belartaj verkoj kaj eĉ afiŝoj ligiĝas kun la temo "pirato". La "pirata vesperfesteno", kiu tiel vivece reaperigis scenon de pirata vivo priskribita en historiaj kaj literaturaj verkoj, kvazaŭ reportis nin en la mezepokon. La humura sinteno, sprita lingvo kaj versimila prezentado de la servistoj de la restoracio en rolado de "piratoj" donis al ni profundan impreson.

Dum tiu vesperfesteno, la grandanimeco kaj gastamo de la

sveda popolo estis plene manifestitaj. Prezidanto R. Palme kaj Wang Xiaoyi, la estro de la Amikeca Delegacio de Beijing, intime interparoladis kaj tostadis kiel malnovaj amikoj. Prezidanto R. Palme diris, ke kvankam la ĉina kaj sveda popoloj vivas tre malproksime unu de la alia, tamen la amikeco inter ili estas tre profunda. En intima babilado, iu membro de la urba konsilantaro respondeanta pri financoj afable demandis nin pri la politika kaj ekonomia stato en nia lando kaj pri niaj familioj. Li skribis la vortojn "la amikeco el Stokholmo" sur la kaskoj kaj spadoj de li kaj lia edzino, skribis sian nomon sur ili kaj sincere petis nin transdoni la donacaĵojn al infanoj de membroj de la delegacio.

Post tri pladoj kaj dolĉaĵoj oni alportis fruktojn. Kelkaj "piratinoj" aperis kun po unu majstango surŝultre, sur kiu pendis multaj elegantaj korbetoj plenaj de figoj, kaj paŝis al ĉiu laŭ takto de la muziko por disdoni la fruktojn.

Fine komenciĝis kolektiva danco. Gesinjoroj R. Palme kondukis la membrojn de nia delegacio man-en-mane en la fronto, ĉiuj formis rondojn el longa vico de homoj kaj ekdancis en la antikveca salono de la restoracio. Amikeco kaj entuziasmo saturis la amuziĝon. Kiam ni diris adiaŭ unu al alia, iu sveda amiko, kiu scipovas la ĉinan lingvon, demandis nin, ĉu la vesperfesteno plaĉas al ni. Ni tuj respondis, ke ĝi pliigis la amikecon kaj vastigis nian vidkampon, ni tre tre ĝojis pro ĝi. Kaj poste tiu amiko ĝoje deklamis jenajn versojn en la ĉina lingvo:

*Ni tre ĝojas pro l' amikoj  
malproksimaj  
kaj disvolv' de l' amikeco  
sveda-ĉina.*

Du jaroj jam forpasis depon la "pirata vesperfesteno", tamen ĉiam firme restas en mia memoro la gastamo de la sveda popolo kaj la varma akcepto kaj amikeco de la Magistrato de Stokholmo al ni.

*La Amikeca Delegacio de Beijing vizitas la Ĉinan Domon en Stokholmo.*





Recenzo pri  
 “Aŭtuno en la Printempo”  
 Familia Despotismo

Tiu mallonga romano, kiun la aŭtoro mem karakterizas kiel “milde ploran rakonton” estas la amare dolĉa amhistorio de juna paro, kies melankolia feliĉo rompiĝas pro la tradicia familia despotismo. La knabino mortas pro la nefleksebla decido de la patro, kiu abomenas aliprovincanojn kaj kies vortoj estas “kvazaŭ citaĵoj el klasikaj verkoj”. Per sia rakonto Ba Jin (1904 —), kiu estas konsiderinda ĉina verkisto kaj esperantisto veterano, eldiras, tute kiel iam Emilo Zola, sian “mi akuzas” kontraŭ la maljusteco de la socio kaj kontraŭ la subpremita pozicio de la virino.

En tri antaŭparoloj (1932, 1978, 1980), la aŭtoro informas pri la historio de sia verko, pro ties origino kaj titolo (inversigiĵo de la Bagia “Printempo en la Aŭtuno”).

Rikardo Sulco  
 (— Heroldo de Esperanto)

**BA JIN:**

**AŬTUNO EN LA  
 PRINTEMPO**

Esperantigis Laŭlum  
 Ilustris Yao Youxin  
 148×210mm. 116paĝoj

Numero: 10-Es-1525

Prezo: broŝ. £2,40 US\$4,90  
 bind. £2,90 US\$5,90

Mendu ĉe peranto de EPC  
 aŭ Esperanta Sekcio  
 de GUOJI SHUDIAN,  
 P.O. Kesto 313,  
 Beijing, Ĉinio



**SILKA PORTRETO DE**

**ZAMENHOFF**

Formato: 27×40cm

Prezo: US\$4,50

Mendu ĉe: Libroservo de ĈEL  
 P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio


Ni petas peradon de landaj asocioj de UEA kaj EPC-perantoj. La peranta rabato estas 33%.

Ankaŭ mendebla ĉe Libroservo de UEA (je 9,00gld.)






Chen Yuan (dekstre), vicprezidanto de ĈEL, kaj Isobe Yukiko, estrino de JEI




La vizitgrupo de JEI en la parko Ĉiela Altaro

## Bonvenon al la Amikeca Vizitgrupo al Ĉinio de JEI

La vizitgrupo de JEI sur la Granda Muro






Xue Chengzhi (Seĉencz), prezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio, kaj membroj de la vizitgrupo de JEI reciprokas saluton.



Ge Baoquan, estro de la prepara grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo, faras paroladon por bonvenigi la vizitgrupon de JEI en la tekunsido.



En trajno al la Granda Muro la vizitgrupo de JEI hazarde renkontiĝas kun aŭstralia esperantistino Kay Morrison.





La prepara grupo de SEA okazigas kunsidon en la klasĉambro de la Esperanta kurso de la Shanghai-a Tekstila Instituto por bonvenigi la vizitgrupon de JEI.



Japanaj kaj ĉinaj geesperantistoj skribas sian nomon unu por alia.



La vizitgrupo de JEI vizitas la Esperantan kurson de la Beijing-a Lingva Instituto.




# Rajdado de mongoloj

La mongoloj sur la stepo de la Interna Mongolio estas tre lertaj en rajdado. Rajdo estas unu el iliaj ŝatataj tradiciaj sportoj.



Tra fajra ringego



Arkopafado sur ĉevaloj



Pilkludo sur ĉevaloj: La pilko havas diametron de 150 centimetroj. Ĉiú el la du rivalaj teamoj konsistas el 4 homoj. Dum la ludado la rajdantoj direktas sian ĉevalon, kiu puŝas la pilkon per sia brusto, kaj ankaŭ la rajdantoj rajtas frapi la pilkon per piedoj aŭ manoj.



# Torĉa Festo de Sani-oj

de WANG ZHIXUAN

**E**N serena tago mi kaj miaj kunvojaĝantoj venis al la Lunan-a Ji-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Yunnan (Junnan)-provinco por rigardi diversformajn ŝtonarbojn. Estis bonŝance, ke tie okazas la Torĉa Festo. Tie estas hejmloko de sani-oj, unu el la branĉoj de ji-nacieco. Ni sentis grandan feliĉon pasigi la festotagon kune kun gastamaj sani-oj.


Antaŭvespere de la festo sani-aj domoj kaŝitaj inter pinoj kaj bambuaroj estis plenaj de ridoj. Iuj buĉis bovojn aŭ ŝafojn por prepari abundajn frandaĵojn; aliaj elektis por si ŝtofojn en la Vendejo de

Naciecaj Varoj por fari festajn vestojn; kaj triaj kolektis pinbranĉojn kaj florojn por konstrui ornamitajn arkaĵojn ĉe la vilaĝinoj.

La festotago estas la 24-a de la sesa monato laŭ la luna kalendaro (t. e. aŭgusto). Tuj post kiam falis la nokta vualo, milda zefiro alportis al ni agrablan melodion kaj kanton. Momenton poste, en nebula nokto ekbrulis fajroj en kaj ekster vilaĝo, kiuj dancadis en vento kaj vidiĝis de malproksime kvazaŭ steloj dise brilantaj sur la tero. Enirinte la vilaĝon ni trovis, ke oni, tenante torĉon en la mano, gratulas unu alian kaj gaje dancas


kaj kantas ĉirkaŭ kampfajroj. En tiu sceno ni sentis nin kvazaŭ en fabela mondo.

Ni informiĝis de maljuna sani-o pri la deveno de la festo. Pri ĝi cirkulas kortuŝa rakonto. Laŭdire, en antikveco troviĝis feŭdĉefo. Li faris ĉiajn malbonojn kontraŭ la sani-a popolo kaj vekis ĝisostan malamon ĉe la lasta. Por renversilian despotan regadon, sani-oj leviĝis al batalo unuj post aliaj. La ĉefo konstruigis kastelon sur la monto kaj postenigis multajn soldatojn por ĝin defendi, tial ĝi estis malfacile konkerebla. La leviĝintoj decidis artifike preni ĝin. En iu



Natura scenejo





nokto, klarionante kaj tamburante ili kun armilo en la mano pelis milojn da kaproj kun torĉoj sur la kornoj al la monto. La vekita ĉefo konsterniĝis de la fajroj ekster la kastelo. Ĉe tio la leviĝintoj tuj sturmis al ĝi kaj konkeris ĝin per unu spiro. Tiu tago estis ĝuste la 24-a de la sesa monato laŭ la luna kalendaro. Por celebri la venkon la sani-oj difinis la tagon kiel Torĉan Feston, kiu de tiam okazas ĉiujare.

Laŭ moro, en la festo la sani-oj okazigas ankaŭ artan festivalon, taŭrludon, lukton kaj aliajn aktivadojn, kiuj prenas lokon laŭvice en komunumoj aŭ brigadoj de la gubernio. Ankaŭ la gvidantoj de diversaj niveloj de la gubernio partoprenas en la festaj aktivadoj.


Ni veturis en aŭto al la amuzejo laŭ serpentuma montvojo. Rigardante tra la fenestro, ni vidis, ke ondas verdaj rizkampoj, trembrilas akvo en akvorezervejo kaj lago sur altebenaĵo kaj sin paŝtas gregoj de bovoj kaj ŝafoj. Ni apenaŭ kre-

dis, ke tie estis malriĉa montregiono en la pasinteco.

Post nelonga veturado ni atingis la cellokon, kiu sidas dorse al monto kaj fronte al rivero. En la mezo de ĝi troviĝas gazono — natura scenejo kaj ĉirkaŭ ĝi staras miraklaj karstaj rokoj inter maldensaj arboj,

kiuj servas kiel bonaj sidlokoj. Frumatene sani-oj svarmis ĉi tien de ĉiuj direktoj, kunportante piknikojn. Ĝoje venis maljunuloj kun siaj filoj kaj nepoj, kaj knabinoj bele ornamitaj.

La festivalo estis senceremonia. Antaŭ ol la prezidanto proklamis



Lukto



la inaŭguriĝon de la festivalo, jam eksonis tamburado kaj gongado kaj ekdancis homoj. Oni ludis agrablajn melodiojn per antikvaj populaj muzikiloj — fluto, luna gitaro, luŝengo\* kaj ŝafleda tamburo. Brile prezentitaj estis la tradiciaj glavodanco, forko-danco kaj ĉasista danco. Maljunaj kantistoj plengorĝe prikantis sian novan vivon. La tradicia danco kun tri-korda instrumento estas vaste ludata de popolamasoj. Junuloj lu-



*Sani-aj knabinoj en dancado*



*La sani-a knabino ŝatas ludi per arbofolio diversajn belajn melodiojn por esprimi sian amon.*

dis fluton, plukis belsonan trikordan instrumenton, kaj junulinoj dancis turniĝante per facilaj paŝoj, laŭ melodia takto. Pli kaj pli multiĝis dancantoj kaj fine ili jam sin nombris je kelkcent.

Taŭrludo kaj lukto estas tradiciaj aktivadoj de sani-oj. Kiam ni venis al la taŭrludejo, la ludo ankoraŭ ne komenciĝis kaj kelkcent grasaj kaj fortikaj bubaloj kaj ĝibbovoj kolektiĝis sur milda montdeklivo.

Antaŭ ol komenci la lukton, juĝisto prezentis komunumojn kaj

brigadojn partoprenantajn en la taŭrludo, kaj poste komunumanoj tiris siajn bovojn al la ludejo. En la centro de la ludejo paro da koleremaj bovoj subite tuŝegis sin per kornoj kaj tutforte atakis unu kontraŭ la alia. La spektantoj instigis ilin per krioj. Kiam unu el la du bovoj foriris venkite, la juĝisto deklaris la alian venkinta. Se bovo kvinfoje venkas sinsekve en la lukto, ĝi do gajnas ĉampionecon, kaj ĝia mastro ricevas premion kaj estas fiera pro tiu honoro.

Lukto estas la plej granda aktivado de la Torĉa Festo. En la komenco de la lukto oni dancas nacian dancon kaj poste sportistoj vigle eniras en la luktejon en ritma tamburado kaj trumpetado. La spektantoj en naciaj vestoj dense ĉirkaŭas la luktejon. Unue juĝisto kondukas provokantan luktiston por rondiri en la konkursejo kaj prezentas lin al la publiko, kaj tiam elpaŝas la rivalo, kiu volas lukti kontraŭ li. Laŭ la regulo, tiu kiu tuŝas teron per unu ŝultro estas venkito; kaj tiu kiu dufoje gajnis en la tri bataloj estas venkinto. La lukto ne estas limigita

de tempo kaj iafoje eĉ daŭras pli ol unu horon.

Ĉiu sani-o ŝatas lukton kaj ĉiu vilaĝo havas siajn lertajn luktistojn. Triono de la luktantoj estas junuloj kaj knaboj. En la tuta gubernio troviĝas nombro de elstaraj luktistoj. En ĉiuj pasintaj sportaj konkursoj de la provincoj sani-aj luktistoj ĉiam okupis la unuajn lokojn, kaj unu el ili eĉ gajnis ĉampionecon de la tutlanda lukto.

En la festaj tagoj, kiam la nokta kurteno falis kaj ĉio silentiĝis, paro kaj paro da gejunuloj promenas ŝultron ĉe ŝultro laŭ montvojetoj gaje babilante. En pinarbaro junuloj ludas per fluto oreplacan melodion, kaj ĉe rivereto knabinoj respondas per blovado de foliopeco. La Torĉa Festo servas ankaŭ kiel bona amkomunika ŝanco por gejunuloj.

Ni ĝuis la festan ĝojon kune kun sani-oj. Kiam ni adiaŭis ilin, antaŭ ni denove prezentiĝis la festaj scenoj. Ĉio ĉi tio por mi estos neniam forgesbla.

\* *Luŝengo*: Blovinstrumento el bambuaj tubetoj, ofte uzata de nacimulmultoj.



## EL ĈINA MODERNA HISTORIO

# Aŭtun-rikolta Ribelo

de LIU SHUFA kaj  
TANG BAOLIN

## Guangzhou-a

**L**A Unua Granda Revolucio, kiu oponis kontraŭ imperiismo kaj feŭda militarismo malsukcesis pro la perfido de kuomintangaj dekstruloj kun Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek) kaj Wang Jingwei kiel ĉefoj. Por oponi kontraŭ arma subpremado de malamikoj, la Komunista Partio de Ĉinio faris la Nanchang-an Ribelon je la 1-a de aŭgusto 1927, Aŭtun-rikoltan Ribelon kaj Guangzhou (Kantono)-an Ribelon en septembro kaj decembro de la sama jaro.

### KONFERENCO DE LA 7-A DE AŬGUSTO KRITIKIS DEKSTREMAN ERARON DE CHEN DUXIU

En la 7-a de aŭgusto 1927 la Centra Komitato de KPCĉ sekrete okazigis urĝan konferencon en Hankou (la nuna Wuhan) sub la blanka teroro de Kuomintango. Sub prezido de Qu Qiubai (1899-1935), la konferenco kritikis eraron de Chen Duxiu, kiu rezignis gvidantecon en la revolucia unuecfronto, oponis kampanan movadon kaj senarmigis la revoluciajn fortojn. La konferenco decidis uzi arman batalon kontraŭ la subpremado de kuomintangaj reakciuloj, eksigis Chen Duxiu je lia ofico de la ĝenerala sekretario de la Partio, elektis la novan provizoran politikan buroon de la Centra Komitato kun Qu Qiubai kiel estro, elaboris la taskon fari agraran revolucion kaj arman batalon kontraŭ la masakrado de kuomintangaj

reakciuloj kaj renversi regadon de Kuomintango, kaj decidis fari Aŭtun-rikoltan Ribelon en la provincoj Hunan, Hubei, Jiangxi kaj Guangdong.


### AŬTUN-RIKOLTA RIBELO

Post Konferenco de la 7-a de Aŭgusto Mao Zedong venis al Hunan-provinco por organizi kaj gvidi Aŭtun-rikoltan Ribelon. En la mezo de aŭgusto, li atingis Changsha, la ĉefurbon de Hunan-provinco, okazigis kunvenon por transdiri la spiriton de la Konferenco de la 7-a de Aŭgusto, reorganizis la provincan komitaton de la Partio. Oni diskutis kaj ellaboris la planon de Aŭtun-rikolta Ribelo de Hunan, kaj fondis la Frontan Partian Komitaton kun Mao Zedong kiel la sekretario por gvidi la ribelon. La ĉefaj fortoj de la ribelo estis la gvardia regi-

mento de la Wuhan-a Nacia Registaro, la armitaj laboristoj de la Anyuan-a Karbominejo kaj kampanaj memdefendaj trupoj, gvidataj de KPCĉ. La tri regimentoj kun 5,000 insurgentoj kampadis en tri lokoj pli ol 100 kilometrojn oriente de Changsha. La celo de la ribelo estis konkeri Changsha.

Je la 9-a de septembro, la ribelantoj donis signon de la ribelo per detruo de fervojoj en du lokoj kondukantaj al Changsha. Poste la ribelantoj atakis vilaĝojn kaj guberniajn urbojn. La insurgentoj konkeris du guberniojn Liling kaj Liuyang oriente de Changsha. Sed la malamiko estis forta kaj la insureciaj trupoj suferis seriozan perdon en intensaj bataloj. Fine 1,500 personoj el ili nur postvivis kaj devigite retiriĝis el Liling kaj Liuyang.

*Armiloj uzitaj dum la Aŭtun-rikolta Ribelo*



# kaj

## Ribelo

### STARIGO DE JINGGANG-MONTARA BAZO

Post la malsukceso de la ribelo Mao Zedong kolektis disiĝintajn ribelantojn ĉe Wenjiashi, urbeto ĉe la limo inter Hunan kaj Jiangxi. Tie Mao Zedong kunvokis kunvenon de la Fronta Partia Komitato. En la kunveno li analizis la situacion, dirante ke la malamiko estas forta dum la insurekcia trupo estas malforta. La revolucio de la tuta lando sin turnis en malaltan tajdon, kaj la ĉefaj fortoj de la malamiko koncentriĝis en grandaj urboj. Tial, por konservi kaj disvolvi re-

volucian forton, la insurekcia trupo ne devas ataki grandajn urbojn, sed devas turni sin al kamparo, kie la malamikaj fortoj estas malgrandaj. Li proponis fondi bazon en Jinggang-montaro inter Hunan kaj Jiangxi. Tie la montoj estas danĝeraj kaj malfacile atakeblaj. Cetero la montregiono Jinggang estas fore de grandaj urboj, havas aŭtarcian ekonomion, la malamiko havas al ĝi malstreĉan regadon, kaj ni povos profiti el konfliktoj inter lokaj militaristoj de ambaŭ provincoj. La opinio de Mao Zedong estis akceptita de plejparto de la kamaradoj. Tial la trupo marŝis al Jinggang-montaro. Survoje la insurekcia trupo estis atakita de forta malamika trupo kaj centoj da personoj estis perditaj. Veninte al la montaro, la trupo estis regata de deprimiĝo kaj ŝanceliĝo kaj ofte okazis al ĝi dizerto.

Mao Zedong ĝustatempe decidis reorganizi la restantajn personojn en unu regimenton kaj deklaris, ke tiuj, kiuj volas malmobilizi sin,

povos foriri kaj ricevi vojaĝkoston. En la trupo partiaj organizoj estis starigitaj kaj tial la trupo estis metita sub firman gvidon de la Partio. Samtempe estis abolicitaj la kutimoj de malnova armeo, ekzemple oficiroj rajtis laŭvole bati kaj insulti soldatojn kaj granda estis la diferenco de la soldoj inter oficiroj kaj soldatoj. Kaj en la trupo estis praktikitaj novaj reguloj, nome egala rajto, demokratio kaj solidareco inter oficiroj kaj soldatoj. Tio estis embrio de la novtipa popola armeo starigita de la Komunista Partio de Ĉinio. Ĝuste sur tiu bazo starigis la Ĉina Popola Libera Armeo.

Oktobre de 1927, Mao Zedong kondukis sian trupon al Jinggang-montaro. Poste alvenis ankaŭ Zhu De, Chen Yi kaj Peng Dehuai unu post alia kune kun siaj trupoj. Tie fondiĝis la unua bazloko de la ĉina revolucio.

Dume malsukcesis ankaŭ ribeloj en la provincoj Jiangxi, Guang-



Loko en Wenjiashi, kie kuniĝis la insurĝantoj de la Aŭtunrikolta Ribelo





*Sloganoj de la Guangzhou-a Ribelo*

dong kaj Hubei pro la supereco de la malamikoj. La ribelintoj devigite turnis sin al kamparo kaj montregionoj kaj tie starigis kam-


parajn bazojn kaj persistis en batalo.

### GUANGZHOU-A RIBELO — LA LASTA BATALO DE LA GRANDA REVOLUCIO

Tuj post la Aŭtun-rikolta Ribelo, eksplodis la Guangzhou-a Ribelo je la 11-a de decembro 1927. Guangzhou estis bazo de la Unua Granda Revolucio, kaj la tieaj laboristoj, kamparanoj kaj revoluciaj soldatoj estis harditaj en la revolucio. Tial la urbo havis favoran kondiĉon por la revolucio. Samtempe la regado de Kuomintango estis tre malstabila pro ĝiaj seriozaj internaj konfliktoj, kaj krome ĝia milita forto estis malgranda. Zhang Tailei (1898-1927), membro de la Politika Buroo kaj sekretario de la Guangdong-a Komitato de KPCĈ, starigis la Revolucionan Militan Komisionon por gvidi la ribelon kaj la Ruĝan Gvardion de sep taĉmentoj el pli ol 2,000 laboristoj spertaj en batalo.

Estis la 3-a matene de la 11-a de decembro. En garnizonejo de la Instrua Regimento, Zhang Tailei, Ye Ting, Ye Jiangying, Nie Rongzhen donis ordonon pri la ribelo. Kvankam la Instrua Regimento estis trupo de Kuomintango, tamen ĝiaj membroj estis diplomitoj de la Wuhan-a Milita Lernejo. Sub la gvido de regimentestro Ye Jiangying plejparto el ili subtenis la Komunistan Partion.

Post du-hora batalado, la urbo estis plejparte okupita de la ribelantaj trupoj. Je la 2-a posttagmezo, reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj okazigis "Sovetan Kongreson" en la Unua Parko de Guangzhou. En la kongreso oni starigis Guangzhou-an Sovetan Registaron kaj ellaboris serion da politikoj: altigi salajron de laboristoj; efektivigi 8-horan labortagon kaj produktadon sub kontrolado de laboristoj; ŝtatigi la agraron kaj disdoni ĝin al kamparanoj, soldatoj kaj senlaboruloj; senigi laborulojn je ĉiuj impostoj



*La sidejo de la  
Guangzhou-a Soveta  
Registaro*

Parto de la komunis-  
toj partoprenantaj en  
la Aŭtun-rikolta Ri-  
belo. La tria de mal-  
dekstre en la dua  
vico estas Mao Ze-  
dong.



kaj ŝuldoj; alianciĝi kun Sovetunio kaj faligi imperiismon. Tiel naskiĝis proletara potenco — “Guangzhou-a Soveta Registaro” en la oriento de la mondo.

La Guangzhou-a Ribelo kaj la fondiĝo de la Guangzhou-a Soveta Registaro konsternis kuomintangajn reakciulojn. Ili tuj metis sian internan konflikton flanken, komplotis kaj koncentris 50,000 soldatojn kaj atakis la urbon Guangzhou. Britio, Usono kaj Japanio sendis siajn kanonŝipojn por bombardi Guangzhou, kaj surterigis marinfanteriojn por fari militan minacon. Vizaĝe al la sieĝa atako de fortaj malamikoj la insurgentoj faris mortan batalon kaj repuŝis kelkdekfoje la atakon de malamikoj. Dume la ribelantaj trupoj suferis grandan perdon de militistoj. Zhang Tailei, la gvidanto de la ribelo, oferis sian vivon. Sed la gvidantaro de la ribelo ne konsciis la seriozan situacion kaj ne turnis la trupojn al la kamparo, sed erare persistis en la

urba batalo kontraŭ la forta malamiko. Post 3-diurna sanga batalo la ribelantaj trupoj malsukcesis kaj nur malgranda parto el ili sukcesis eltiriĝi el Guangzhou.

La Guangzhou-a Ribelo estis la lasta batalo de la Unua Granda Revolucio de Ĉinio. Depost tio, la ĉina revolucio iris en malaltan tajdon.

\* \* \*

Kvankam malsukcesis la Aŭtun-rikolta Ribelo, Guangzhou-a Ribelo kaj la Nanchang-a Ribelo, tamen el tio la revolucio ĉerpis tre valoran lecionon. Nombro da komunistoj kun Mao Zedong, Zhu De, Fang Zhimin kaj aliaj kiel reprezentantoj komprenis, ke la ĉina revolucio ne devas mekanike imiti la vojon de la Oktobra Revolucio de Sovetunio pri arma insurekcio en urbego, sed devas kombini Marksismo-Leninismon kun la praktiko de la ĉina revolucio, apliki la metodon sieĝi urbegojn per kamparo

kaj poste konkeri urbegojn. Kvankam postvivis nur malmultaj insurgentoj, tamen ili, kiel fajrero, povis iom post iom disvolviĝi en flaman incendion. Ĝis la jaro 1930, en la tuta lando stariĝis 15 revoluciaj bazoj, 13 armeoj de la Laborista-Kampanara Ruĝa Armeo el pli ol 300,000 personoj dislokiĝis en pli ol 300 gubernioj de dekkelkaj provincoj, kaj persistis en batalo.





## Homoj kun Dufingraj Piedoj

Antaŭ nelonge, oni trovis en arbaro de Rodezio de Afriko strangan tribon, kies multaj membroj havas dufingrajn piedojn tre similajn al tiuj de struto. Tial oni ŝerce nomas ilin strutaj homoj.

Tiu ĉi tribo estas izolita de la ekstera mondo. Kiam oni vizitis ĝian 63-jaran maljunulon, li diris: "En mia infanaĝo mi trovis miajn piedojn neniom strangaj, ĉar ankaŭ mia patrino havas piedojn dufingrajn kaj multaj el nia tribo havas samajn piedojn."

Triono de la 300 membroj de la tribo havas strutajn piedojn. El la kvin gefiloj de la ĵus menciita maljunulo, tri havas strutajn piedojn. Lia 21-jara filo havas lertajn strutajn piedojn. Li povas teni glason per unu struta piedo, levi sodakvan botelon per la alia kaj verŝi sodakvon en la glason.

La strutaj homoj vivas kiel normalaj homoj kaj ankaŭ povas longe piediri. Krom la strangaj piedoj, la strutaj homoj havas membranon inter la manaj fingroj, iuj el ili eĉ havas manfingrojn malpli multajn ol la normalaj homoj.

Jam en la pasinta jarcento estis nemalmultaj notoj pri fingra anomalia de homoj, sed ĝis nun ankoraŭ ne troviĝas tia ĝenerala fingro-anomalia en alia loko kia en tiu tribo. Kiel oni devas klarigi la fenomenon? Iu anatomia profesoro de Johannesburg de la Sudafriko opinias, ke probable tio estas kaŭzita de subita geno-ŝanĝiĝo. Ĉar la membroj de la tribo geedziĝas nur inter si kaj ne kun personoj ekster sia tribo, tial la parenca sam-

sangeco iom post iom influas la genon de la tuta tribo kaj kaŭzis al ĝi subitan ŝanĝiĝon. Li diris: "Tiu fenomeno ne povas esti atavismo, ĉar tio povas esti heredita."

## Sekreto pri Malprosperiĝo de Birdo-insularo

La insularo Chinchu apud la marbordo de Peruo estas alinomata Birdo-insularo. Laŭ statistiko de peruanoj, sur unu el ĝiaj insuloj troviĝis pli ol 6 milionoj da marbirdoj, ĉiutage pli ol 1,000 tunoj da fiŝoj kaj salikokoj estis manĝitaj de la birdoj. Centspecaj diverskoloraj birdoj dense vivis sur la insuloj, tiel ke la insuloj aspektas kiel variaj buntaj tapiŝoj. Kiam unu aŭ du vulturoj aŭ gipatoj alflugis super la insulojn, la lastaj tuj ektumultiĝis kaj la ekflugintaj birdoj kovris preskaŭ la tutan ĉielon.

La insularo Chinchu estas ne nur bela, sed ankaŭ valora ekonomie. Ĝi efektive estas granda natura sterka fabriko. Sur ĝia tersurfaco kovriĝas guano kun dikeco de dekoj da metroj. Guano estas plej bona organika sterko. De la 19-a jarcento la guano sur la insularo fariĝis grava eksportaĵo de Peruo. De 1848 ĝis 1975 la totala kvanto de la ekspluatita guano de Peruo superis 20 milionojn da tunoj.

Sed tiu insularo fame konata kiel "Regno de Birdoj" de la Suda Ameriko subite malprosperiĝis en la lastaj 20 jaroj. La marbirdoj aron post aro forlasis sian karan landon. Peruaj fiŝistoj iam trovis sur la insularo dekmilojn da birdidoj mortintaj pro malsato. La antaŭe movplena insularo dezertiĝis post nur kelkaj jaroj.

Kio estas la sekreto pri la malprosperiĝo de la birdo-insularo? Tio koncernas la oceanan fluon. Ĉe la okcidenta bordo de la Suda Ameriko troviĝis perua malvarma oceana fluo. Ĝi trafluis la peruan maron norden, miksiĝis tie kun la tropika marakvo kaj formis varmetan akvazonon larĝan je 175 km., taŭgan por vivado de planktonoj kaj algoj. Granda kvanto da vivaĵoj liveris abundan nutraĵon al fiŝoj kaj salikokoj kaj tiel la perua maro fariĝis paradizo de fiŝoj kaj salikokoj. Kaj la fiŝoj kaj salikokoj estas bongustajo de marbirdoj. La mirakla birdo-insularo apud Peruo estis interesa fenomeno kaŭzita sub la influo de la oceana fluo.

Ĉe la jaro 1957, en la perua maro ekaperis alia forta mezamerika varma oceana fluo veninta de la nordo, kiu portis plagon al la perua fiŝkaptado. Ĝi multege ŝanĝis la temperaturon, sal-entemon kaj kemian komponaĵon de la marakvo, kaŭze de tio planktonoj kaj algoj mortis grandkvante kaj la marakvo feteriĝis. Tiel la birdo-insularo de Peruo fariĝis malprospera.

## Sapo-insulo

En la Egea Maro de Grekio troviĝas malgranda insulo. Kiam pluvegas, la insulo tuj dronas en mirinda sapa ŝaŭmo. Kio estas la kaŭzo? Efektive, la rokoj de tiu insulo entenas grandan kvanton da alkala materio, kiu povas eligi ŝaŭmon en akvo kaj havas purigan povon kiel sapo. Pro tio la loĝantaro sur tiu insulo neniam aĉetas sapon por lavi vestojn aŭ objektojn. Tie ĉiu ajn terbulo povas servi kiel sapo. Eĉ dum banado ili uzas koton por purigi sian korpon.



Ĉinio estas multnacieca lando. Krom hanoj ĝi havas 55 nacimalplimultojn. Ili ĉiuj havas sian longan historion kaj riĉan kulturon kaj arton. Ili kontribuis al kreo de la brila historio de la ĉina nacio. Komence de tiu ĉi numero ni prezentos iliajn kantojn kaj dancojn.

## Kantoj kaj Dancoj de Ji-oj

Ji-nacieco nombras ĉ. 4,800,000 membrojn, kiuj loĝas en la provincoj Yunnan, Sichuan kaj Guizhou kaj la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. Ĝi havas riĉan buŝan literaturon kaj ĝiaj muziko kaj danco estas plenaj de nacia stilo.

Fotoj de YAN JIN



La danco "Dorsporti Novedzinon"



La vigla solludo de ŝeng-o, en kiu la aktoro kaj ludas kaj dancas.

Solo



La danco "Amkanto en Torĉa Festo"

La danco "Sur Luktejo"




# La Ekspozicio de Mebloj

Tiuj ĉi kvin meblaroj de malsamaj stiloj estas projektitaj de instruistoj de la Centra Instituto de Artoj kaj Metioj kaj eksponataj en la Ekspozicio de Mebloj Projektitaj de Instruistoj kaj Studentoj de la nomita instituto.



Tiu meblaro el fraksena ligno estas uzata por legoĉambro kaj gastoĉambro.

Projektita de LI FENGSONG




La ligna kaj liana mebloj vaste uzataj en la kamparo de norda Ĉinio karakterizigas per simpleco en farado kaj krudeco en strukturo kaj havas kamparan etoson.

Projektita de  
LIN FUHOU  
kaj LUO WUYI



La ĉina meblaro havas longan historion, kaj ĝi formis sian apartan tradician stilon dum miloj da jaroj. Tiu meblaro per ormoĉambro konservas la stilon de la inastioj Ming kaj Qing kaj samtempe avas la modernan stilon.

Projektita de **HU WENYAN**



La bambua kaj liana mebloj estas tre popularaj en Ĉinio. Ili, delikate plektitaj, kun simpla strukturo havas kamparan guston. Tiu kompleto da mebloj estas taŭga por uzo en korto kaj vitra koridoro.

Projektita de **HE ZHENQIANG**



Tiu meblaro el ligno kaj liano havas ĉinan stilon kaj karakteriziĝas per antikva gusto kaj delikateco.

Projektita de **XI XIAOPENG**



815 W

黄山景色  
己未冬月 稼民

